

EL POPOLA CINIO

中國新道

II
1980



La Natura Rezervejo Wolong en Sichuan-provinco

Fotoj de PU TAO




Fazanoj



Nigra simio



Orharaj simioj




Papagoj




Moskulo



Granda pando



Suloj sur Xisha-insularo



En la vasta Suda Ĉina Maro troviĝas tre multaj insuletoj, inter kiuj Xisha-insularo de Ĉinio situas sudoriente de Hainan-insulo.

En Xisha-insularo kreskas multaj arboj kaj aliaj plantoj kaj vivas multe da birdoj kaj bestoj. Tiu riĉa insularo estas nomata ro-zario de perloj en la Suda Ĉina Maro.



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Malgrandaj pandoj
Foto de PU TAO

SUR LA DORSKOVRILO:

Nutri anserojn (Ĉin-stila pen-
trajo)
Foto de LIU QIANG

KOLORAJ SERIOJ:

La natura rezervejo Wolong en
Sichuan-provinco

Suloj sur Xisha-insularo

La ŝtona arbaro

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de
E-istoj

(1) Tulipoj

(2) Pejzaĝo de suda Kalifornio,
Usono

“Tri-specaj krizantemoj” de
Yangzhou

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La Tibeta Medicina Instituto

La ĉin-medicina apoteko Tongren-
tang

Kvin valoregaj ĉinaj drogoj

Knabino (Ligna gravuraĵo)

Somera semajno de Chongqing-aj
esperantistoj

Enhavo

Kongreso plena de demokratia kaj reforma spirito	2
La tradicia medicino de Ĉinio	5
La “Medikamenta Urbo” — mia hejmloko	9
Antikvaj popolaj terapioj de Ĉinio	12
Raporto pri la 65-a Universala Kongreso de Esperanto	14
ESP-NOVAĴOJ	16, 40
Senĉese batalu por forigi diskriminacion	17
Saluton al nova estraro de UEA	18
Danko kaj espero	19
Reformo de la ekonomia administra sistemo de Ĉinio	20
En kombinato de agrikulturo, industrio kaj komerco	22
KURANTAJ AFEROJ	26
VIDINDAJ LOKOJ: Vojaĝo al la ŝtona arbaro de Lunan	27
Danca konkurso	29
Rifoj de edzonsopiro (popola rakonto)	32
Li nun estas en la aĝo de 142 jaroj	34
KULTURAJ NOTOJ	36
KARIKATURO	36
NIA KULTIVEJO: Somera semajno de esperantistoj en Chongqing	37
Gastado ĉe jugoslavaj amikoj	38
Kara gasto el Ĉinio	39
Du agrablaj travivaĵoj dum mia agado por EPC	42
TRA LA MONDO: Tetrinkado en diversaj lokoj	42
En la hejmloko de orharaj simioj	44
KORESPONDI DEZIRAS	45
POR INTERKOMPRENIĜO	46
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Sanĝigo de Ĝino-regiono	48
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Nanchang-a Leviĝo	50
“Tri-specaj krizantemoj” de Yangzhou	52

Ĝenerala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Kongreso plena de kaj reforma spirito

ANTAŬ nelonge okazis en Beijing (Pekino) la Tria Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso atentata de ĉiuj landoj de la mondo.

En la pasintaj multaj jaroj, pro la kaŭzoj de ĉiuj konataj, la demokratia vivo de Ĉinio estis kripla. Tial, malgraŭ tio, ke ĝi estas la plej supera organo de ŝtata potenco, la Tutlanda Popola Kongreso ne povis plene uzi sian povon. Antaŭ la inaŭguriĝo de ĉiu kongreso reprezentantoj ne klare sciis projektojn diskutotajn de la kongreso al kiuj ili povis nur levi sian manon en la kongreso por esprimi sian aprobon. Ili eĉ ne povis doni siajn opiniojn pri la

laboro de ĉiuj departementoj de la registaro, por ne paroli pri iliaj kritikoj kaj pridemandoj al ĝi. Estas ne senkaŭze, ke iuj fremdlandaj kritikistoj ofte komparis la Tutlandan Popolan Kongreson kun kaŭĉuka stampilo. Tamen, ĉifoja kongreso diferencis de la antaŭaj.

En tiu ĉi sesio ĉefministro Hua Guofeng faris paroladon. Estis aprobitaj la raportoj pri la planoj de la nacia ekonomio de 1980 kaj 1981, pri la finaj ŝtataj kalkuloj de 1979 kaj la ŝtata budĝeto (projekto) de 1980, pri la ŝtata budĝeta takso de 1981 kaj pri la laboro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.

Tiuj raportoj kaj parolado observis la principon serĉi veron el faktoj kaj diri kaj la sukcesojn kaj misfarojn en niaj laboroj. La gravaj ciferoj de la planoj, inkluzive de la financa deficino, estis publikigitaj al la reprezentantoj de la kongreso kaj la popolo de la tuta lando. Tio estas la unua fojo dum la lastaj pli ol dudek jaroj.

Dum la sesio reprezentantoj el la ŝtata gvidantaro, kiel ordinaraj personoj, diskutis problemojn en la grupaj kunvenoj kune kun aliaj reprezentantoj. La popolaj reprezentantoj raportis la opiniojn de la popolo al la kongreso. Ili laŭdis la registaron pro la atingoj akiritaj en


Grupa kunveno



demokratia

Ĉefministro Zhao Ziyang naskiĝis en Huaxian-gubernio de Henan-provinco en 1919. En 1938 li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Poste li laboris kiel sekretario de gubernia partia komitato, sekretario de subprovinca partia komitato, la unua sekretario de la provinca partia komitato, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro.

Li estis membro de la 10-a kaj 11-a Centraj Komitatoj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj alterna membro de la Politika Buroo de la 11-a Centra Komitato de KPĈ. En la Kvara Plena Sesio de la 11-a Centra Komitato de KPĈ li estis elektita kiel membro de PB de CK de KPĈ kaj en ĝia Kvina Plena Sesio kiel membro de ĝia Konstanta Komitato.



la pasinta unu jaro en la praktikado de reguligo al la ekonomia konstruado kaj en la efektivigo de demokratio kaj leĝa sistemo en la politika vivo. Ili ankaŭ faris al ĝi kritikojn kaj pridemandojn pri iuj misfaroj en la ekonomia laboro kaj pri la problemoj de la media protektado, varprezoj kaj salajro zorgataj de la popolamasoj.

Ke reprezentantoj prezentis siajn pridemandojn pri la laboro de la koncernaj departementoj de la registaro, tio estas la unua fojo en la historio de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio. Gvidantoj de la koncernaj departementoj faris respondon kaj klarigon. Tio montris, ke la popolaj reprezentantoj respondecas por la popolo kaj protektas la interesojn de la ŝtato kaj la popolo. Tio montris ankaŭ, ke la popola registaro serioze respondecas por la Popola Kongreso kaj la popolo. La demokratia atmosfero de la kongreso estas laŭdita de la tutlanda popolo.

La sesio estis plena ne nur de demokratia atmosfero, sed ankaŭ de reforma spirito, kiu ĉefe montriĝis en la gravaj reformoj en la sistemo de ŝtata gvidado.

En la longa tempo la gvida sistemo de la Partio kaj registaro de Ĉinio havis kompare gravajn mankojn. Tio montriĝis ĉefe en troa centraliziĝo de la povo de la Partio kaj registaro, troa kumulado de gvidantoj kaj senapartigado de la gvidado de la Partio kaj registaro. Ĉio ĉi tio nepre damaĝas la kolektivajn gvidadon, malhelpas praktikon de la demokratia centralizo, estigas burokratismon kaj eĉ kaŭzas diktatorecon. Kun disvolviĝo de la moderniga konstruado nepre necesas reformi la nunan gvidan sistemon kaj klare apartigi la partian laboron disde la registara por plifortigi kaj plibonigi la gvidadon de la Partio, helpi diversnivelaĵajn registarojn establi pli fortan laborsistemon kaj bone fari la funkciojn de la registaro.

Laŭ la propono de la Centra Komitato de KPĈ la sesio sankciis, ke prezidanto de la Partio Hua Guofeng ne plu okupiĝos pri la ofico de ĉefministro, tri vicprezidantoj de la Partio kaj du membroj de la Politika Buroo de la Partio ne plu okupiĝos pri la ofico de vicĉefministro, decidis, ke Zhao Ziyang laboru anstataŭe kiel ĉefministro, kaj aldone nomis tri vicĉefministrojn, tiel ke finiĝis la ŝanĝo de la gvidantaro de la Ŝtata Konsilantaro longe dezirata. Ĉifoja ŝanĝo estas la unua paŝo por reformi la gvidan sistemon de la registaro kaj ricevis aprobon kaj subtenon de la ĉina popolo. Kamaradoj, kiuj ekzistis je la ofico en la Ŝtata Konsilantaro, povos koncentri sian energion al partiaj aferoj. Krome, ili estas jam grandaĝaj. Ilia ekzisto servas kiel ekzemplo por aboli la dumvivan okupadon de gvidanteco, kiu fakte ekzistas, kaj junigi diversnivelaĵajn gvidantarojn de la registaro.



La reprezentantoj en balotado

La sistemo de la Popola Kongreso estas fundamenta sistemo de Ĉinio. La sesio elmetis multe da bonaj proponoj por firmigi kaj plibonigi ĝin. La sesio decidis revizii la Konstitucion de la Ĉina Popola Respubliko kaj establi la Revizian Komisionon de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko por ellabori novan konstitucion pli demokratian kaj pli perfektan, plene disvolvi la superecojn de la Popola Kongreso kaj tiujn de la socialisma demokratio kaj leĝa sistemo.

La sesio klare difinis la direkton de la reformo de la ĉina ekonomio. La nuna ekonomia sistemo de Ĉinio havas du mankojn: La unua estas troa centralizo de decidaj rajtoj pri ekonomio, pro kiu gvidantoj de ĉiuj entreprenoj ne havas povon. La alia estas senapartigado

de la registaro kaj entreprenoj. Tio montriĝas ĉefe en tio, ke la registaro intervenas en la entreprenojn ne per ekonomia plano, ekonomia leĝo kaj aliaj ekonomiaj rimedoj, sed per rekta administracio de la registaraj organoj.

La sesio decidis pligrandigi la memstarecon de la entreprenoj, por ke aktivecoj de la lastaj estu plenumitaj de entreprenoj kaj ekonomiaj organizoj. La ŝtato ne devas tro multe interveni rekte en entreprenojn per administra rimedo, sed direkti ilin per prezoj, impostoj, kreditoj, interezoj, ekonomiaj planoj kaj aliaj rimedoj. Estas necese funkciigi estonte ĉie Kongreson de Laboristoj kaj Oficistoj por grandigi la rajton de laboristoj kaj oficistoj en administrado de entreprenoj.

La sesio donis atenton al plibonigo de la vivo de la popolo. La fundamenta celo de Ĉinio en reformo de la ekonomia sistemo kaj moderniga konstruado estas paŝon post paŝo altigi la materialan kaj kulturalan vivon de la popolo surbaze de disvolviĝo de la produktado. Laŭ la plano de la nacia ekonomio de 1981 sankciita de la sesio, la enspezoj de la popolaj komunumoj, produktaj brigadoj kaj taĉmentoj, kamparanoj kaj la urbanoj rimarkinde plimultiĝos. Kaj la loĝkondiĉoj, kolektiva bonstatiĝo k.a. daŭre pliboniĝos.

La sesio montris, ke la ĉina popolo havas firman decidon konstrui sian landon en modernan socialisman landon kun alta demokratio kaj civilizacio. Ĝi estos enskribita en la historion de Ĉinio kiel sesio plena de demokratia spirito kaj brava reforma spirito.

La tradicia medicino de Ĉinio

La ĉinaj medicino kaj farmakologio havas longan historion kaj ludis gravan rolon en la generado de la ĉina nacio.

ORIGINO DE LA ĈINA MEDICINO

Jam antaŭ 600,000 jaroj la Pekin-homoj komencis uzi fajron kaj ŝtonajn instrumentojn. Kun la progreso de la homaro ekĝermis la ĉina medicino en la primitiva socio.

En tiu tempo, dum la serĉado de nutraĵo kaj la konstruado de materia vivo por sia vivado kaj evoluo, la homoj ofte toksiĝis pro mismanĝo de iuj vegetaĵoj kaj eĉ mortis de tio, aŭ suferis traŭmaton en ĉasado de sovaĝaj bestoj aŭ doloron de muskoloj kaj ostoj pro atako de vento, pluvo kaj frostoj.

La homaro neniam volontis esti sklavo de la naturo. Post sennombraj esploroj kaj provo ili trovis iujn vegetaĵojn utilaj kaj aliajn venenaj por ilia korpo kaj iujn animalojn kaj vegetaĵojn utiligeblaj kiel kuraciloj. Ekzemple, kiam ilin trafis traŭmato, ili ŝmiris sian vundon per koto, arbofolio aŭ herbo aŭ kuracis ĝin per graso, sango aŭ internaĵo de bestoj. Kaj ili ankaŭ konis ke la brulantaj arbobranĉoj kaj seka herbo povis var-

migi la korpopartojn atakitajn de frostoj kaj humideco kaj elimini la doloron. Tiuj primitivaj kurac-metodoj estas origino de kuraciloj kaj kaŭtera terapio.

Kun la disvolviĝo de la primitivaj agrikulturo kaj brutobredado, precipe kun la plia progresado de la tekniko de farado de ŝtonaj iloj, la homoj uzis ŝtonajn ilojn ne nur en produktado sed ankaŭ en kuracado. Akra ŝtona pinglo estis la plej frua kurac-instrumento de Ĉinio, per kiu oni povis trapiki abscesojn kaj ulcerojn. Poste oni elfaris ostan pinglon kaj bambuan pinglon, per kiuj oni enpi-

kis en iujn korpopartojn de paciento por kuraci lian malsanon. Jen tio estas origino de la ĉina akupunkturo.

LA ĈIN-MEDICINA DIAGNOZISTIKO


En la Periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a. K.), vivis fama kuracisto Bian Que. Li vojaĝis tra la tuta Ĉinio kaj praktikis medicinon. Li estis lerta en pluraj medicinaj fakoj, precipe en diagnozo. La postuloj nomas lin fondinto de la ĉin-medicina diagnostiko.

Liaj diagnozaj metodoj estis rigardo, aŭskulto, pridemandado kaj palpado, nome rigardi la vizaĝon kaj langon de la paciento, aŭskulti lian voĉon, pridemandi lin pri lia malsano kaj palpi lian pulson je la pojnoj. Tiuj metodoj estis hereditaj kaj ĝis nun aplikataj de la ĉinaj medicinistoj.

Inter tiuj metodoj rigardo de la lango kaj pulso-palpado estis plej distingaj. Ĉar mankis scienca instrumento por diagnoza esploro en la antikveco, la kuracisto observis kaj analizis la vizaĝan simptomon, langoaspekton kaj pulson de la paciento por diagnozi lian malsanon. Ĉe observado de la lango de la paciento la kuracisto atente rigardis ĝian aspekton, la

Bian Que en pulsopalpado





Zolonghari, veterana ĉin-medicina kuracisto de la ujgura nacieco, instruas al junaj medicinistoj pulsopalpadon.

koloron de ĝia kovraĵo, ĝian likvan glaceon k. a. Laŭ tiuj simptomoj kaj ilia evoluo la kuracisto taksas lian malsanon, la evoluon kaj rezulton. Ekzemple, se la lango de la paciento estas skarлата kaj ĝia kovraĵo flava kaj seka, tio montras, ke lia malsano estas varma kaj mankas al li korpa likvaĵo; se la lango reakiras normalan koloron kaj ĝia kovraĵo fariĝas brila, tio montras, ke la malsano malgraviĝas aŭ li resaniĝis; se la langokovraĵo fariĝas malhela, eĉ bruna, okulfrape seka kaj fendeta, tio montras, ke la malsano pligraviĝas.

Pulso-palpado estas grava parto de la ĉin-medicina diagnozistiko. La radiusa arterio ĉe la pojno estas loko por pulsa palpado. La kuracisto esploras la takton kaj rapidecon de la pulso, la elastecon de la angio, la pulsan forton kaj la sangocirkuladon, kaj per tio li taksas la koran, heptan, renan kaj pulman statojn de la paciento. Resuminte la notojn pri pulso-palpado, medicinisto Wang

Shuhe de la Okcidenta Jindinastio (265-317 p. K.) verkis "Libron pri Pulsa Palpado", en kiu li preparolis 24 pulsajn fenomenojn. La verko estis vaste aplikata de la postaj kuracistoj en pulso-palpado. Poste tiu libro estis enkondukita en Arabion, kaj parto de ĝia enhavo estis enmetita en medicinan verkon de Avicenna.

EMINENTAJ KONTRIBUOJ DE HUA TUO

Kiel elstara reprezentanto de la ĉin-medicinaj ĥirurgoj, Hua Tuo faris gravajn kontribuojn al la ĉina medicino. Li vivis en militaj jaroj de la dua jarcento p. K. Tre multaj vundiĝis en la militoj. Hua Tuo antaŭe esploris matematikon, li tre simpatiis suferojn de vunditoj kaj okupiĝis pri medicino. Fine li fariĝis medicinisto kun pluraj talentoj. Li faris eminentajn kontribuojn en ĥirurgiaj operacioj, tial la posteuloj nomas lin fondinto de la ĉina ĥirurgio.

Kiam la malsanulo estis neresanigebla per tizano kaj aku-

punkturo, Hua Tuo faris al li ektomion. Li inventis narkotaĵon kun alkoholaĵo. Ĝin trinkinte la paciento perdis konscion. Lia inventaĵo donis oportunon por ĥirurgia operacio. Li propramane faris operaciojn por fortranĉi abdomenan tumoron, kunkudri stomakon kaj inteston kaj aliajn, kaj akiris sukceson.

Hua Tuo estis ankaŭ fondinto de sporta medicino. Li opiniis, ke sportado povas fortigi korpon kaj preventi malsanojn. Li elpensis sportadon de "ludo de kvin bestoj", nome la gimnastikajn ekzercojn per imito de movoj de tigro, cervo, urso, simio kaj birdo, por trejni la muskolojn kaj artikolojn de la homa korpo. Tiu sanprotekta metodo ebligis al multaj homoj fortigi la korpon kaj hodiaŭ estas ankoraŭ aplikata en Ĉinio.

VALORAJ FARMAKOPEOJ

Jam en la komenco de la tria jarcento a. K. aperis en Ĉinio la unua farmakopeo *Shennong Bencao*, kiu notis 365 specojn de vegetalaj, animalaj kaj mineralaj drogoj. Kiel diras tiu libro, efedro kuracas astmon, dikroo — malarion, koptiso — disenterion, algo — tiroidan tumoron, kaj hidrargo — furunkon k. a. Efektive, ĝis nun ili ankoraŭ havas klinikan valoron.

Alia grava afero okazis en la historio de la ĉina medicino, ke aperis en 659 p. K. nova farmakopeo *Xinxiu Bencao*, kiu estis aplikata en la tuta lando. Ĝi estis la plej frua ŝtata farmakopeo en la mondo.

La ĉina medicino en sia historio de disvolviĝo atingis alian kulminon en Ming-dinastio

(1368-1644). La majstra verko de Li Shizhen *Ben Cao Gang Mu* estis la plej ĉefa farmakopeo en tiu periodo.

Li dediĉis 30 jarojn al la redakta laboro por tiu enhavoriĉa verko, konsultante pli ol 800 librojn. Por precize priskribi la formon kaj produktojn de drogoj, li senlace vojaĝis al multaj lokoj, faris esplorojn kaj kolektis specimenojn de diversaj drogoj. Li finis tiun verkon en la jaro 1578. Ĝi konsistas el 52 volumoj kun 1,892 specoj de drogoj kaj pli ol 10,000 receptoj, ĉiu el ili estis aldonita post koncerna drogo por ekspliki ĝian efikon. 374 el la 1,892 estis nove aldonitaj. Krome, la verko enhavas ankaŭ parton da eksterlandaj drogoj kaj pli ol 1,000 ilustraĵojn.

Poste tiu farmakopeo estis tradukita en la japanan, anglan, francan, germanan kaj latinan lingvojn. Eksterlandaj specialistoj kaj scienculoj ĝin esploras, rigardante ĝin ĉiam kiel gravan literaturon pri farmakologio kaj botanika klasifiko.

La metodoj de la ĉinaj medicinistoj por koni, observi, analizi kaj kuraci malsanojn estas


hereditaj de generacio al generacio ĉefe dank' al la diversaj medicinaj literaturoj kaj farmakopeoj verkitaj de ili. Laŭ nekompleta statistiko, Ĉinio havas almenaŭ pli ol 8,000 medicinajn verkojn kaj farmakopeojn kun 100,000 volumoj. Ili konsistigas gravan parton de la ĉina antikva kultura trezorejo.

MEDICINOJ DE DIVERSAJ NACIECOJ

Ĉinio estas lando kun multaj naciecoj, kaj la ĉina kulturo estas kune kreita de ili. Ĝenerale, la ĉina medicino aludas la medicinon de la han-a nacieco. Nun oni jam trovis la medicinajn heredaĵojn de iuj nacimioritatoj, kiel la literaturo kaj klinika sperto de la tibeta, mongola, ujugura, ji-a, taj-a kaj ĝuang-a medicinaj. Ankaŭ ili estas raraĵoj el la ĉina medicina trezorejo.

Mi prenu la tibetan medicinon kiel ekzemplon. Ĝi havas historion de pli ol 1,000 jaroj. Antaŭ 1,200 jaroj la princinoj Wencheng kaj Jincheng de Tang-dinastio (618-907 p. K.) edziniĝis respektive al la tibetaj

reĝoj Sunzamkampo kaj Khrildegugrcan. Ili siatempe kunportis en Tibeton grandan nombron da medicinaj verkoj kaj multajn kuracistojn. Poste la tibetanoj enkondukis bonajn medicinajn sciojn el Hindio kaj aliaj najbaroj kaj kreis sian tibetan medicinon kun nacieca originaleco. La fama tibet-medicina literaturo "Kvarvoluma Farmakopeo" estis tradukita parte aŭ tute en la mongolan, rusan, anglan, germanan kaj japanan lingvojn. La tibeta medicino havas bonan efikon sur ulceron, artriton kaj sekvaĵojn de cerb-angia malsano. La tibetaj medikamentoj trovas ŝaton en la sud- kaj nord-okcidentaj provincoj de Ĉinio kaj en Nepalo, Hindio kaj aliaj najbaraj landoj.



Hua Tuo kaj lia sportado de "ludo de kvin bestoj": 1. pozo de tigro 2. pozo de cervo 3. pozo de urso 4. pozo de simio 5. pozo de birdo





*Li Shizhen en verkado de
"Ben Cao Gang Mu"*

La mongola medicino resumis la sperton de la mongoloj en ilia batalado kontraŭ malsanoj kaj asimilis la eliton de la tibeta medicino. La ujugura medicino asimilis la eliton de la han-a, tibeta, araba kaj persa medicinoj kaj havas bonan efikon sur iujn malfacile kuraceblajn malsanojn, kiel vitiligo.

HEREDO KAJ DISVOLVIĜO

Kvankam la ĉinaj medicino kaj farmakologio havas longan historion, propran teorion sistemon, riĉan literaturon kaj grandan sukceson, tamen ĝi disvolviĝis neglate. Precipe en la periodo de la kuomintanga regado la ĉina medicino estis preskaŭ kripligita.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Kompartio ellaboris ĝustan politikon pri la ĉina medicino kaj tiu tradicia medicino ekbrilis denove. La ĉin-medicinistoj ekhavis sian socian pozicion kaj oni komencis kulturi ĉin-medicinistojn en altaj lernejoj. En Ĉinio nun troviĝas 22 ĉin-medicinaj institutoj, kiuj

kulturis por la ŝtato grandnombrajn ĉin-medicinistojn. Kaj fondiĝis ankaŭ nemalmultaj esploraj organoj. La Ĉin-medicina Instituto de Beijing (Pekino) havas multajn famajn veteranaĵojn ĉin-medicinajn kuracistojn kaj estas esplora centro de la ĉina tradicia medicino. Ĉiuj provincoj kaj municipoj starigis siajn proprajn ĉin-medicinajn hospitalojn, ankaŭ la ĝeneralaj hospitaloj havas ĉin-medicinan fakon.

Por pli efike heredi la valoran sperton de la veteranaĵoj ĉin-medicinaj kuracistoj, la diverslokaj hospitaloj kaj kuracoservoj havigis al ili taŭgajn helpantojn, ke la lastaj studu kaj sistemigu ilian klinikan sperton, kaj eldonis librojn pri la klinika sperto de diversaj fakoj.

Ankaŭ progresis la studo de la ĉin-medicina teorio. Dank' al direktado de tiu teorio, sukcesis la provado de akupunktura anestezo kaj ĉin-medikamenta anestezo. Sukcesis ankaŭ pingla kuracado de katarakto, fiksa rekunigo de rompitaĵoj per salik-lignaj latoj kaj traktado de

akutaj abdomenaj malsanoj, encefalito B kaj grandarea brulvundo per metodo de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. La akupunktura anestezo estas aplikata en grandajn operaciojn de encefalo, torako kaj abdomeno. Krome, ĝojindan progreson ekhavis la studo de la teorio pri abdomenaj visceroj kaj vaskuloj, pri vigligo de la sanga cirkulado kaj korpofortigo. Lastatempe aperis "Ĉin-medicina Farmakopeo" kun pli ol 5,000 specoj de drogoj. Antaŭ nelonge ĉinaj farmakologoj ekstraktis abrotaninon, novan kontraŭmalarian medikamenton, kiu pli efikas ol kinino, klorokinino kaj aliaj ofte uzataj kontraŭmalariaj medikamentoj.

Nun Ĉinio havas ne nur altnivelan ĉin-medicinan vicaron, sed ankaŭ okcident-medicinan vicaron, tiu lasta lernis la ĉinan medicinon kaj laboras fervore per ambaŭ medicinoj en kombino. Se la du vicaroj dediĉas sian forton kaj kunlaboras konstante, ili certe povas plirapidigi la paŝojn heredi kaj disvolvi la ĉinan medicinon.

La “Medikamenta Urbo”—mia hejmloko

JAM 28 jarojn mi ne vidis mian hejmlokon.

Mia hejmurbo Anguo situas 200 kilometrojn sude de Beijing (Pekino). En antikveco ĝi nomiĝis Qizhou kaj famiĝis pro sia foiro de drogoj. Antaŭ nelonge mi informiĝis, ke japanaj komercistoj mendis 100,000 kg. da astragalo produktita de Anguo, kaj tio vekis ĉe mi la deziron revidi ĝin. Mia deziro efektiviĝis je la fino de la lasta somero.

Ĉinio estas lando kun vaste dislokitaj produktoj de multego da specoj de drogoj. Tiu drogoj el plantoj, animaloj kaj mineraloj formis materian bazon por la disvolviĝo de la ĉina medicino, kiu havas longan historion. Ĉar la teritorio de Ĉinio estas vastega kaj sub diferencaj klimatoj, ĉiu el ĝiaj partoj havas siajn tradiciajn kaj rarajn drogojn. Pro bezono de interŝanĝo de drogoj formiĝis iom post iom drog-foiroj, kiuj ludis gravan rolon en provizado de medikamentoj por la sanprotektado de la popolo. Mia hejmloko estas unu el tiaj foirejoj.

Alveninte Anguo-n per aŭtobuso, mi unue iris al la suda antaŭurbo, kie mi lernadis en knabece. Tie mi denove vidis la majestatan antikvan Templon de Medikamenta Reĝo.

Tiu templo estis konstruita en la Norda Song-dinastio (960-1127 p.K.). Oni diras, ke la Medikamenta Reĝo, nomata Pei Tong, faris grandan kontribuon en fonda de la Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.). Li estis eminenta ne nur en literaturo kaj militarto sed ankaŭ en medicino. Lia tombo troviĝis en tiu loko, kaj por memori pri li oni konstruis la templon. Kiam mi estis knabo, foje mia patrino grave malsaniĝis kaj ne vidis mildiĝon de la sufero malgraŭ klopodoj de kuracistoj. Sed iutage, ŝi vidis en sonĝo la Medikamentan Reĝon, kaj baldaŭ ŝi resaniĝis. Kompreneble tio estis nur hazardo. Tamen en mia hejmloko vere cirkulis legendoj pri mirakloj faritaj de la Medikamenta Reĝo en kuracado kaj multaj homoj vizitis la templon por oferi incenson al li kaj peti lian helpon al malsanaj parencoj. Tio montris, kiel profundan influon li havis sur popolon. Kiam mi vizitadis elementan lernejon proksime de tiu templo, tie okazadis granda foiro de drogoj kun la templo kiel la centro.

Je la fino de la 18-a jarcento, la drog-foiro de Anguo etendis siajn rilatojn iom post iom al la tuta lando. En tiu periodo, drog-foiro kun daŭro de 1 monato okazis tie dufoje ĉiujare

en la kvara kaj deka monatoj laŭ la luna kalendaro. Dum tiaj foiroj drog-komercistoj el ĉiuj partoj de la lando kolektiĝis en Anguo kaj ĉe la templo svarmis bruaĵoj homamasoj kaj disportiĝis de tie fortaodoro de drogoj. Sed antaŭ la Liberiĝo en 1949, tiu “Medikamenta Urbo” velkiĝis pro militado kaj ĉie vidiĝis depresio.

Post la fonda de la Popola Respubliko, la registaro aktive helpis kaj disvolvis la entreprenon de drogoj en mia hejmloko. En 1952 reviglis la dufoja drog-foiro kaj en 1956 tiu foiro denove atingis tutlandan skalon en drog-negoco. Samtempe kun tio, la registaro fondis eksperimentan kultivejon de drogherboj kaj medikamentan fabrikan kaj riparigis la Templon de Medikamenta Reĝo per aparta monsumo. En la kuranta jaro, fondiĝis la Anguo-a Komercejo de Drogoj por konstante prizorgi interŝanĝon de drogoj inter diversaj partoj de la lando.

En printempo ĉijare, la ŝtata Medikamenta Administracio okazigis drogfoiron ĉi tie kun partopreno de reprezentantoj de drog-kompanioj en 27 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. En ĝi oni vendis 630 specojn de drogoj kaj subskribis 19,000 kontraktojn pri vendo de drogoj. Inter la venditaj varoj



La Templo de Medikamenta Reĝo

sin trovis pogrande bezonataj drogoj kaj raraj specoj malfacile akireblaj. Kelkaj specoj de tonikoj kaj kuracaj vinoj antaŭe malfacile vendeblaj fariĝis debitaĵoj. La enhavo de ĉinmedicinaj receptoj ĝenerale konsistas el pluraj specoj de drogoj, tial tia interŝanĝo estas bonvena por la kuracejoj kaj pacientoj. Simila foiro okazis ankaŭ en la komenco de la lasta somero kaj oni sukcesis fari en ĝi vendojn kun totala valoro de 66,130,000 juanoj.

Nelonge post mia reveno al Anguo, mi vizitis la Ŝtatan Eksperimentan Kultivejon de Droglantoj sudoriente de la urbo. Ĝia kultiva areo estas nur ĉ. dek hektaroj, tamen la nombro de la specoj de ĝiaj droglantoj atingis 120, el kiuj iuj devenis de marborda regiono, aliaj de montaro kaj triaj de fremdaj landoj.

Kondukate de Mo Zengfu, laboranto de la kultivejo, mi pririgardis la kultivejon similan al florigardeno. Bidherbo (*Coix lacryma*) estas tradicia drog-

planto kultivata ĉe Anguo. Ĝiaj grajnoj kun malmola ŝelo similas al bidoj kaj entenas kernon pli bongustan ol rizo. Antaŭe cirkulis popola diro: "Por ĝui manĝon el bidherbaj grajnoj, naskiĝi oni devas en reĝ-domo." Nun la hektara produktokvanto de ĝiaj grajnoj jam atingis 4,500 kg. Oni sukcese kultivas tie altajn arbojn eŭkomioj (*Eucommia ulmoides*), kies ŝelo estas uzebla kiel drogo. Ili kreskas tre malrapide kaj oni povas rikolti ilian ŝelon nur post 20-jara kreskado. Tie estas ankaŭ speco de daturo, kiu povas esti uzata kiel narkotaĵo. Mo Zengfu diris, ke ĝi eĉ povas larĝigi la pupiltruon de infano, se la lasta longe rigardas ĝin en forta sunbrilo.

Tie estas ne nur valoraj plantoj sed ankaŭ homoj kun valoraj spertoj. Mo Zengfu, kiu min gvidis, longe sin okupis pri kultivado de drogherboj kaj verkis kune kun siaj kolegoj la libron "Kultivaj Teknikoj de Nordaj Droglantoj" kun ĉ. 200,000 ideografiaĵoj.

En la lastaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644), oni jam faris historiajn notojn pri kultivado de drogherboj en mia hejmloko. Ĉifoje mi havis ŝancon viziti la produktan brigadon Jiaozhuang je 10 kilometroj sude de la gubernia urbo. Survoje mi vidis diversajn droglantojn en privataj kampoj: strioj de verdaj astragaloj kaj angelikoj borderas parcelon de brile ruĝaj kokkrestoj (*Celosia cristala*), smeralde verdaj laŭboj de montbatatoj (*Dioscorea japonica*) kontrastas al amarantoj kun rozaj, verdaj, oranĝaj kaj neĝblankaj floroj—la vidaĵo vekis ĉe mi imagemon pri buntaj bulbokampoj de Nederlando kaj la Roza Valo de Bulgario. Vicsekretario de la partia filio de Jiaozhuang diris al mi, ke ili fondis kolektivajn drogherban kultivejon kun areo de 20 hektaroj, kiu ne nur alportis al ili enspezon, sed ankaŭ povas provizi la komunumanojn per ĉ. 70 procentoj de la bezonataj drogherboj. Hodiaŭ en la tuta gubernio de Anguo oni kulturas 2,200 hektarojn da drogherboj kaj rikoltas ĉiujare 1,700,000 kg. da ili. Dank' al tio, ĉiu kamparano povas akiri meznombre 15 juanojn, kiu sumo sufiĉas por vivteni unu personon en tiu loko je unu monato.

Anguo estas renoma ankaŭ pro sia preparado de medikamentoj. Reveninte al la urbo mi vizitis ĝian medikamentan fabrikon, kiu staras sur antaŭaj kampoj.

La apero kaj disvolviĝo de la drog-foiro de Anguo ludis gvidan faktoron en disvolviĝo de industrio kaj komerco de tiu loko. Antaŭ la Liberiĝo, tie jam estis multaj personoj sper-

toriĉaj en preparado kaj ekspertizado de drogoj kaj cirkuladis popola diro, ke "la drogoj ne havas propran odoron sen trapaso al Qizhou". Sed antaŭ la Liberiĝo ekzistis tie nur malgrandaj familiaj metiejoj, kiuj preparadis drogojn per simplaj tranĉiloj kaj pistiloj. En oktobro de 1958 fondiĝis la Medikamenta Fabriko de Anguo, per unuigo de kelkaj malgrandaj medikamentaj farejoj. Ĝia nuna vicfabrikestro Wang Weizhong prizorganta produktadon estis estro de unu el la farejoj. Li estas membro de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Hebei-provinco.

En la fabriko mi pririgardis la laborejojn por selektado, dispecigado, sekigado, desinfekado, piloligo, analizo kaj pakado. La fabriko povas produkti 220 specojn de medikamentoj por pliifortigi homan sanon aŭ kuraci apopleksion, cerbiton, virinan hemoragion k.a. Iuj el ili estas bone akceptataj ankaŭ en eksterlandaj merkatoj. Kelkaj el ĝiaj produktaĵoj, kiel pilolo Niu Huang Angong Wan, estas

LOKOJ MENCITAJ

EN TIU ĈI NUMERO



1. Anguo-gubernio de Hebei-provinco
2. Wuhan
3. La Lunan-a Jinnacieca Aŭtonoma Gubernio de Yunnan-provinco
4. Chongqing
5. Jinghong-gubernio de Yunnan-provinco
6. Nanchang
7. Wenchuan-gubernio de Sichuan-provinco



preparitaj laŭ esoteraj receptoj kaj pruviĝis tre bonefikaj. Mi rimarkis, ke novaj fabrikodomoj kaj loĝdomoj estas en konstruado, kiuj antaŭdiras pluan disvolviĝon de tiu entrepreno.

La gubernia urbo de Anguo antaŭe kovris nur ĉ. 2 kvadratajn kilometrojn. Tiam ĝiaj vojoj estis nepavimitaj kaj multaj el ĝiaj domoj estis el adoboj. Hodiaŭ ĝi grandiĝis 2.5-oble kun asfaltitaj vojoj kaj havas fabrikojn de kotontekstilaĵoj kaj cemento, maŝinriparejon kaj transmision televidan stacion. Mi esperas, ke ĝi fariĝos moderna "Medikamenta Urbo" en baldaŭa estonteco.

Drogplantejo



REN ZONG:

Antikvaj Popolaj Terapioj de Ĉinio




Foto 1




Foto 2

KARAJ legantoj, antaŭ vi sin prezentas du fotoj: la unua montras suferplenan kaj kompatindan infanon kun tortikolo; kaj la dua montras sanan infanon, naivan kaj amindan. Efektive la fotoj prezentas la saman infanon nomatan Li Jie. Li suferis denaske de muskola oblikva kolo, sed nun resaniĝis dank' al la ĉina antikva masaĝa terapio aplikata de ostologiaj kuracistoj de la Beijing-a Fervojiŝta Hospitalo.

La ĉina tradicia medicino formiĝis en sia longtempa evoluado, kaj multaj terapioj devenis plej frue de la popolo. Ili estas simplaj kaj efikaj por kuraci iujn malsanojn, tial ili estis kaj estas aplikataj ĝenerale en la kamparo al kiu mankas medicinaj instalaĵoj. Ankaŭ en urboj oni ŝatas apliki tiujn terapiojn. Ĉi-sube ni konigas al vi tri el ili.

MASAĜO

Masaĝo estas kuracmetodo, laŭ kiu kuracisto kuracas pacienton per mana premado, frotado, puŝetado, pinĉado, knedado, tremetigado kaj frapetado de muskoloj kaj artikoj.

La masaĝa terapio efikas por mildigi doloron en talio kaj kruroj, kuraci vundon de mola histo, ellokiĝon de intervertebra disko, stomakan neŭralgion, dispepsion, encefalan anemion, hipertension, neŭralgion de talio, kapdoloron, infanan paralizon, artikan reŭmatismion kaj aliajn oftajn malsanojn.

Dum kaj post masaĝado la malsanulo sentas malstreĉitecon kaj komfortecon, ĉar la terapio povas malfermi multajn kapilarajn angiojn de la malsanulo, pligrandigi la elastecon de lia muskolo kaj senĝene cirkuligi la sangon de artikoj kaj tendenoj. Dank' al tio la masaĝataj lokoj povas ricevi pli da sango kaj nutro, tiel ke la paliĝinta, malstreĉita kaj sekeca haŭto ruĝiĝas kaj reakiras elastecon.

Masaĝado ankaŭ ludas grandan rolon en reguligado de muskoloj, nervaro kaj sango de la internaĵo. Ĝi povas plirapidigi cirkuladon de la sango de grandaj kaj malgrandaj vaskuloj de muskoloj, nervaro kaj malprofunda haŭtotavolo. Kiam la malgrandaj vaskuloj ricevas sufiĉe da sango, la grandaj vaskuloj ne

ŝveliĝas pro tro da koncentrita sango. Tio malpezigas la intensan sangan transportadon de la koro kaj tiel sentigas al malsanulo komfortecon.

La masaĝa terapio kvankam efikas malsam-grade en kuracado de la supre menciitaj malsanoj, ĝi tamen havas sian limigitecon. Ĝi ne taŭgas precipe por kuraci infektajn malsanojn, akutan inflamon, kancerajn kaj tuberkulozojn.

SKRAPA TERAPIO

Se vi estas observema, vi povas trovi, ke sur gorĝo aŭ nuko de iuj homoj troviĝas peceto da purpura haŭto. Tio estas la postsigno de skrapado.

La skrapa terapio efikas por kuraci akutajn malsanojn, ekz. sunfraĝon kaj vomon, kiuj ofte okazas en somero kaj aŭtuno. Ĝi estas vaste uzata inter popolanoj.

Sur la homa korpo troviĝas multaj lokoj skrapeblaj, ekz. dorso, antrojoj de brako kaj kruro, gorĝo kaj nuko. La metodo estas: unue purigi la skrapotan lokon per pura malseka

tuko trempita en sapaĵo, poste trempi bol-asepsitan glatan kupran moneron en kuirleo kaj fine skrapi la haŭton per monerrando en unu direkto kaj per egalaj facilaj movoj, kaj post 6-7 fojoj de skrapado aperas purpuraj strioj sur la haŭto. Poste oni ŝmiras la skrapitan lokon per vazelino.

Skrapado povas refreŝigi la kapon de malsanulo kaj multe mildigi la malsanon. Kial la terapio havas bonan efikecon? Unue, la skrapado incitas nervaron reakciantan al la cerbo kaj tiel fortigas la defendan kapablon, kaj due, ĝi incitas sangocirkuladon. La vejnoj estas ofte obstrukcataj pro sunfrapo aŭ malvarmumo. Skrapado povas inciti la hipoderman histon, rapidigi returnan fluon de la sango kaj plifortigi rezistecon de la paciento kontraŭ malsano.

KUPOTERAPIO

En Ĉinio troviĝas jena proverbo: "Akupunkturo kaj kupoterapio forigas malsanon je duono." Ĝi havas bonan efikon en kuracado de kapdoloro, tuso, lakso, vomo, torakdoloro, stomakdoloro, taliodoloro kaj paralizo de la membroj kaŭzita de malvarmo kaj humideco.

La kupo de plej frua tempo estis farita el bovkorno kaj poste el bambuo kaj argilo. La nuna kupo estas vitra. La uzata kupo devas esti firma kaj glata je la rando.

La manipulado estas simpla. Unue oni purigas la lokon por uzi kupon kaj ŝmiras vazelinon sur ĝin (estas plej bone, se oni metas sur ĝin pastolamenon pli grandan ol la buŝo de la kupo) por protekti la haŭton, poste oni prenas per pinĉilo alkoholan kotonbulon, ĝin bruligas kaj eksvingetas en la kupo, kaj tuj


ĝin elprenas kaj tiam metas la kupon sur la haŭton.

La kupo restu 5-15 minutojn sur la haŭto. Kiam oni volas demeti ĝin, oni devas delikate oblikvigi la ujon per unu mano kaj premi la haŭton ĉe ĝi per la alia por enlasi aeron kaj tiel la kupo facile defalas de la haŭto.

Tiu terapio povas kaŭzi kongeston, ŝveligi vaskulojn, rapidigi sangocirkuladon kaj metabolon, plifortigi rezistecon kontraŭ malsano kaj resanigi parte aŭ tute pacientojn.

La kupoterapio, same kiel skrapa terapio, povas kuraci iujn malsanojn, tamen ĝi servas nur kiel helpa kuracrimedo, kaj aplikante ĝin, oni devas samtempe uzi medikamentojn aŭ aliajn metodojn. Tiu terapio ne taŭgas por tro debila malsanulo aŭ iuj akutaj infektaj malsanoj.


En Ĉinio estas multaj popolaj terapioj. Neniu el la supre menciitaj terapioj bezonas medikamentojn, sed, plimultaj el ili estas aplikataj



Kupoterapio

kun drogherboj aŭ kataplasmo. Kiam oni estas malsana aŭ vundita, li povas preni dekoktaĵon el unu aŭ pluraj drogherboj aŭ ŝmiri la vundon per kataplasmo farita el ili.

Masaĝo



Raporto pri la 65-a Universala



*Estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio Bakin
(meze) donas salutvortojn al la 65-a UK.*

Kongreso de Esperanto

NEATENDITA RENKONTIĜO

En la 30-a de julio ĉijare, mi flugis de Beijing al Stokholmo kiel unu el la membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio estrata de Ba Jin (Bakin), por partopreni en la 65-a Universala Kongreso. En la sama tago ni tranoktis en Belgrado, kaj en la mateno de la sekvanta tago ni daŭre flugis per jugoslava aviadilo. Tuj kiam ni enpaŝis en la pasaĝeran kajuton, jugoslava ekonomikistino s-ino F. Marija en la unua vico, vidinte verdan stelon sur nia brusto, fervore salutis nin. Ŝi estis la unua fremda esperantistino kiun ni renkontis dum la vojaĝo de pli ol 10,000 kilometroj. Ni ĝoje prezentis Bakin al ŝi. Aŭdinte, ke ni interparolas Esperante, s-ino M. Almada, ĉefredaktoriĉo de bulteno de la Brazila Konsilantaro de Esp-o, kun rideto alvenis partopreni en nia kon-

versacio. Ŝi prezentis al ni sian edzon s-ro F. S. Almada, prezidanto de la nomita konsilantaro, kaj entuziasme invitis nin ĉeesti la 66-an Universalan Kongreson de Esperanto de 1981 en Brazilo. Ŝi donace disdonis al ni numerojn de la gazeto kompilita de ŝi kaj regalis nin per brazilaj bombonoj. Niaflanke ni donacis al ili verdstelajn insignojn. Intima interparolado rompita kvieton de la tuta kajuto. Tiu neatendita renkontiĝo multe ĝojigis nin. Esperanto fariĝis amika ponto inter eŭropanoj, amerikanoj kaj azianoj, kaj dank' al tio ni povas forigi lingvan barajon kaj konatiĝi unu al alia. Tio elokvente pruvis la grandan vivipovon de Esperanto.

NOVA FENOMENO KURAĜIGA

Post unu kaj duontaga flugado ni atingis la belan urbon

Stokholmo. En la ĝenerala kunveno de la 2-a de aŭgusto, en la nomo de la Ĉina Esperanto-Delegacio Bakin donis salutvortojn al la kongreso kaj ricevis longtempan aplaŭdadon de la tuta ĉeestantaro. En la sekvanta tago estis la solena kaj varma inaŭguro. I. Bengtsson, la plej alta patrono de la kongreso, prezidanto de la sveda parlamento, faris inaŭgurajn vortojn en Esperanto al 1,800 reprezentantoj venintaj el 51 landoj aŭ regionoj. Ankaŭ reprezentantoj de diversaj internaciaj organizoj, diverslandaj ambasadoroj, konsilantoj en Svedio salutis la kongreson, inter ili kelkaj diplomatoj faris saluton per Esperanto. Tio estis fenomeno malofte videbla en la antaŭaj kongresoj. Kaj plie, antaŭe la kongresaj temoj estis nur pri Esperanto mem, sed en ĉi tiu kongreso oni traktis jam pri iuj sociaj problemoj ekzistantaj en la nuna mon-



Bakin kaj Zhang Qicheng en UK

do. Tio estis nova fenomeno kuraĝiga.

La problemo "diskriminacio" estas la kongresa temo de la kurranta jaro. Inter la kunvenoj de diversaj formoj aranĝitaj de la kongreso 35 kunvenoj tuŝis la socian problemon pri opono kaj forigo de diskriminacio rasa, internacia ekonomia, lingva, virina kaj maljunula. D-ro Tonkin, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, vicprezidanto R. Corsetti kaj J. C. Wells, membro de Akademio de Esperanto, faris enhavoriĉan kaj penetreman paroladon en koncernaj kunvenoj. Posttagmeze de la 4-a de aŭgusto mi faris paroladon kun temo "Senĉese Batalu por Forigi Diskriminacion". Prezidanto de la kongreso R. Corsetti, d-ro Tonkin, japana s-ro Okumura-Rinzo kaj aliaj diverslandaj amikoj varme gratulis min. Tio estis ne nur kuraĝigo al mi, sed ankaŭ elmonro de ilia profunda amikeco al la ĉina popolo.

AFABLA SUBTENO

Dum la kongreso ni vidis ke UEA kaj diverslandaj amikoj

subtenas nin en ĉiuj flankoj. La Komitato de UEA okazigis kunvenon je la 5-a de aŭgusto kaj unuanime aprobis la rezolucion pri akcepto de la Ĉina Esperanto-Ligo kiel asocia membro de UEA. Tio havis profundan signifon por akceli nian kunlaboron kun UEA kaj disvolvi internacian Esperantan movadon. Tuj poste vicestro de la Ĉina Esperanto-Delegacio Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen) improvizis paroladon por danki diverslandajn amikojn pro ilia subteno. Ĉina verkisto Ye Junjian (Cicio Mar) faris specialan prelegon "La Karakterizo de la Ĉina Moderna Literaturo" en la Internacia Somera Universitato aranĝita de la kongreso kaj estis laŭdita de diverslandaj literaturaj amatoroj. Inter 14 kunsidaj salonoj, kiuj prenis nomojn de famaj esperantistoj de diversaj landoj kiel sian nomon, troviĝis salono "Venlo", ĝi estis speciale establita memore al kamarado Venlo Fon, fama ĉina Esperanta pioniro. Ĉio ĉi tio montris zorgadon kaj taksadon de diverslandaj amikoj al la ĉina Esperanta movado.

Kamarado Bakin okupiĝis pri Esperanto frue en la dudekaj jaroj. En la fruaj jaroj li verkis kaj tradukis nemalmultajn literaturajojn per Esperanto kaj pasintjare li estis elektita kiel vicprezidanto de la Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo. Nun li havas 76 jarojn kaj ĉifoje li gvidis la Ĉinan Esperanto-Delegacion al la 65-a Universala Kongreso en Stokholmo. Kiam ni atingis la aerodromon de Stokholmo posttagmeze de la 31-a de julio, UEA speciale sendis s-ron S. Milojevic, ĉefredaktoron de bulteno de UEA, kaj membron de la Komitato de UEA s-inon M. L. Sato al la aerodromo por akcepti nin. En sia akcepta kunveno, urbestro de Stokholmo speciale tostis al Bakin dezirante ke la amikeco inter la popoloj de Svedio kaj Ĉinio vivu por eterne. Ili havis intiman interparoladon en Esperanto. Raportistoj de tagjurnaloj, vesperjurnaloj kaj televidaj stacioj de Stokholmo intervjuis kamaradon Bakin kaj samtempe faris raportan filmon por televidaj spektatoroj. Kelkaj el ili intervjuis Zhang Qicheng, Zhang Haiping kaj Zhou Qianyun kaj petis ilin raporti, kiel impresis ilin la kongreso.

Dum la kongreso, ni ĉiam sentis varmon de amikeco. Ĉu en diversaj kunvenejoj aŭ en la akcepta halo oni ĉiam varme salutis nin kaj faris amikan interparoladon kune kun ni. Ili intime demandis pri la ĉina Esperanta movado kaj vivo de la ĉina popolo, tutkore dezirante ke la ĉina popolo estu feliĉa kaj sukcesu en la kvar modernigoj.

Krome, diverslandaj amikoj unuvoĉe laŭdis gazeton "El

ESPERANTO EN RADIO KAJ TELEVIDO

De januaro ĝis aŭgusto 22 radiostacioj kaj televidstacioj en Ĉinio konigis al la aŭskultantoj kaj rigardantoj Esperanton aŭ la lokan E-movadon. La Hunan-a Popola Radiostacio en kvar temoj elsendis la programerojn por sisteme konigi la naskiĝon, karakterizaĵojn, evoluon kaj nunan staton de Esperanto en la rubriko "Scio".

INFANA ESP-KURSO EN SHANGHAI

La Fengyanglu-a Elementa Lernejo de Jing'an-distrikto de Shanghai fondis infanan Esp-kurson en la fino de julio. Ĝin vizitas 20 infanoj, trifoje ĉiusemajne.

PROF. CHOU IO VIZITIS JEI

Prof. Chou Io, honora prezidanto de la Xi'an-a E-Asocio, vizitis la Japanan Esperanto-Instituton post sia ĉeesto de la 16-a Internacia Kongreso pri Entomologio en Kio-to, Japanio. En Tokio li estis varme bonvenigita de la ĝenerala sekretario M. Osioka kaj vojaĝis al Fuji-monto en akompano de J. Muramacu, estro de la internacia fako de JEI, kaj lia tuta familio. Prof. T. Sakata de Teikio-universitato akompanis lin por pririgardi la ĉefurbon kaj viziti ekspozicion pri papilioj. La Zamenhof-klubo de Tokio okazigis vesper-kunvenon por li.



*Eŭropaj, japanaj kaj ĉinaj
geesperantistoj en la 65-a UK*

Popola Ĉinio", pro ĝia pliboniĝo de la enhavoj, bildoj kaj preskvalito en la lastaj jaroj, samtempe ili esperis ke ni ne haltu en daŭra pliboniĝo. En sia resuma raporto pri la kongreso prezidanto Tonkin aparte rimarkigis ĉiutagan Esperantan disaŭdigon de Radio Pekino. Tio kuraĝigis la ĉinajn esperantistojn.


La kongreson ĉeestis ankaŭ multe da esperantistetoj, niaj du junaj esperantistoj ĉeestis laŭ invito la Infanan Kongreson kaj raportis al diverslandaj amiketoj pri la vivo de la infanoj de la nova Ĉinio. Iu eŭropa amiko diris: "Ekde la lastaj jaroj la Universala Kongreso havas pli da signifoj, dank' al la ĉeesto de ĉinaj esperantistoj." Iun vesperon, la fama bulgara kantisto V. Damjanov interparolis kun mi en la akcepta halo. Li kun granda plezuro rememoris pri sia vizito al Ĉinio en kvindekaj jaroj kaj la amikaj akceptoj de niaj gvidantoj kaj diverslokaj popolanoj. Alia bulgara studentino petis min transdoni la donaca-

ĵon de ŝia amiko al kamarado Chen Yuan, vicprezidanto de la Konsilantaro de ĈEL, kaj mi redonacis al ŝi ekzempleron de n-ro 8 de "El Popola Ĉinio". Trovinte foton de kamarado Chen Yuan en la gazeto, ŝi ĝoje diris: "Ni, la popoloj de Ĉinio kaj Bulgario, estas bonaj amikoj."

Mi estis ĝoja, ke dum la kongreso mi havis okazon kontakti esperantistojn venintajn el kelkdek landoj. Kvankam ni havis malsamajn haŭtkolorojn, rasojn, profesiojn, aĝojn kaj seksojn, tamen ni uzis la komunan lingvon — Esperanton. Pere de ĝi ni libere interŝanĝis pensojn kaj tiel amikiĝis. Mi kredas, ke kun senĉesa disvolviĝo de la internacia turisma afero kaj kun ĉiam pli oftigantaj scienca, teknika kaj kultura interŝanĝoj kaj pro tio ke diverslandaj popoloj havas bonan deziron pluapase interkompreniĝi, Esperanto nepre estos komprenita de pli kaj pli multaj homoj kaj ludos pli grandan rolon de ponto.

La Tibeta Medicina Instituto

La nomita lernejo estas la unua medicina instituto en la Tibeta Altebenajo. Ĝi havas fakultatojn de kuracado, farmacio, tibeta medicino kaj higieno kun kvin-jara lernosistemo. La instituto ne nur kulturas tibetanajn kuracistojn, sed ankaŭ faras sciencajn esplorojn pri oftaj kaj ripetemaj malsanoj kaj pri altmonta fiziologio kaj altmontaj malsanoj.



Tibetana studentino en studo

Tibetana kaj hanaj instruistoj diskutas instrumaterialon.





Studentinoj kolektas drogherbojn por fari specimenojn.

Instruisto donas lecionon pri anatomio.



Studentoj faras gimnastikajn ekzercojn.



La ĉin-medicina apoteko Tongrentang



Tiu fama apoteko en Beijing jam havas historion de pli ol 300 jaroj. Ĝi vendas ĉinajn drogojn kaj produktas bonkvalitajn pilolojn, pulvo-rojn, medikamentojn kaj plastrojn. Ili estas tre sanigaj kaj havas debiton en kaj ekster la lando.


Fotoj de REN REN

Pesado de drogoj




Tongrentang

Kvin valoregaj ĉinaj drogoj




Hipokampo (*Hippocampus japonicus*) (Ĝi servas por fortigi renojn kaj kuraci furunkon.)



Brila ganodermo (*Ganoderma lucidum*) (Ĝi servas por kuraci neŭrastenion.)



Flavlanugaj junaj kornoj de cervo (Ili utilas al renoj kaj vira gener-organo kaj servas por fortigi korpon.)



Sovaĝa ginsengo (Ĝi servas por kvietigi nervojn kaj fortigi memopovon kaj korpon.)

Tigr-osta tonika vino (Ĝi servas por kuraci reŭmatismojn kaj sensentecon de la kvar membroj.)



Senĉese Batalu por Forigi Diskriminacion

Kamarado Zen Hojaŭ, membro de la ĉina delegacio al la 65-a Univerŝala Kongreso de Esperanto, faris paroladon en la kunveno pri la kongresa temo. Jen estas plena teksto de lia parolado.

— La Red.

Estimata sinjoro prezidanto,
Estimataj gesamideanoj,

Kiel ĉina esperantisto, mi tre ĝojas partopreni en la diskuto pri diskriminacio en la Sesdek-kvina Kongreso. En la unuaj internaciaj Esperanto-kongresoj la kongresa temo estis pure Esperanto. Nun ĝi pritraktas jam ĝeneralajn problemojn de la mondo. Tio estas tute normala kaj necesa tendenco de evoluo. La neŭtraleco de la Esperantomovado ne signifas apartiĝon disde la praktiko, nek indiferenton pri la aktuala vivo. Kaj efektive, de sia naskiĝo Esperanto portas belan idealon, por ke la homaro forigu diversajn malharmoniojn kaj konstruu racian kaj belan mondon en paco kaj harmonio.

Ni propagandas Esperanton por profundigi la amikecon inter la popoloj de la mondo kaj akceli iliajn interkompreniĝon kaj kunlaboron. Sed, kiam iu ajn speco de diskriminacio ekzistas en la homa socio, nenia malharmonio inter homoj mal-

aperos, se ne paroli pri efektiviĝo de interkompreniĝo kaj amikeca kunlaboro.

Ni scias, ke ĉia diskriminacio havas sian socialan, politikan aŭ ekonomian fonton. Sen forigi tiajn fontojn oni ne povas tute nenigi iun ajn aspekton de diskriminacio. Ekzemple, la kontraŭvirina diskriminacio estas problemo ekzistanta de longe, deveninta de la patriarka socio, kiam la virinoj seniĝis je la egaleco en ekonomio kaj en familio. Nur batalakirinte al la virinoj egalan rajton en ekonomio, politiko kaj socio, oni povos elradikigi kontraŭvirinan diskriminacion. Kaj rilate al la kontraŭnigrula diskriminacio, ĝin la koloniismo kaŭzis. Nigruloj vendiĝis kiel sklavo, plene seniĝitaj je ĉiu homa rajto kaj tial, kompreneble, estis mistraktataj. La popoloj en la nigrula Afriko faris longedaŭran batalon, fine gajnis la ŝtatan sendependecon unu post alia kaj akiris rajton pri la egaleco; rezulte de tio, la diskriminacio kontraŭ ili certe



Zen Hojaŭ

pli kaj pli likvidiĝos. Tiuj afrikaj landoj, kompreneble, kiel ceteraj landoj de la tria mondo, havas la problemon disvolvi sian nacian ekonomion. Nur se ili bone solvos tiun problemon, ili povos atingi sendependecon en ekonomio, vere akiri internacian egalecon kaj definitive forigi la diskriminacion kontraŭ ili.


Ni ĉinoj bone konas la sencon de diskriminacio, el nia propra travivaĵo. La kvinmil-jara historio de Ĉinio estis tia, por la popolamaso, longa historio de subpremado, ekspluatado kaj molestado fare de la sklava sistemo, feŭdismo kaj moderna koloniismo. La ĉina popolo suferadis ĉian specon de humiligo, do ĉian diskriminacion. La ĉina popolo brave bataladis por malaperigi la maljustajn sistemojn kaj forigi diversajn mis-



S-ro Grégoire Maertens



S-ro Renato Corsetti



S-ro Baldur Ragnarsson



D-rino Flora Szabó-Felső

Saluton al Nova Estraro de UEA

Stariĝis nova estraro de UEA dum la 65-a Universala Kongreso. Kiel antaŭe, ĝi konsistas el ok personoj, nome s-ro Grégoire Maertens (Prezidanto), s-ro Renato Corsetti (Vicprezidanto), s-ro Baldur Ragnarsson (Vicprezidanto), d-rino Flora Szabó-Felső (Ĝenerala Sekretario), kaj aliaj estraranoj d-ro

Humphrey Tonkin, s-ino Ursula Grattapaglia, s-ino Eliza Kehlet, kaj s-ro P. Todorov.

Ni sendas al ili sincerajn gratulon, saluton kaj bondezirojn!

**Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de EPĈ**

traktojn. Fine, antaŭ tridek jaroj, la ĉina popolo gajnis sendependecon, akiris emancipiĝon kaj fondis sian respublikon! Dank' al la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, oni forigis iom post iom diversajn diskriminaciojn. Ekzemple, la ĉininoj, kiuj estis kruele molestataj en la pasinteco, nun rimarkinde leviĝis pozicie. Estas popola diro, ke virinoj povas subteni duonon de la ĉielo. Tiu ĉi figura diro bone spegulas la realon en nia lando. En Ĉinio troviĝas ne nur vic-ĉefministrio, sed ankaŭ ambasadorino, kaj interalie mi citu, ke la ĉina ambasadorino en Nederlando estas tre kapabla kamaradino. Virinoj laboras en ĉiu posteno de nia lando, escepte de tia posteno, en kiu virino ne taŭgas pro fizika kialo. Ĉinio estas lando kun multe da naciecoj. La

han-nacieco havas superecon en ĉiuj sferoj, tial historie etna diskriminacio ekzistis en Ĉinio. Post la fondiĝo de la Popola Respubliko, oni faris multe da laboroj por efektiviĝi la nacian egalecon kaj nacian unuiĝon. Oni disvolvis kaj disvolvas la ekonomion, kulturon kaj lingvon de la nacimalplimultoj, ĉar la altiĝo de la ekonomia kaj kultura nivelo ebligas al ili akiri veran egalecon, ebligas forigi plene diskriminacion de hanoj kontraŭ nacimalplimultoj. Kompreneble, ni devas labori ankoraŭ pli multe en ĉi tiu flanko. Eĉ nun la ekonomio kaj kulturo de la nacimalplimultoj restas postĝintaj kompare kun tiuj de la han-nacieco. Tio signifas, ke fakte neegaleco ankoraŭ ekzistas. Por forigi ĝin, almenaŭ paŝo-post-paŝe, ĉiuj naciecoj devas kune penadi en konsiderinde

longa tempo kaj helpi sin reciproke.

Mi estas esperantisto, mi do amas justecon, oponas al ĉiu maljusta diskriminacio; mi estas ĉino, mi bone scias do pri la neceseco kaj malfacileco de la batalo kontraŭ diskriminacio. Laŭ mia opinio, ĉiuj esperantistoj devus esti batalantoj kontraŭ diskriminacio. Cetere estas necese koni, ke oni ne povas akiri venkon de kontraŭdiskriminacia batalo en mallonga tempo. Tial oni devas fari firman kaj konstantan batalon. Ni ĉinaj esperantistoj volonte luktos kune kun esperantistoj-amikoj en la tuta mondo por forigi diversajn diskriminaciojn kaj realigi la belan idealon de Esperanto.

Mi kore deziras sukceson al nia Kongreso!

Dankon!

DANKO KAJ ESPERO

En la n-ro 10 ni jam raportis, ke la Komitato de UEA pasigis la rezolucion pri akcepto de la Ĉina Esperanto-Ligo kiel ĝia asocia membro, je la 5-a de aŭg. Tuj post tio k-do Zhang Qicheng, reprezentanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris mallongan paroladon. Jene estas la tuta teksto.

LA RED.

Estimataj gekolegoj:

Okaze de la formala aliĝo de Ĉina Esperanto-Ligo al UEA kiel ĝia asocia membro, bonvolu permesi al mi, kiel reprezentanto de la ligo, paroli 2-3 minutojn.

Antaŭ ĉio, mi kun granda plezuro, en la nomo de nia ligo kaj

ankaŭ de la ĉina esperantistaro, sincere salutas kaj dankas ĉiujn estraranojn kaj komitatanojn de UEA, kiuj multe nin helpis por la efektiviĝo de nia aliĝo.

Plie, mi ankoraŭfoje deklaras, ke post sia membriĝo, nia ligo nepre respektos la statuton de UEA inkluzive la paragrafon pri neŭtraleco. Ni pli intime kunlaboros kun la universala asocio, kun aliaj esp-organizaĵoj kaj esp-aj fakaj asocioj de diversaj landoj por nia komuna afero.


Kvankam ĉina esp-movado multe progresis dum la lastaj du jaroj, tamen ni volas fari pluajn klopodojn por pliintensigi nian por-esp-an laboron, kaj ankaŭ por plibonigi nian per-esp-an aferon. Ni kredas, ke la disvastigado kaj praktikado de Esperanto en tia vasta kaj dense

loĝata lando kia Ĉinio nepre certagrade kontribuos al la movado ĝenerale.

Ni bone scias, ke Esp-movado estas movado mondskala, ĝi ne povas resti afero de unu sola lando. Nia sperto elokvente pruvigas, ke la prosperiĝo de ĉina Esp-movado multe dependas de la progreso de nia movado en la tuta mondo. Nur dank' al la sindona helpo, kunlaboro kaj apogo de UEA kaj diverslandaj esp-istoj, ni povis akiri riĉan rikolton. Mi do esperas, ke ĉiuj komitatanoj kaj funkciuloj de UEA donos al ni pluajn helpojn, konsiderante ke la sukceso de ĉinaj esp-istoj ankaŭ estas sukceso de tutmonda esp-istaro. Kaj por tio mi elkore dankas vin ĉiujn anticipe.

Dankon!

Amuzaj kaj Folklore Interesaj Ankaŭ Lingve Instruaj



118×185mm. 94 paĝoj
 Numero: 10Es-442P
 Prezo: £0.45 US\$0.90

La naŭdek-paĝa kolekto da mallongaj "Rakontoj pri Fantom-spitantoj" prezentas speciale ĉinan trajton de la preskaŭ ĉie en la mondo trovebla superstiĉo pri fantomoj, t.e. spiritoj de mortintoj, kiuj jen kaj jen sin montras, minace kaj malice, al la homoj ankoraŭ vivantaj. Kiel ĉe ni, ankaŭ en Ĉinio ilia aperado ektimigis — siatempe! — tiujn vivantojn terure, korfrostige. Nur tre malofte spite ilin iu aŭ alia bravulo, pruvante, ke fantomoj estas en vero stultaj

kaj sen potenco. Ankaŭ komika trajto karakterizas, do, la raportojn aŭ rakontojn, el diversaj fontoj ĉi-tie ĉerpi-tajn. Ili pruviĝas, cetere, ne nur amuzaj kaj folklore interesaj, sed en sia Esperanta versio dank' al klara, korekta flueco ankaŭ lingve instruaj. Deko da bonaj, baroksimile ĉinaj tuĉ-desegnaĵoj plie rekomendas la broŝuron por uzo kiel malgranda, tamen dece plaĉa donacaĵo.

Dr. KARL BECKMANN,
 Wien

Mendu ĉe peranto de EPC aŭ ĉe Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Reformo de la ekonomia administra sistemo de Ĉinio

EN 1979 Ĉinio komencis reformi sian ekonomian administran sistemon kun pliigo de memdecidaj rajtoj de la entreprenoj kiel ĉefa enhavo. Ĝis la lasta junio, 6,600 entreprenoj plenumis tian reformon kaj ili konsistigas 16% de la totala nombro de la tutpopolaj entreprenoj de Ĉinio. La praktiko montras, ke oni jam atingis sukcesojn ĉi-rilate kaj trovis vojon por efektiviĝi la kvar modernigojn de la lando kaj la internan movforton por la socialisma ekonomia konstruado.

I

En la komenca periodo post la fondiĝo de la popola respubliko, Ĉinio imitis la ekonomian administran sistemon praktikitan de Sovetunio en la periodo de Stalin. Tiu sistemo karakteriziĝis per emfazo de koncentriteco kaj unueco, t.e. la centra registaro ellaboris imperativajn planojn, kiujn devis plenumi ĉiuj regionoj kaj ĉiuj entreprenoj. En financo oni alprenis la metodon de unueca en- kaj elspezado. Oni devis liveri ĉiujn financajn enspezojn al la ŝtata kaso, escepte de tiu parto laŭplane asignita al la entreprenoj. En distribuo de produktaĵoj oni plenumis laŭplanan asignon de produktaĵaj rimedoj kaj aĉeton kaj vendon de la produktitaj vivbezonaĵaj industriaĵoj monopoligi-

tajn de la ŝtato. Dum la plenumado de la unua kvinjara plana ekonomia administra sistemo ludis gravan rolon por garantii la ĉefajn konstruadojn, racie disponigi materialojn, ŝanĝi la pozicion de industrioj kaj starigi la industrian bazon.

Tamen kun disvolviĝo de la socialisma ekonomia konstruado de nia lando, pli kaj pli evidentiĝas la mankoj de la ekonomia administra sistemo, kiuj montriĝas ĉefe en tio, ke oni tro multe centralizas la povon, ne rekonas la necesan sendependecon de la socialisma entrepreno, senbride uzas la rimedojn de rekta decido kaj administracia interveno de la ŝtata potenco (la centra kaj la loka), malebligante al la entrepreno starigi sian sendependan produktan komandon kaj administran sistemon, kaj mastrumas la ekonomion ne laŭ la leĝo, bezono kaj rolo de la ekonomiaj aktivecoj mem nek per la moderna scienca metodo. Rezulte de tio la produktado kaj mastrumado de la entrepreno ne havas internan movforton por sia disvolviĝo, la aktiveco, iniciativo kaj kreiveco de laboruloj estas katenitaj kaj la supereco de la socialisma sistemo ne povas esti plene disvolvita. Tial estas necese fari kompletan reformadon al la nuna ekonomia administra sistemo, por ke la ekonomiaj rilatoj de tutpopola

posedsistemo (ankaŭ de kolektiva posedsistemo) estu konformaj al la postulo de la disvolviĝo de la nunaj produktaĵaj fortoj.

Nun Ĉinio entreprenas reformadon de la ekonomia administra sistemo unuflanke por plifortigi laŭplanan administradon de la nacia ekonomio kaj sinteze ekvilibrigi la tutan nacian ekonomion por garantii la laŭplanan disvolviĝon de la nacia ekonomio, kaj aliflanke por pliigi rajtojn de la lokoj, precipe tiujn de la entreprenoj, kaj praktiki demokratian administradon. Tiel oni devas mastrumi ekonomion plie per ekonomiaj sed malplie per administraciaj rimedoj. En produktado kaj cirkulado de komercaĵoj oni devas meti grandan atenton al la leĝo de valoro. En distribuo oni devas praktiki la principon "al ĉiu laŭ lia laboro". Unuvorte, oni devas obei la objektivan ekonomian leĝon.

II

Reformado de la ekonomia administra sistemo devas komenciĝi de entrepreno kiel baza produkta unuo, t.e. oni devas meti sur la ĉefan lokon la interesojn de la rekta produktanto — entrepreno — kaj pliigi ĝiajn memdecidajn rajtojn. Se nur tiu problemo estos solvita,

la nunaj ekonomiaj rilatoj povos esti konformaj al la postulo de la disvolviĝo de la produktaj fortoj. Kial do la malnova ekonomia administra sistemo katenas la disvolviĝon de la produktaj fortoj? Kaj kiaj ŝanĝoj okazis post pliigo de memdecidaj rajtoj de entreprenoj?

Unue ni traktu la problemon de produktado kun la Sichuan-a Unua Ŝpin-teksta Fabriko kiel ekzemplo. En la pasinteco, kion, kiel kaj kiom ĝi produktis, tion decidis la ŝtata plano, kaj la fabriko havis nenian memstarrecon. Rezulte de tio, iuj produktajoj havis malgrandan debiton kaj devis kuŝi en tenejo, kaj aliaj multe bezonataj produktajoj ne trovis kontinuan vendadon pro sia malgranda produktokvanto. Post pliigo de memdecidaj rajtoj, la fabriko, krom plenumi la ŝtatan planon, ankaŭ plimultigis novajn specojn laŭ la bezono de la merkato. Ĝi projektis kaj produktis tiujn novajn specojn, kaj difinis iliajn prezojn laŭ la aĉetpovo de plejparto de la konsumantoj. Tial la produktajoj trovis grandan debiton.

Koncerne al la cirkulado, antaŭe la ŝtato laŭplane liveris al la entreprenoj la ekipaĵojn, krudmaterialojn, hejtajon kaj elektron kaj monopole aĉetis kaj vendis iliajn produktajojn laŭ la prezoj difinitaj de la ŝtato. Post pliigo de memdecidaj rajtoj, ĉu liverado ĉu vendado fariĝis fleksebla. Ekzemple, en 1979 la Chongqing-a Zhongnan-a Kaŭĉuka Fabriko ricevis de la ŝtato gumon en reduktita kvanto, kiu ne povis kontentigi ĝian bezonon en produktado. Akirinte memdecidajn rajtojn, la fabriko kontaktiĝis kun koncernaj entreprenoj de aliaj lokoj kaj akiris preskaŭ trionon de la krudmate-

rialo bezonata por la tuta jaro. Rezulte, la profito de la fabriko duoble kreskis en 1979 kompare kun tiu planita.

Rilate al la distribuo, antaŭe la ŝtato postulis ĉiujn enspezojn de la entreprenoj, kaj la ŝtata financo kovris ties elspezojn. La ŝtato asignis monon ne nur por reproduktado sed ankaŭ por salajroj kaj premio. Nun la enspezo de la entreprenoj, krom la parto donita al la oficistoj kaj laboristoj por konsuma celo, estas distribuita inter la ŝtato kaj la entreprenoj laŭ proporcio. Tial la produktokvanto, la kvalito de la produktajoj kaj la konsumo de krudmaterialo dum la produktado rekte influas la enspezojn de la entreprenoj mem. Havante disponeblan monsumon, la entreprenoj povas disvolvi produktadon kaj levi la kolektivon bonstaton de la oficistoj kaj laboristoj kaj pliigi ilian premion. Ekzemple, la Chongqing-a Dua Trika Fabriko aĉetis en la pasinta jaro 80 ŝtrumptrikajn maŝinojn per la monsumo ricevita de la enspeza distribuo, kiuj havigis al tiu fabriko 630,000 juanojn da profito en la jaro. Krom uzi parton de la profito por plivastigi reproduk-

tadon, la fabriko elspezis 150,000 juanojn el ĝi por konstrui loĝdomojn de laboristoj.

Ĉar la entreprenoj havas memdecidajn rajtojn, ili ĉiamaniere reduktas sian produktokoston ĝis sub la meznombra nivelo de la socio por akiri kiel eble plej multe da profito, tiel ke ekviiis la prezo de komercaĵoj kaj aperis konkurenco inter entreprenoj. Nun en ĉinaj urboj oni jam povas trovi afiŝtabulojn kaj foirojn de diversaj artikloj, kaj ĉinaj ĵurnaloj, gazetoj kaj televiziaj stacioj aperigas aŭ elsendas afiŝojn pri diversaj artikloj. Ĉio tio ja klarigis la problemon. Sed la konkurenco inter ĉinaj entreprenoj kiel korporacioj de laboruloj diferencas de tiu inter kapitalistoj en la burĝa socio. Ĝi servas al la kolektivaj interesoj de laboruloj kaj por akceli reformadon kaj teknikan renovigon de la entrepreno, kaj ĝi estis iniciatita de la registaro kaj ne povas kaŭzi bankroton de la entrepreno kaj senlaborecon.

III


Oni pliigas memdecidajn rajtojn ne nur en la ŝtataj entreprenoj
(Daŭrigota sur la 47-a paĝo)

Ĝojinda Informo

Ekde la 31a de oktobro, 1980, Radio Pekino komencis elsendi ĉiutage programojn en Esperanto speciale al Latinameriko. Jen la horaro kaj frekvencoj de la Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino al Latinameriko:

Pekina Tempo	GMT	Ondoj (m)	kHz
		32.0	9365
6:30-7:00	22:30-23:00	25.7	11650

En
kombinato
de agrikul-
turo, industrio kaj komerco



Riĉa rikolto de greno de la Dongxihu-a Agrikultura, Industria kaj Komerca Kombinato en 1980

Nun Ĉinio prove funkciigas kombinatojn de agrikulturo, industrio kaj komerco. Tio estas grava reformo de la agrikultura ekonomia sistemo farita por ŝanĝi la staton, ke ŝtataj farmejoj kaj popolaj komunumoj produktas nur agrikulturajn materialojn, por interligi produktadon, prilaboradon kaj vendadon kaj por efektiviĝi modernigon de agrikulturo. Tiaj kombinatoj karakteriziĝas per pligrandigo de memstareco en produktado kaj vendado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, unuigo de agrikultura produktado, prilaborado kaj vendado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, pliigo de enspezo kaj havigo de monrimedoj por disvolvo de agrikulturo. Tia kombinato diferencas de ordinaraĵoj kaj vendejoj. Ĝi ĉefe vendas siajn proprajn produktaĵojn kaj produktas agrikulturajn maŝinojn, kemisterkon kaj insekticidon servantajn al agrikulturo. Tial ĝi povas maksimume disvolvi sian ekonomian avantaĝon kaj akceli modernigon de agrikulturo. Ĉisube ni publikigas artikolon de nia raportisto pri tia kombinato.

La Red.

En la sezono de plena florado de jasmenoj mi venis al Wuhan, granda urbo en la meza parto de Ĉinio, kiu havas tri milojn da loĝantoj, kaj vizitis la Dongxihu-an Agrikulturan, Industrian kaj Komercean Kombinataton en ĝia nordokcidenta antaŭurbo. Tie estis regiono por enteni inundakvon de Changjiang (Jangzi)-rivero je 15 kilo-

metroj for de la centro de Wuhan. En 1957 la popolo de Wuhan kreis tie vastegan areon de novaj agroj kaj fondis 11 ŝtatajn farmejojn kun totala areo de 24,000 hektaroj. Vintre de 1978, oni fondis la nomitan kombinataton por eksperimento. Krom kamparo por greno, kotonoj kaj oledonaj vegetaloj, ĝi jam havas areon de 1,870 hekta-

roj por akvaj produktaĵoj, 2,700 hektarojn da ĝardenoj legomaj kaj fruktaj kaj 2,400 laktajn bovinojn. Samtempe ĝi funkciigas 65 mezgrandajn kaj malgrandajn fabrikojn, fakajn kompaniojn por vendi produktaĵojn en kaj eksterlande kaj 171 vendejojn en la kombinato mem kaj la urbo. Nun inter la pli ol 160 tiaj kombinatoj en la tuta lando

la Wuhan-a estas la plej granda.

FREŜA IMPRESO

En vasta kamparo de la kombinato parceloj bonorde kuŝas ambaŭflanke de ŝoseoj, kiuj kondukas al prilaborejoj de agrikulturaj kaj flankokupaj produktajoj de la farmejoj; laboristaj ruĝaj loĝdomoj elrigardas el fruktarboj kaj fiŝbasenoj trembrilas en la suno. La prospereco de la farmejo min impresis profunde. Vicĉefdirektoro de la kombinato Ran Qifa diris al mi, ke nun ili havas pli ol 2,000 abelsvarmojn, 130,000 porkojn, 45,000 kuniklojn, 120,000 anasojn kaj 10,000 porviandajn kokojn. Tamen min pli interesis tio, ke la meznombra hektara produktokvanto de greno de la farmejo atingis 7,275 kilogramojn kaj tiu de sensemigita kotono 1,155 kilogramojn, kiuj estas relative avangardaj niveloj de la tuta lando. En la sama vespero, kiam mi venis al la loko, ĝuste prezentiĝis televida programero pri riĉa rikolto de someraj grenoj de la farmejoj de la nomita kombinato, kun pliiĝo de produktokvanto je 30% kompare kun tiu de 1979.

Kamaradoj de la kombinato diris, ke la prosperecon de diversaj aferoj ili ŝuldas al fondo de la kombinato kun pligrandigita memstareco, kiu unuigis produktadon kaj vendadon kaj mobilizis aktivecon de la laboristoj kaj oficistoj.

Finplenuminte la taskon vendi al la ŝtato difinitan kvanton da agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, la kombinato rajtas vendi siajn produktaĵojn kaj ĝi ankaŭ rajtas fondi industriojn subtenantajn agrikulturon. En la pasinta jaro ili pro-

duktis sume 110,000 tunojn da greno. Post pago de agrikultura imposto al la ŝtato ili uzis 40,000 tunojn por breedi fiŝojn, kortajn birdojn kaj brutojn kaj produkti diversajn kukojn kaj vinon. Nun iliaj produktokvantoj de lakto, fiŝoj kaj legomoj konsistigas respektive 50%, 12% kaj 10% de la totalaj vendaj kvantoj en la merkato de Wuhan. Krome ili liveris al la merkato 18,000 tunojn da ladmanĝaĵoj, bombonoj, abelreĝina gelatenaĵo, sojfabaj produktaĵoj k. a. Boquan-farmejo sola ricevis 420,000 juanojn da profito per farado de frukta vino, kondensita lakto kaj ovajoj.

Vicĉefdirektoro de la kombinato Qiu Jusen ĝoje diris al mi, ke la totala produktovaloro de industrio de la kombinato jam konsistigas duonon de tiu de industrio kaj agrikulturo, kaj la nombro de la specoj de ĝiaj industriaj produktaĵoj atingis 400.

Rilate al aparta karakterizaĵo de industrio entreprenata de la kombinato li diris: “Krom prilabori niajn proprajn agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn kaj produkti agrikulturo-rilojn, fosforan sterkon kaj insekticidon, ni ankaŭ organizis laŭplane fakan produktadon.”

Li klarigis: “En iu el niaj farmejoj estas laktaĵa fabriko kun jara produktokvanto de 200 tunoj. Sed la tieaj laktaj bovinoj estas malpli multaj ol tiuj en aliaj farmejoj. Ni do decidis ‘unuigi’ ĉiujn farmejojn por ke la laktaĵa fabriko kolektu ilian freŝan lakton kaj faru el ĝi laktopulvoron. Krome nia kombinato starigis ankaŭ vitran fabrikon por produkti lakto- kaj vinbotelojn bezonatajn por nia manĝaĵa industrio, kiu havas konkurencan povon.”

Dank’ al utiligo de riĉfontoj kaj fondo de fabrikoj laŭ venda stato, la totala produktovaloro de industrio de la kombinato en la unua duonjaro de 1980 pliiĝis je 25% kompare kun tiu en la sama periodo de 1979, kio ebligis al la kombinato disponigi 10,000,000 juanojn da industria profito por disvolvi agrikulturon.

Ĉar la profito de la kombinato en 1979 plimultiĝis je 4,800,000 juanoj kompare kun tiu en 1978, plimultiĝis la enspezo de la laboristoj kaj oficistoj de la brigadoj produktantaj grenon. Mi vizitis Dengta-brigadon. Tie ĉiu laboristo monate enspezas meznombro 72 juanojn, sumon pli grandan ol salajro de ordinara laboristoj kaj oficistoj en urboj. En la jarfino iuj kamparanaj familioj eĉ ricevis po 2,000 juanojn kiel premion pro superplenumo de la planita produktokvanto.

Kamaradoj de la kombinato humore komparis ĝian agrikulturon kun “draka kapo”, ĝian industrion kun “draka korpo” kaj ĝian komercon kun “draka vosto”. Ili diris, ke en la kombinato agrikulturo ludas ĉefan rolon de produktanto de krudaj materialoj. Se disvolviĝas agrikulturo, la “draka korpo” industrio ekhavas riĉan nutroprovizon kaj sekve vigliĝas ankaŭ la “draka vosto” komerco. Tial ili oficiale elmetis en la kongreso de la laboristoj kaj oficistoj ekonomian principon “preni agrikulturon kiel bazon, almanĝaĵojn kiel centron, efektiviĝi la unuecon de agrikulturo, industrio kaj komerco kaj servi al la urbanoj”.

LA IRITA VOJO

Mia akompananto kun granda entuziasmo rakontis al mi pri la

irita vojo en la fondo de la kombinato.

“En 1958 kiam ni komencis fondi la farmejon, ni planis konstrui ĝin en bazon de almanĝaĵoj de Wuhan. Estis bedaŭrinde, ke tiam oni ne plenumis la principon ‘pli da enspezo por pli da laboro’ en la administrado kaj la aktiveco de laboristoj kaj oficistoj ne povis esti plene disvolvita.

“Nur en 1962 la farmejo komencis praktiki la politikon de fikso de produktokvanto, produktokosto kaj profito, kaj premio al tiuj kiuj superplenumis produktan taskon. Tio multe levis laboraktivecon. Tujare oni akiris riĉan rikolton de greno kaj rimarkinde progresis en brutobredado, forstumado, fiŝbredado kaj flankokupoj. En 1966 la produktokvanto de greno superis 100,000 tunojn.

“Sed en 1967 pro malhelpo de la maldekstrema pensfluo de Lin Biao, la socialisma principo distribui laŭ laboro ne povis esti bone efektivigita, kaj memstara produktado kaj vendado de agrikulturaj kaj flankokupaj pro-

duktaĵoj estis malpermesataj. Tiam oni tute ne konsideris pri produktokosto kaj la farmejoj malprofitis en administrado. Nur post la frakaso de la kvarpersona bando oni fondis la kombinaton, kiu ŝanĝis la staton kaj disvolvis sian produktan avantaĝon.”

Parolante pri la kombinato li diris: “Kun forpaso de la pordoferma politiko ni lernis sperton de la Agrikultura Kombinato de Beogrado en Jugoslavio, kiel ekzemple pri ĝiaj produktado kaj vendado de greno, viando, lakto, kortaj birdoj kaj ovoj, tamen ni havas niajn proprajn apartaĵojn en fondado de agrikulturila fabriko kaj ŝpinteksejo, fiŝbredado kaj scienca esplorado.”

FIŜBREDEJO KAJ ABELEJO


Informiĝinte, ke la kombinato konstruis kaj plivastigis fiŝbredejon kun areo de pli ol 300 hektaroj kaj produktokvanto de 2,250 tunoj da fiŝoj, mi iris viziti ĝin en serena tago. Tie oni mikse bredas nigran karpon, blankan karpon (*Hypophthalmichthys moritrix*), herbokar-

pon (*Ctenopharyngodon idellus*) kaj grandkapan fiŝon (*Aristichthys nobilis*). Mi venis al la lago, kiu estas dividita en multajn kvadratajn basenojn. Al iuj basenoj, kie la breditaj fiŝoj estas tre multaj, oni instalas oksigendonon maŝinon. Kiam la maŝino ekfunkciis, ĝi levis ondojn. Kaj kiam bredistoj disjettis en la akvon nutraĵojn, fiŝoj tuj saltis supren por kapti la jetitaĵojn.

Vicestro de la fiŝbredejo kamarado Xiao diris, ke ili hibridigis karpojn de Heilongjiang kun tiuj de Jiangxi kaj sukcese elkulturis novan specon de karmo kun delikata bongusta viando. Tiu speco kreskas duoble pli rapide ol la ordinara. Post duonjaro ĝi jam pezas 1 kilogramon.

En la kuranta jaro la totala produktokvanto de fiŝoj pliiĝis je 24% kompare kun tiu de la pasinta jaro, dank’ al ilia alprenado de nova principo bredi fiŝojn unue en la artefaritaj fiŝbasenoj kaj kapti fiŝojn per reto kun maŝegoj. En la pasinta jaro krom vendo de difinita kvanto da fiŝoj al la ŝtato, ili mem vendis

La Dongxihu-a Agrikultura, Industria kaj Komerca Kombinato kunligas porkobredadon kun fiŝbredado por pliiĝi la produktokvanton de fiŝoj.



vivajn fiŝojn en siaj propraj butikoj en Wuhan, kio estis varme akceptata de la urbanoj.

Mi vizitis ankaŭ Sandian-farmejon kies abelbredado havas grandan konkurencon povon. La de ĝi produktita abelreĝina gelato atingis tiujn de fama marko ne nur en koloro, gusto kaj odoro, sed ankaŭ en pakado. Tial ili faris en 1980 kontraktojn kun valoro de miliono da juanoj kun aliaj lokoj kaj samtempe akceptis mendon de 6 tunoj da freŝa mielo fare de Xianggang (Hongkong).

Oriente de la abelejo troviĝas la monto Shuihu, kiu estis kalva en la pasinteco. Sur ĝi oni plantis 200 hektarojn da fruktaj arboj kaj tearbetoj. Nun ĝi fariĝis monto verda kaj fruktoriĉa.

En la farmejo ĝardenisto Huang Dehuan rakontis al mi pri ilia sukcesa greftado de lagenario kun akvomelono. Tio estas efika rimedo kontraŭ velkiĝa malsano de akvomelono. Li diris, ke la folioj de lagenario surhavas lanugetojn, kiuj malhelpas vaporigon de la akvo. La hibridigita akvomelono havas radikon, kaj donas fruktojn kun multe da suko sukeroza. Por kontentigi la bezonojn en la

merkato ili jam kulturis 700 hektarojn da akvomelono.

VIGLAJ BUTIKOJ

Lastatempe en- kaj eksterlandaj pasaĝeroj en la ĉinaj aviadiloj ĝuis kun laŭdoj maldikan, fragilan kaj bongustan sezaman kukon. Ĝi estas produktita de la kombinato de Wuhan. Por vendi siajn produktaĵojn la kombinato starigis, sur ĉefaj stratoj de Wuhan, butikojn, manĝejojn kaj drinkejojn. Iuj el ili kaj produktas kaj vendas kaj aliaj servas samtempe kiel gastejoj kaj sin okupas pri vendado de freŝaj floroj kaj fruktoj.

Mi venis al vendejo de la kombinato sur la Nacia Strato. Ĝia teretaĝo servas por podetala vendado kaj la unua etaĝo por pogranda. Kiam mi eniris en la butikon, mian nazon frapis forta aromo de manĝaĵoj. Tie en la vitra vendŝranko estas montrataj pli ol 120 specoj de bombonoj, kukoj, ladmanĝaĵoj, spicoj, ŝinkoj, peklita seka viando k.a. Ĉiuj tiuj manĝaĵoj estas produktaĵoj de la 11 farmejoj de la kombinato.

“Kiel iras via negoco?” demandis mi al administranto de la vendejo kamarado Rong.

“En la unua duono de la kuranta jaro sole ni jam vendis manĝaĵojn kun valoro de 1,120,000 juanoj kaj akiris per tio 36,000 juanojn da neta profito,” respondis Rong. “Kvankam ni devas vendi al la ŝtato parton de niaj produktaĵoj, tamen la alia parto de la produktaĵoj ankoraŭ havas forton por konkurenco.”

Mi venis al Cihui-vendejo, kies antaŭa parto servas kiel vendejo, meza parto kiel drinkejo kun pli ol 20 tabloj kaj posta parto kiel manĝaĵa prilaborejo. La talenta direktorino de la vendejo He Fenfang kondukis min por rigardi ĝian fridigan tenejon kun areo de 18 kvadrataj metroj, ĉar ĉiutage la vendejo vendas 30 salitajn kuniklojn eĉ en somero. Ŝi diris, ke klientoj tre ŝatas rizan vinon produktitan de la kombinato, eĉ urbanoj de Wuchang trans la rivero venis por ĝui ĝin malgraŭ longa distanco.

Tiuj vendejoj estas malgrandaj, plejparte kun areo de cent kvadrataj metroj, tamen havas multajn klientojn — tio signifas, ke ili havas grandan konkurencon forton.



La Dongxihu-a Agrikultura, Industria kaj Komerca Kombinato de Wuhan liveras al merkato kalkokonservitajn anasovojn.

**LA UNUA RISORTA SOKLO POR
TURBINA GENERATORA
KOMPLETO EN ĈINIO**

La nomita risorta soklo estis sukcese instalita kaj lanĉita en Henan-provinco. Ĝia pli-ol-600-hora funkciado montris, ke ĝi atingis la postulon de la projekto. La soklo por turbina generatora kompleto kun granda kapacito estas unu el la gravaj sciencaj kaj teknikaj esploraj objektoj difinitaj de la Ministerio de Elektro-energia Industrio en 1978-1985. Tiu soklo povas izoli la tremon kaj mildigi la premon de la generatora kompleto al la bazo dum ĝia funkciado. Uzante tian soklon oni povas ŝpari ĉ. 20% de kruda materialo en la fundamenta konstruado.


**ĈINIO HAVAS 128,000
ŜOSEAJN PONTOJN**

Nun tiuj ŝoseaj pontoj havas totalan longecon de 3,280,000 metroj. 90% de ili estas longedaŭraj.

Antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio troviĝis neniu ponto super Changjiang (Jangzi)-rivero. Nun krom du pontoj duoble uzataj por fervojo kaj ŝoseo en Wuhan (Vuhan) kaj Nanjing (Nankino), alia ŝosea ponto super tiu rivero konstruiĝis en Chongqing (Ĉongking) en la lasta julio. Tiu ponto el antaŭpremita armita betono havas longecon de 1,100 metroj, larĝecon de 21 metroj kaj ĉefan spanon de 174 metroj.

En la pasinteco sin trovis nur en Lanzhou (Langōu) unu ŝosea ponto super Huanghe (la Flava Rivero), la dua granda rivero de Ĉinio. Nun super ĝi jam estas pli ol 30 ŝoseaj pontoj.

Kun la disvolviĝo de ŝosea konstruado stariĝis lastatempe 2 grandaj ŝoseaj pontoj, inter kiuj estas la dua granda ŝosea ponto de Ĉinio kun longeco de 2,000 metroj super Hanjiang-rivero en Hubei-provinco. Nun la Luzhou-a Ponto super Changjiang en Sichuan (Siĉuan), la Gezhouba-a Ponto super Changjiang en Hubei kaj la Jinan (Ginan) -a Ponto super Huanghe estas en konstruado. Ili ĉiuj estas ŝoseaj.



*Ŝosea ponto en
Wumeng-montaro*

**PLI RAPIDOS LA KONSTRU-
ADO DE HAINAN-INSULO**

La ekspluato de nia riĉa Hainan-insulo jam eniris en novan etapon. La Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio decidis, ke de la venonta jaro la centra registaro kaj la aŭtoritato de Guangdong-provinco ĉiujare disponigos al ĝi 225,000 tunojn da greno por ke la lasta povu koncentriĝe kultivi kaŭĉuk-, kokoskaj kaf-arbojn, kokaon, piprarbedon, sudajn kuracherbojn, parfumajn plantojn kaj aliajn altvalorajn tropikajn plantojn kaj arbojn, kaj turni sin en bazon de tiaj produktaĵoj en nia lando.

**GRANDA PLIPRODUKTO DE
ĈINIO EN BRUTOBREDADO**

Multe kreskis en Ĉinio la nombro de porkoj, ŝafoj kaj aliaj grandaj brutoj en la kuranta jaro. En la unua duonjaro de 1980 la porkoj en la tuta lando jam sin nombris je 314,000,000, t. e. je 1.5% pli multe ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. La nombro de ŝafoj atingis 206,100,000, t. e. je 8.4% pli multe ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Kaj la totala nombro de bovoj, ĉevaloj, azenoj, muloj, kameloj kaj aliaj grandaj brutoj atingis 95,250,000, t. e. je 1.1% pli multe ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. La kuranta jaro estas unu el la lastaj tri jaroj, en kiu ili havas la plej altprocentan pliiĝon.

**BEIJING-AJ ISLAMANOJ FESTIS
LA FASTOĈESIGON**

En la dua tagdeko de aŭgusto pli ol 6,000 beijing-aj islamanoj kolektiĝis en du moskeoj por festi la tagon de fasto-ĉesigo. Ĝi estis la plej granda en nombro de la partoprenantoj de la festo post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949.

La feston ĉeestis pli ol 300 fremdlandaj islamanoj en Beijing. Ĝin ĉeestis ankaŭ prezidanto de la Ĉina Islama Asocio Zhang Jie kaj aliaj.


La fasto-ĉesigo estas unu el la du ĉefaj islamaj festoj. En la fasto, t. e. en Ramadano, la islamanoj devas strikte fasti dum ĉiuj ĝiaj taghoroj, kaj estas permesate manĝi nur en nokto. En Beijing troviĝas sume 160,000 islamanoj.





Fotoj de YAN JIN

Ŝtona Arbaro



Verdaj rokoj








Groteskaj rokoj




Monto kovrata de arboj kaj floroj


Jianfeng-baseno



La Ŝtonarbara Lago



"La Natura Antikva Fortikajo"



La roko "Birdokiso"

Vojaĝo al la Ŝtona Arbaro de Lunan

de WANG JUN

LA Ŝtona Arbaro de Lunan estas fama en la ĉinaj sennombraj vidindejoj pro siaj diversformaj figuroj. La surskribo de antikvulo "Mirindaĵo de la Naturo" ĉizita en giganta ŝtonmuro estas trafa rimarkigo pri la spektaklo.

En la frua mateno ni ekveturis per aŭto de Kunming, ĉefurbo de Yunnan-provinco, kaj post veturado de 120 kilometroj sudorienten ni atingis la gubernion Lunan. Antaŭniaj okuloj prezentiĝis malproksime verdaj montoj kaj densa arbaro. Nur kiam la aŭto proksimiĝis al la loko, ni trovis, ke la densa arbaro estas efektive sennombraj ŝtonaj pintoj kaj kolonoj. Ĝuste pro tio ĝi ricevis la nomon Ŝtona Arbaro.

Trapasinte arkponton, ni venis en la belan pitoreskejon de la Jada Lago. Maldekstre de la ponto pompe disfloris lotusfloroj en lago; kaj dekstre de ĝi ombroj de ŝtonaj pintoj tremetis en ondetoj de smeralda akvo; kaj grandaj ŝtonaj lotusfloroj kvazaŭ flosis sur akvo. La bordoj de la lago estis ombrataj de plorsalikoj kaj sakuroj. Sidante sur mola gazono, oni ebriiĝis de la natura pejzaĝo. Ascendante laŭ la ŝtuparo de la digo de la lago, oni povas atingi la Leonan Basenon kun balustradoj en tri flankoj. Ĉe ĝia bordo troviĝas vasta pavilono



kie oni vendas glaciaĵojn kaj teon. Se oni grimpas laŭ la baseno, oni povas atingi la Leonan Pavilonon, la kulminon de la Ŝtona Arbaro. Rigardante foren de la pavilono, oni vidas, ke ŝtonaj arbaroj etendiĝas ĝis la horizonto, iuj similas al antikvaj kasteloj protektataj de sennombraj soldatoj, aliaj al modernaj altaj domoj.

La gvidisto klarigis al ni: "La ŝtonaj arbaroj havas vastan areon. Llia areo en la gubernio Lunan atingas 300 kvadratajn kilometrojn. La ŝtonarbara pitoreskejo estas nur malgranda, sed tre bela parto de la vasta ŝtona arbaro, kun areo de 80 hektaroj dividitaj en tri pitoreskejojn: Jada Lago, Granda kaj Malgranda Ŝtonarbaroj."

Pliparto de la turismaj lokoj, la Leona Baseno kaj la Jada Lago estas konstruitaj post la Liberiĝo. La Leona Baseno estis malnova sidejo de la Templo de Monta Dio. La Jada Lago estis malprofunda baseno. Poste oni ĝin larĝigis, kaj profundigis, kondukis al ĝi klaran


fontoakvon, kaj tiel iom post iom formiĝis la hodiaŭa pitoreskejo.

Descendinte sudorienten de la Leona Pavilono, oni eniras en la plej belan lokon de la Ŝtona Arbaro — la Grandan Ŝtonan Arbaron.

En la mezo de la vasta gazono horizontale staras giganta ŝtonekrano. El ĝi kreskas kelkaj ĉiam verdaj arboj, kiuj kvazaŭ reliefaĵoj donas al ĝi vivecon. Ĉe la fino de la gazono ŝtonaj kolonoj staras kiel arbaro. Ni iris en la profundejon de la arbaro kaj rimarkis, ke sur iu rokmuro estas gravuritaj vortoj "Ŝtona Arbaro", tie estas la centra loko de la pitoreskejo. Ĉirkaŭ la gazono disfloras aromaj osmantoj. En la ĉirkaŭaĵo la belaj ŝtonpintoj leviĝas al la blankaj nuboj, kaj oni sentas grandan ĝuon rigardante la pejzaĝon.

Antaŭen irante laŭ zigzaga vojeto, ni venis en tre mallarĝan trapasejon inter du montpintoj, kiuj portas sur si gigantan rokon. Super nia kapo rapide flugis nuboj, ĉe la randoj de la rokmuroj hurlis vento kaj balancadis arboj, kvazaŭ rokego estus tuj falonta. Oni diras, ke la rokego estas portata de la montpintoj jam pli ol mil jarojn.

Trapasinte kelkajn pordegojn de la kaverno ni venis al la ŝtonĉam-



La ŝtonoj "Patrino kaj Filo"

bro natura, super kies pordo estas gravuritaj vortoj "Prefere iom loĝu ĉi tie". En la ŝtonĉambro troviĝas ŝtonaj tablo, benko, lito kaj kapkuseno. Iom ripozinte en ĝi ni daŭrigis la vojon kaj venis al Jianfeng-baseno, la plej malalta loko de la Granda Ŝtona Arbaro. En la baseno ŝtonglavo sin direktas ĉielen. Antaŭe tie troviĝis sola vojo kun longeco de pli ol dek metroj, tial estis neeble por la turistoj vidi la tutan basenon. Nun zigzaga ponto estas konstruita laŭ la randoj de la baseno. Irante laŭ la ponto, la turistoj povas vidi sennombrajn ŝtonajn kolonojn grandajn kaj malgrandajn. Iuj similas al altegaj antikvaj pagodoj, aliaj al starantaj fungoj, kaj triaj havas kavernojn interligantajn unu alian. Kaj la baseno estas dividita de la rokoj en

"La Kvin Maljunuloj"



multajn grandajn kaj malgrandajn basenojn. Malsupre de la ponto la akvo estas klara kiel spegulo kaj fiŝoj ĝoje naĝadas en ĝi.

Elirante el la pitoreskejo Lotus-flora Baseno kaj ascendante laŭ la ŝtuparo inter rokoj, oni povas atingi wangfeng-pavilonon, la kulminon de la Granda Ŝtona Arbaro. Ĝi estas sesangula kaj duetaĝa. Starante en ĝi, oni povas vidi la tutan arbaron. La aroj kaj aroj da groteskaj rokoj aspektas, kvazaŭ ili estus granda armeo el miloj kaj dekmiloj da soldatoj en rapida marŝado.

Alfronte al tiuj mirindaj rokoj, oni nature interesiĝas pri ilia deveno. La gvidisto koniĝis al ni, ke antaŭ ducent milionoj da jaroj tie estis vasta maro kaj tial sedimentiĝis dika tavolo da kalkoŝtono. Poste pro la ŝanĝiĝo de la terkrusto la maro fariĝis kontinento kaj la ŝtonoj elmontriĝis el la akvo. Antaŭ ĉ. du milionoj da jaroj pro erozio la kalkorokoj iom post iom solviĝis kaj fariĝis ŝtona arbaro.

Kvin turismaj vojoj kondukas al Wangfeng-pavilono. Unu el ili, kiu ligas kavernojn kaj Ŝtonmurojn, kondukas al Axi-gazono kun bela pejzaĝo. Tie estas la Malgranda Ŝtona Arbaro, kiu sin trovas en maldensa ombro de bambuoj.

Tie estas ne nur la ŝtonaj arbaroj, sed ankaŭ bela legendo. Montrante ŝtonon similan al knabino, la gvidisto diris, ke ĝi estas transformajo de Aŝma laŭ legendo de la sani-a nacieco. Aŝma estis bela knabino, kiu devenis de malriĉa kamparana familio. En sia aĝo de 11 jaroj, ŝi jam komencis helpi


sian patron en paŝtado de ŝafoj. Iutage, ŝi kondukis hejmen orfon Ahei, kiu perdis la vojon dum kolektado de freŝaj fruktoj por bienulo. La knabo estis ankaŭ malriĉa. Post morto de siaj gepatroj li devis labori kiel kulio por bienulo, multe suferante turmentadon. La bonkoraj gepatroj de Aŝma adoptis lin kiel sian filon.

Kun paso de la tempo la plenkreskintaj Aŝma kaj Ahei amis unu la alian. La patro de Aŝma donis sian magian sagon al Ahei. Tamen la amo inter Aŝma kaj Ahei iris neglate. Iutage, la filo de la bienulo vidis Aŝma kaj estis ravita de ŝia beleco. Li sendis siajn lakeojn por ŝin kapti kaj edzinigi al li. Kiam Ahei revenis kaj trovis ke Aŝma forestas, li kunportis la magian sagon kaj ekveturis serĉi ŝin rajdante sur ĉevalo. Finfine Ahei savis Aŝma el la familio de la bienulo. Sed estis ne atendite, ke la bienulo breĉiĝis la digon, ke la paro da geamantoj estis disigitaj de la inundo. Poste la diluvo iom post iom malleviĝis kaj Aŝma jam transformiĝis en ŝtonon restantan en la ŝtona arbaro por eterne. Se ni fikse rigardas la starantan Aŝma deflanke, ni povas trovi, ke ŝi estus kvazaŭ atendanta sian amaton.


Kiam la suno estis subiranta, ni ekveturis per aŭto hejmen laŭ la ŝoseo ĉirkaŭ la Granda Ŝtona Arbaro. Rigardante el la aŭto, ni vidis, ke en la vespera krepusko multaj naturaj statuoj kiaj "la Kvin Maljunuloj" kaj "la Patrino kaj Filo" estas pli versimilaj kaj kortuŝaj.

Fotoj de YANG CHUNZHOU

"La Ĉevalo"



Danca konkurso



La solo "Printempa Silkraŭpo"

EN aŭgusto de la kuranta jaro okazis en la bela marborda urbo Dalian la ĉina Unua Tutlanda Danca Konkurso (solo, duopo kaj triopo). Kun granda intereso mi veturis per trajno al la urbo por raporti pri ĝi.

En tiu ĉi danca konkurso aranĝita de la Kultura Ministerio kaj la Ĉina Dancista Asocio partoprenis 337 dancistoj venintaj de diversaj partoj de la lando, kiuj prezentis 206 programerojn. 71 el ili ricevis premiojn de komponado kaj reĝisorado kaj 89 dancistoj ricevis premion de eminenta dancado.

La triopa danco "Milita Tamburado de Jinshan" ricevis 4 unuagradajn premiojn de komponado, dancado, muziko kaj kostumo-projektado. Ĝi prezentas la faman generalinon Liang Hongyu de la Suda Song-dinastio (1127-1279) de Ĉinio, kiu, helpe al sia komandanta edzo, frapadas kune kun siaj du filoj militan tamburon por kuraĝigi la militistojn en batalo. Tiu rakonto estas tre populara inter la ĉinaj popolanoj.

La reĝisoro fandis en la dancon tamburajn ritmojn de popularaj operoj. Li brile prezentis heroecon de la generalino per imponaj melodioj kaj viglaj fortaj movoj. La danco asimilis popularajn operojn kaj naciajn dancojn. En ĝi la patrino kaj la du filoj sin turnas ĉirkaŭ la tamburo, kaj la fortaj dancmovoj kaj la superba kaj animskua tamburado kvazaŭ kondukus la spektatorojn en militon antaŭ centoj da jaroj.

La 20-jara Wang Xia rolis Liang Hongyu. Ŝi havas sveltan kaj belan staturon. Ŝi rikoltis aplaŭdojn de la spektatoroj per malfacilaj dancmovoj. Ŝi diris al mi, ke la sceneja Liang Hongyu devas fari transkapiĝon sur la tamburo kun diametro de 45 cm. Por plenumi tiun movon, ŝi ĉiutage ekzercis sin sur tamburo pli ol 40 fojojn.


Danco estas unu el la artoj ŝatataj de la ĉina popolo kaj havas longan historion. Frue en la 11-a jarcento a. K. ĝis la 6-a jarcento p. K., kiam la popularaj dancoj prosperis en Ĉinio, la imperiestraj palacoj jam havis grandtipan dancon akompanatan

de muziko por kulta ceremonio. Tang-dinastio (618-907 p. K.) estis tre prospera en ekonomio. Dank' al kultura interŝanĝo fremdlandaj muziko kaj dancoj estis enkondukitaj en Ĉinion, kio akcelis disvolviĝon de la dancarto de Ĉinio. La soloj "Kolora Skulptita Dancistino de Dunhuang" kaj "Dancistino" prezentataj en tiu ĉi konkurso estis kreitaj laŭ freskoj, elterigitaj argilaj dancistoj kaj koncertaj notoj de Tang-dinastio. Post la 11-a jarcento, la ĉinaj operoj pli kaj pli disvolviĝis kaj dancarto estis enkondukita en operojn.

Dank' al sia intima rilato kun la vivo kaj produktado, la popularaj dancoj tre popularas inter diversaj naciecoj. En la konkurso la "Kapto de Orfiŝo" akirinta unuagradan premion kaj la "Junaj Geedzoj Vizitas Foiron" akirinta triagradan premion estas popularaj dancoj karakterizitaj de humureco. La solo "Akvo" estis laŭdata de artaj recenzistoj kiel krono de dancarto. Ĝi ne havas malfacilegajn movojn, nek okupas grandan spacon, ĝi prezentas vivon de



La duopa danco "Kapto de Orfiŝo"



La solo "Akvo"

Xishuangbanna-aj taj-naciecaj virinoj en Yunnan-provinco. Vespere, post laboro, bela taj-a knabino iras al rivero kunportante akvopotojn. La klara akvo spegulas ŝian sveltan korpon. Ŝi jen lavas la harojn, jen petolas kun akvo supren levante la longan jupon . . .

Taj-nacieca dancistino Dao Meilan prezentis tiun programeron. Ŝi naskiĝis kaj kreskis en taj-a vilaĝo kaj bone konas la vivon de la laboranta popolo. Ŝi diris, ke la taj-aj knabinoj estas diligentaj kaj kuraĝaj, amas la vivon kaj ŝatas belecon, purecon kaj ankaŭ akvon. Ĉiu-

foje, kiam ŝi prezentas la "Akvon", ŝi ekpensis sian knabinan vivon. Tial la arta figuro de ŝi prezentita estas reala, intima, bela kaj riĉa je vivetoso.


Iuj dancoj prezentas pozajn kaj movojn de floroj, birdoj, insektoj kaj fiŝoj. Inter ili "Printempa Silkraŭpo" estas la plej kortuŝa.

Matene, la sunradioj falas tra morusfolio sur amindan silkraŭpan knabinon. Ŝia kvieta korpo skuetiĝas en muziko. La dancistino jen imitas rampadon de silkraŭpo, jen levas la manojn por esprimi ronĝadon de silkraŭpo, jen simbole prezentas diligentecon kaj penadon de silkraŭpo per delikataj ruliĝoj. La lirikaj dancmovoj prezentas la kristalan korpon de silkraŭpo



La solo "Kolora Skulptita Dancistino de Dunhuang"

La solo "Espero"



antaŭ kokonado. La dancistino malrapide elvolvas pecon de blanka gazo, kiu simbolas blankan silkon sekreciitan de silkraŭpo, kaj poste ŝi envolviĝas en la gazon por aludi la vivfiniĝon de silkraŭpo por homa feliĉo.

La enhavo de tiu danco estas signifoplena. Silkraŭpo ĝuas respekton de la ĉina popolo. Deantikve multaj poetoj laŭdis ĝin per geniaj versoj. Ĉefministro Zhou Enlai plurfoje instruis, ke la laborantoj de diversnivelaj registaroj devas fidele kaj senplende servi al la popolo kiel printempaj silkraŭpoj. La 18-jara Wang Bin ludas la rolon de printempa silkraŭpo. Ŝi lertas en movado de la korpo-partoj kaj ŝia prezentado aplikis, surbaze de naciaj kaj popolaj dancoj, dancvortojn de la moderna danco.



La 23-jara Hua Chao uzis en la solo "Espero" kompare multajn dancvortojn de la moderna danco.

Kiam la kurteno leviĝas, unu junulo kun nuda dorso al la spektatoroj barakte tordas siajn membrojn en akompana kanto "A . . .", kiu sugestas danĝeran situacion. Subite li eksaltas kaj sentime levas la kapon. La forta plastiko kaj serioza mieno prezentas lian batalon kontraŭ herezaj fortoj. Poste, li kuregas, ruliĝas kaj anhelas surtere. Li etendas siajn manojn al la ĉielo. Tiam la melodio fariĝas forta, kaj la dancmovoj larĝaj kaj liberaj, kio prezentas ke la heroo havas grandan esperon al la estonteco, post kiam li liberigis sin de la "kateno" de rutino kaj trarompis la "kaĝon" de spirito post persista luktado. Hua Chao estas unu el la komponintoj de la danco kaj rikoltis aplaŭdojn de la spektatoroj per sia brila dancado. Oni diris, ke li estas multesperiga aktoro, kiu lertas en prezentado de forteco kaj flekseco. Li gajnis la unuagradan premion de dancado.

La moderna danco en Ĉinio havas historion de duonjarcento. Jam en la tridekaj jaroj la fama dancisto Wu Xiaobang, prezidanto de la Ĉina Dancista Asocio, enkondukis la modernan dancon en Ĉinion kaj aplikis ĝiajn teknikojn en la naciaj dancoj. La fama dancistino Dai Ailian, kiu lernis iam en la Reĝa Baleta Instituto de Britio kaj nun estas vicprezidanto de la Ĉina Dancista Asocio, kreis dancon "Hejmsopiro" k. a. en la kvardekaj jaroj, aplikante teknikon de la moderna danco, kiuj profunde impresis la spektatorojn. Ili opinias, ke la dancarto de Ĉinio ankoraŭ devas asimili dum sia disvolviĝo belajn kaj sanajn dancvortojn de la moderna danco.

Antaŭ la finiĝo de la konkurso, mi vizitis veteranajn dancistojn. Ili ĝoje diris, ke la konkurso estas granda revuo al la dancoj kreitaj en la pasintaj 30 jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko. La fakto montris, ke aperis multaj bonaj dancoj kaj novaj formoj de esprimoj kaj multe altiĝis la teknikoj. Estas pli ĝojinde, ke aperis aro da bone trejnitaj geaktoroj kun aĝo de ĉ. 20 jaroj, ili estas esperiga generacio de la ĉinaj dancistaj rondoj. Ili kredas, ke baldaŭ aperos buntaj novaj dancoj spegulantaj la realan vivon kaj riĉaj je naciaj koloroj.

La triopa danco "Milita Tamburado de Jinshan"




R

i

f

o

POPOLA
RAKONTO

ĈE la rando de la Suda Ĉina Maro staras altegaj rifoj, kiujn oni nomas "Rifoj de Edzonso-
piro". Kiam fiŝistoj de la gento Dan* preterpasas la rifojn, ili ĉiam longe fiksas sian rigardon al la rifoj, ĉar rakontiĝas de generacio al generacio tre emocia legendo pri la rifoj.

Feiqing estis la plej bela knabino de la gento. Ŝiaj brovoj similis al la novluno kaj ŝia korpo estis svelta kiel salikobranĉeto. Ĉiuj admiris ŝian belecon: "Ho, Feiqing estas pli bela ol princino de la Drako-reĝo!" Kaj la junulo Feiduo estis vigla kaj forta kiel drako en la maro. Li havis larĝan bruston kaj fortikan korpon. Cetere li estis lertulo en fiŝkaptado. Ĉiuj admiris lian fortecon: "Se la tero havus orelojn, certe li povus levi ĝin." Feiduo kaj Feiqing enamiĝis unu al la alia.

Super la gento regis tirano nomata Yubatian. Li estis tre avida al la bela Feiqing kaj volis preni ŝin kiel sian kromedzinon. Iun tagon li alportis al Feiqing multe da trezoroj, sed ŝi ne donis al ili eĉ unu rigardon. Yubatian ŝin atakis per mielaj vortoj: "Se vi konsentos esti mia kromedzino, vi povos loĝi en luksa domo, ĝui frandaĵojn kaj vestiĝi per silkajoj. Se vi edziniĝos al Feiduo, vi vivos mizeran vivon kaj fariĝos nutraĵo de ŝarkoj dum tajfuno." Sed Feiqing tute ne volis aŭskulti lin kaj ŝtopis al si la orelojn per fingroj.

Post nelonge Feiqing kaj Feiduo estis geedziĝontaj. Tiam Yubatian ordonis soldatojn peli ilin sur la maron kaj proklamis, ke ili neniam rajtos surbordiĝi. De tiam ili devis ankri sian boaton inter la rifoj dum ventego.

Iun tagon en fiŝabunda sezono Feiqing kaj Feiduo estis laborantaj sur la maro: Feiqing remadis kaj Feiduo manipuladis la reton. Ve, dufoje li ĵetis ĝin, sed kaptis nenion. En la tria fojo, kiam li elakvigis la reton per la tuta forto, li trovis en ĝi grandan karpon kun ora vosto. Li metis la fiŝon en la boaton. Sed kia miraklo okazis: La karpo trifoje balancis la kapon kaj trifoje svingis la voston kaj poste eklarmis. Feiduo diris: "Kiel kompatinda estajo! Lasu ĝin en la maron." Feiqing kapjesis. Kaj li metis la fiŝon en la akvon. La fiŝo ŝovis sian kapon el la akvo por saluti Feiduan. Fakte, la fiŝo estis la aliformiĝinta tria filino de la Drako-reĝo. Kiam ŝi estis sindistranta en la ondoj de maro, ŝi miseniris la reton de Feiduo.

Post nelonge ekfuriozis uragano sur la maro. Tute malheliĝis. La ventego levadis altegajn ondojn kaj la rifoj estis preskaŭ englutitaj de la ondoj. La boato balanciĝis en la ondoj kvazaŭ ovoŝelo. Subite ciklono puŝis Feiqing en la maron. Feiduo tuj sin ĵetis en la maron kaj komencis batali kontraŭ la ondoj por savi Feiqing. Post longa klopodado li sukcesis atingi Feiqing kaj puŝi ŝin sur rifon, tamen ondegoj ĵetis sin al la rifo kaj forportis lin.

Post sia rekonsciiĝo Feiqing trovis, ke Feiduo ne estas. Ŝi dolore ekploregis. Ŝia ploro kaj la muĝo de la ondoj bruis kiel tondroj. Aŭdinte ŝian ploregon, la samgentaj fiŝistoj alrapidis al ŝi, sed savi lin estis neeble. Ankaŭ la tirano Yubatian alvenis kun ŝajnigita simpatio kaj diris al Feiqing: "Ĉi tion mi jam antaŭvidis. Feiduo jam fariĝis nutraĵo de ŝarkoj. Do iru kun mi en mian hejmon!" La fiŝistoj indigniĝis kaj forte pugnobatis la fiulon. Yubatian forfuĝis kun timego. La fiŝistoj longe serĉadis Feiduan, sed ili ne trovis lin. Feiqing senĉese ploradis, ne manĝante nek trinkante.

Nun iom pri Feiduo. Li estis trovita de soldatoj-salikokoj kaj generaloj-kankroj. Ili portis lin en la palacon de la Drako-reĝo. La tria filino de la Drako-reĝo rekonis en li la savinton. Ŝi tuj donis al li revivigan pilolon kaj Feiduo rekonsciĝis.

Pro danko kaj respekto al Feiduo, la princino enamiĝis al li. Ŝi svatis sin al Feiduo, sed la lasta, neŝanceleble amanta Feiqing, rifuzis ŝian peton. La Drako-reĝo ordonis mal-liberigi lin en la palaco. Oni prezentis al Feiduo plej delikatajn litaĵojn kaj plej bongustajn frandaĵojn. Samtempe la princino venis por lin danki kun amplenaj okuloj kaj kora zorgo pri lia farto, intencante kortuŝi lin. Sed malgraŭ ŝia sinsvato, Feiduo ĉiam restis firma kun insista petego: "Lasu min iri hejmen. Mia edzino atendas min en granda maltrankvilo. Mi neniam ŝanceliĝos en mia amo al ŝi, eĉ se la maro sekigiĝos aŭ ŝtono putriĝos."

En la tria tago, la Drako-reĝo kaj la princino estis kortuŝitaj de lia firma amo al Feiqing kaj vole nevole konsentis lin liberigi. Ili diris: "Vi povas foriri. Ja nenia forto povas ŝanĝi la amon de la fidela paro." Por danki lin pro la savo, la princino donacis al li akvoforigan perlon kaj ordonis soldatojn-salikokojn kaj generalojn-kankrojn eskorti lin ĝis la rifo.

Feiduo pasigis nur tri tagojn en la palaco de la Drako-reĝo, en la homa mondo tamen jam forpasis tri jaroj. Feiqing atendis tri plenajn jarojn, sidante sur la rifo. Ŝiaj larmoj gutadis sur la ŝtonoj kaj ilin truiĝe makulis. Je la renkontiĝo ili firme ĉirkaŭprenis unu la alian. Sed Feiqing jam multe maljuniĝis pro la ĉagreno kaj la haroj tute blankiĝis, kaj sur ŝia vizaĝo aperis profundaj sulkoj. Feiduo montris al Feiqing la akvoforigan perlon kaj pensis en si: "Kiel bone estus, se ŝi refariĝus tiel juna kaj bela kiel antaŭe!" Kaj je lia penso okazis

miraklo: Ekvidinte la perlon, ŝi subite rejuniĝis kaj ŝiaj blankaj haroj renigrigis. La akvoforiga perlo fakte estis ankaŭ ĉiopova perlo, kiu povas plenumi ĉiajn dezirojn de sia mastro. De tiam oni denove povis aŭdi ĝojajn kantojn de Feiduo kaj Feiqing. Ilia vivo fariĝis pli kaj pli bona kaj renkontis neniam malfeliĉon poste.

Kaj ekde tiam la rifoĵ havis la famon, kaj oni nomis ilin Rifoĵ de Edzonsopiro.

— Kolektita kaj redaktita de
XU HEDA

** Dan estas la nomo de fiŝista gento vivanta ĉe la sudorienta marbordo de Ĉinio. Antaŭ la Liberiĝo ili neniam havis loĝdomon kaj ne povis esti entombigitaj sur la tero. La gento havas siajn proprajn kantojn, rakontojn kaj legendojn. Post la Liberiĝo la popola registaro konstruigis por ili domojn sur la tero, ke ili povu fiksloĝadi.*

ABON-VARBADO DE EPC^ĉ POR 1981 20% DA RABATO AL NOVA ABONO!

La abonanto-varbado de EPC^ĉ por 1981 jam komenciĝis kaj daŭros ĝis la 31-a de januaro, 1981. Ĉiu, kiuj abonos EPC^ĉ-on en tiu ĉi tempo, povos ĝui rabaton de 20%. Ne perdu la ŝancon kaj tuj abonu ĝin, kaj rekomendu ĝin al viaj parencoj kaj amikoj. Ĉiu, kiu varbos abonantojn por ni, ricevos rekompencan kun ĉina originaleco, donacitan de Guoji Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj).

ABONTARIFO DE EPC^ĉ

12 numeroj (1 jaro)	£3.00	US\$ 6.00	Gld.12.60	Yen1400
24 numeroj (2 jaroj)	£5.00	US\$10.00	Gld.21.00	Yen2800
36 numeroj (3 jaroj)	£7.50	US\$15.00	Gld.31.50	Yen4000
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
12 numeroj (1 jaro)	£2.20	US\$4.30		
24 numeroj (2 jaroj)	£3.60	US\$7.20		
36 numeroj (3 jaroj)	£5.40	US\$10.80		

SPECIMENOJ SENPAGE AKIREBLAJ LAŬ PETO

Abonu ĉe: **Peranto en via loko**

Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, P. O. Kesto 313, Beijing Ĉinio

Li nun estas en la aĝo de 142 jaroj



Wu Yunqing

EN brika kavern-domo ĉe monttalo en Qinghuabian, 45 kilometrojn nordoriente de la urbo Yan'an, loĝas 142-jarulo nomata Wu Yunqing. Antaŭe li estis abato de Qinghua-templo kaj nun estas membro de la Urba Komitato de la Kvina Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Yan'an. Antaŭ nelonge ni intervjuis lin por sciigi pri la sekreto de lia longviveco.


Li havas farton multe pli bonan ol tiu de aliaj maljunuloj, kiujn ni vizitis. Kvankam profundaĝa, li estas tamen viglani-ma kaj iras per firmaj paŝoj. Li povas ne nur bicikli, sed ankaŭ vektporti 40 kilogramojn da akvo sur monton sen anhelado. Li estas klarmensa: Li povoscias kanti plurajn popolkantojn kaj eĉ skribi iujn anglajn vortojn, kiel "saluto" kaj "danko",

kiujn li ellernis en la jaro 1978. Pli mirinde estas, ke en la lastaj ok jaroj liaj arĝentaj kapharoj nigriĝis.

La Yan'an-a Popola Hospitalo faris ekzamenon al lia korpo lastatempe kaj la rezulto montris, ke li estas 1.59 metrojn alta kaj 53 kilogramojn peza; lia pulso batas 72 fojojn ĉiuminute; lia sangopremo estas 140/88 milimetroj/Hg.; lia vidkapablo estas 1.2; lia kolordistinga kapablo estas tre bona; lia aŭddistanco estas kvin metroj; li havas bonan sanon kun dikaj muskoloj, elasta haŭto, malmulta subhaŭta graso, kaj normalaj sensaj nervoj. Liaj respondoj estas trafaj kaj liaj kondutoj estas senĝenaj; kaj bone laboras liaj spiraj kaj abdomenaj organoj kaj cirkula sistemo.

Ni sciigis pri lia ĉiutaga vivo. Li havas bonan apetiton. Kutime li trinkas supon, anstataŭ akvon, post la manĝo. Li dormas 4-5 horojn nokte kaj dormetas tage por refreŝigi sin, se li sentas lacon. Nokte li dormas ĉiam en sida pozo, sen litkovri-

Inter knaboj



lo. Lia korpo estas rezistema kontraŭ frosto. En oktobraj tagoj, kiam tranĉe blovas la norda vento, li tamen portas ne dikan veston. Eĉ en frua printempo, kiam malvarmo ankoraŭ atakas la homojn, li portas pantalone-ton. En frosta vintro, kiam oni sin vestas per pelto kaj vatitaj botoj, li tamen surhavas kaŭĉu-kajn ŝuojn, sen ŝtrumpoj. Mirigitaj junuloj ŝovis sian manon en lian ŝuon kaj trovis lian piedon varma. La profunda Wu diris al ni, ke li pretigis al si ĉerkon jam trifoje, la unuaj du difektigis de tempo kaj la tria estis uzata por alia celo.

Li vivas malluksan vivon, havas serenon karakteron kaj tenas sin afable al aliaj. Kvantkam lia vivo estas malluksa, tamen li ofte donas materian helpon al aliaj. Li ĝuas altan prestiĝon inter la vilaĝanoj. Nemalmultaj el tiuj maljunuloj kaj mezaĝuloj, kiuj de sia infanaĝo vivas najbare al li, diris al ni, ke iuj knaboj emas fari al li petolajon — tiri liajn blankajn kapharojn aŭ lian arĝentan barbon — tamen li ĉiam ridetis kaj neniam koleris.

Ni informiĝis, ke la sekreto de la longa vivo de tiu maljunulo povas esti ĝenerale prezentitaj per kvar vortoj “movado”, “tabuo”, “ekzercado” kaj “gajeco”.


“Movado” signifas, ke li persistas en ĉiutaga laboro. Li neniam ĉesis labori. Eĉ profunda, li daŭrigas kolektadon de brulligno, kulturadon de kampoj, portadon de akvo kaj preparadon de manĝoj. Nun li ankoraŭ laboradas de mateno ĝis vespero senhalte. Li opinias, ke la arbo kadukiĝas unue de sia radiko

kaj la homo de la piedoj, kaj laboremulo povas eviti fruan kadukiĝon.


“Tabuo” signifas, ke li vivas simplan vivon sen eksceso. Li devenas de malriĉa familio kaj lojale observas la budhisman doktrinon. Li ne edziĝis kaj restas dumviva vegetarano. Li tute abomenas fumadon, drinkadon kaj similajn. Ĉiutage li manĝas trifoje, ĉiufoje sobre. Li ĝissate tagmanĝas, sed malmulte maten- kaj vesper-manĝas. Liaj ĉefaj manĝaĵoj estas maizo, milio, batato, terpomo kaj aliaj vegetaĵoj. Li prenas vegetalan grason anstataŭ animalan. Li malmulte uzas kuirsalon, kaj ĉefe prenas saletajn manĝaĵojn. Li tenas siajn loĝejon kaj ripozejon tre sekaj. Kaj lia lito estas alta.

“Ekzercado” signifas, ke li ekzercas sian korpon por adapti ĝin al la medio. Li rigardas tion kiel gravan aferon en sia vivo. Li diris: “Mia bona sano dependas ne de ia ajn panaceo, sed de mia korpa hardado. Se vi ekzercas vian korpon energie kaj persiste, vi certe fariĝos fortika.” Lia longviveco estas nedisigebla de liaj persista ekzercado en ĉinaj antikvaj gimnastikoj.

“Gajeco” signifas serenecon kaj optimismon. Li opinias, ke se oni ne volas maljuniĝi, li devas en sia menso, ĉiam rigardi sin kiel infanon. Tiu maljunulo mem vivas sen ĉagreno kaj neniam konsideras pri siaj perdoj kaj bagateloj. Li estas optimisma. Li manĝas bonapetite, dormas dolĉan dormon en ajn pozo, ĉu sidante, ĉu apogante sin al io, ĉu kuŝante. Li rapide endormiĝas, ĉion forgesante, kaj pres-



Wu Yunqing en skermado



Wu Yunqing en biciklado

kaŭ neniam sonĝas. Eĉ tre mallonga dormeto povas forigi al li lacon kaj refreŝigi lin. Li diris, ke gravas ne la longeco sed la profundeco kaj kvieteco de dormo.

“Longan vivon al vi, ankoraŭ pli longan!” ni manpremadis kun la maljunulo je adiaŭo.



NOVA OFTALMA OPERACIO EN ĈINIO

Juna kamarano Mao Qingsheng, kiu perdis vidkapablon pro retina periferi-vejnito antaŭ unu jaro, iom post iom resaniĝis post kuracado de la Dependenda Hospitalo de la Nanĵing-a Medicina Instituto en la lasta marto per nova vitreo-resaniga aparato farita de Ĉinio (Tia aparato servas por dispecigi kaj sorbi malsanajn vitreojn kaj injekti novan injektaĵon). Antaŭe la vitrea anopsio kaŭzita de traŭmata hemoragio, hipertensia okulfunda hemoragio, periferi-vejnito kaj aliaj okulaj malsanoj estis rigardata kiel nekuracebla. Sed de 1978 tiu hospitalo per la supre menciita aparato sukcese operaciis dek malsanulojn, ke ili

reakiris vidkapablon kaj unu el ili eĉ ekhavis la vidkapablon de 1.2.

LA UNUA NATURSCIENCA KRONIKO DE ĈINIO

“Kroniko de Naturaj Sciencoj en Ĉinio, 1979” estis publikigita lastatempe de la Shanghai-a Scienca Eldonejo. La libro konigas la atingojn de Ĉinio en la periodo de 1949-1979 en nuklea energio, duonkonduktiloj, laseroj, matematiko, astronomio, psikologio, tradicia ĉina medicino kaj aliaj kampoj. Ĝi inkluzivas 18 specialajn raportojn de famaj sciencistoj Yan Jici, Wang Ganchang, Huang Kun, Su Buqing kaj aliaj. La en- kaj ekster-landaj sciencaj atingoj dum la lastaj jaroj estas traktataj en 55 artikoloj.

ALBUMO PRI GRANDA MURO ELDONITA

Kian longecon havas la mondfama Granda Muro? La albumo

“La Granda Muro”, publikigita lastatempe de la Eldonejo de Kulturaj Objektoj, diras, ke la totala longeco de la muroj, kiuj estis konstruitaj en la pasintaj dinastioj, superis 50,000 kilometrojn. La albumo enhavas 130 fotojn de la muroj konstruitaj en diversaj periodoj de la antikva Ĉinio. La teksto estas en la ĉina kaj angla lingvoj.

BELARTAJ VERKOJ DE ĈINAJ STUDENTOJ EKSPONITAJ EN BEIJING


Komence de septembro okazis en Beijing (Pekino) ekspozicio de verkoj de studentoj de ĉinaj belartaj institutoj.

Ĝi estis la plej granda ekspozicio de tia speco post la fondiĝo de la popola respubliko kaj estis ekspoziciataj pli ol 440 verkoj, kiel ĉin-stilaj pentraĵoj, olepentaĵoj, lignogravuraĵoj, skulptaĵoj kaj metiartaĵoj.

KARIKATURO

Rigardi florojn!

Pentrita de MIAO DI






Knabino

Ligna gravuraĵo de BAI RUNSHENG



Remado sur Huaxi-rivero

Somera Semajno de Chongqing-aj Esperantistoj




Naĝa konkurso




Skizado

Lernado de la kanto "La Espero"



Por memoro



Esperanta kurso



Esperanta konversacio



Somera Semajno de Esperantistoj en Chongqing

de GU CUNHUA



Bonvenon al vi, partoprenantoj de la somera semajno!

DE la 1-a ĝis la 6-a de aŭg., okazis enhavoriĉa "Somera Semajno de Chongqing-aj Esperantistoj" aranĝita de la Chongqing-a Esperanto-Ligo en la pitoreska Chongqing-a Tria Normala Lernejo ĉe la suda bordo de Changjiang (Jangzi)-rivero.

Inter la 84 partoprenantaj esperantistoj troviĝis instruistoj kaj lernantoj de superaj, mezgradaj kaj elementaj lernejoj, oficistoj de institucioj kaj laboristoj de fabrikoj kaj vendejoj. Informiĝinte pri tio, ankaŭ nombro da esperantistoj el Chengdu, Liangshan, Tongliang kaj aliaj lokoj venis tien por kune pasigi la Semajnon.

Plejparto de ili estas junaj komencantoj. Ili loĝas dise en la urbo kaj ĉiam estas okupataj de laboro, tial ordinaro mankas al ili ŝanco sin ekzerci en Esperanta konversacio. Por altigi la lingvan nivelon, oni fondis du Esperantokursojn: unu por komencantoj kaj la alia por ekzercado de konversacio inter progresantoj. Kaj samtempe oni prelegis pri legado kaj gramatiko de Esperanto.

Post la malfermiĝo de la Semajno la instruistoj faris multajn klopodojn por bone lekcii kaj la lernantoj entuziasme kaj diligente studis. Matene multaj el ili laŭtlegis sur

montdeklivo; vespere ili du- aŭ tri-ope promenadis en la korto interparolante en Esperanto; kaj en iom plimalfruaj horoj ili kune aŭskultis Esperantajn sonbendojn. Post la Semajno ilia Esperanta nivelo plialtiĝis iagrade, ĝuste kiel iu kursano diris: "Dank' al la semajna lernado mi altigis al mi la lingvan nivelon kaj pli interesiĝis pri Esperanto. Tio metis la unuan bazon por daŭre lerni." Alia diris: "En la pasinteco mi havis malpli da ŝancoj paroli Esperanton, ĉi-foje la kuna lernado levis mian kapablecon de aŭdo kaj parolo kaj unuapaŝe alkitimigis min al parolado en Esperanto."

Chongqing estas urbo, kie vivis kaj laboris internaciistino kaj japana esperantistino Verda Majo kaj nia eminenta esperantisto Eltunko. Multaj esperantistoj tre interesiĝis pri iliaj faroj, tial oni speciale rakontis pri ili. En la tridekaj jaroj Ran Qinfang, vicprezidanto de la Ligo, interkonatiĝis kun Liu Ren, la edzo de Verda Majo. En 1939 ili denove renkontiĝis en la urbo. Li ofte gastis ĉe la afablaj geedzoj. Li rakontis al la ĉeestantoj multon de li viditan kaj aŭditan pri ili. Prezidanto de la Ligo Li Ren, kiu iam lernis Esperanton de la forpasinta Eltunko, prezentis al la esperantistoj, kiel li fervore disvastigis Es-


peranton, batalis kontraŭ Kuomintang-aj reakciuloj per nia lingvo kaj oferis sian vivon por la revolucio. La raportoj multe edifis la ĉeestantojn.

La programon de la Semajno kompletigis diversaj artaj kaj sportaj aktivadoj, kiel pilkludo, naĝado, pentrado, fotado kaj kantado de Esperantaj kantoj. Je la 5-a de aŭg., la partoprenantoj ekskursis al la someruma loko Nanwenquan. Sur la bela Huaxi-rivero ili ĝoje pasigis tagon per remado, kantante kaj interbabilante en Esperanto.

En la komenco multaj el la partoprenantoj ne konis unu la alian kaj la kunvivado faris ilin intimaj amikoj. Iu junulo kore diris: "Ĉi-tie ĉiu, ĉu instruisto aŭ lernanto, montris familiarecon kaj ĝuis varmon de la kolektivo." En la adiaŭa kunveno lernantoj de la Tria Normala Lernejo kantis la kanton "Ĝis Revido, Amikoj!" por esprimi sian bedaŭron ĉe la adiaŭo. Iu esperantisto el Chengdu emocie deklamis sian poemon:

*Forpasis la semajn' je palpebrumo,
Fermiĝas nia amikec-forumo.
Promesas ni al la verd-verdaj akvo kaj montaro:
L' amikkunvivon ni reĝuos en venonta jaro.*

Gastado ĉe Jugoslavaj Amikoj



La aŭtoro (maldekstre) kaj Vukomanoviĉ

JE la 15-a de majo de la kuran-ta jaro, kiel membro de la Ĉina Verkista Delegacio mi partoprenis en la internacia verkista kunveno okazinta en Zagreb de Jugoslavio, kaj post tio mi venis al Beogrado. Ekster mia atendo, mi trovis inter la bonvenigantoj plurajn membrojn de la Beograda Esperanto-Ligo. Laŭ plano mi gastos unu semajnon laŭ la invito de la Jugoslavia Esperanto-Ligo ekde la 21-a de majo.

La plejparto de la bonvenigantaj esperantistoj loĝas en Beogrado. Kamarado Tibor Sekelj veturis speciale de Sabotica, kaj ankaŭ iu japana esperantistino, kiu estis vizitanta Jugoslavion, venis bonvenigi min kiel "gastiganto". La 70-jara Vojin Kolorov alveturis en pluvo, kaj tio tre emociis min.

Mi restis en Beogrado du tagojn, poste veturis al Skopje por vizito kaj revenis al Beogrado. En la 21-a de majo prezidanto de JEL Petar Vukomanoviĉ atendis min en mia antaŭmendita hotelo. Li estas mezstatura, kun blankaj haroj ĉe la tempioj, sed li impresis min kiel junulo. Li estas humura kaj sincera, kaj ni tuj sentis nin kiel malnovaj amikoj.

En la sekvanta tago li veturigis min al la Vojvodina Aŭtonoma Provinco. Tie vivas en paco pli ol 20 naciecoj. Kiam mi atingis ĝian ĉefurbon Novi Sad, pli ol 20 esperantistoj atendis min antaŭ la hotelo mendita por mi kaj du junaj esperantistinoj donacis al mi du freŝajn buketojn. Ni konversaciis trinkante kafon en la hotela salono.

Tie mi kontaktiĝis kun multaj homoj, el kiuj plejparto estis membroj de esperantaj organizoj. La parolataj temoj estis multaj, sed la ĉefa estis tiu pri Ĉinio. Ili volis koni Ĉinion kaj la vivon de la ĉina popolo. Tio montras, ke la jugoslavaj amikoj tre zorgas pri Ĉinio kaj havas profundan amikecon por Ĉinio.

En Novi Sad mi partoprenis en kunsido aranĝita de la Urba Kultura Asocio. Ĝin ĉeestis verkistoj kaj artistoj kaj la temo estis pri la ĉina literaturo kaj mia romano "Montvilaĝo" verkita en la tridekaj jaroj kaj ĵus eldonita en Jugoslavio. Mi parolis en Esperanto kaj sinjorino Radmila Flora, prezidantino de la Esperanto-Ligo de la Vojvodina Aŭtonoma Provinco, interpretis mian parolon en la serban lingvon. La jugoslavajn geamikojn ŝajne interesis la enhavo de

la kunsido. Kiam mi finis mian raporton, ili elmetis multajn demandojn al mi.

En la sekvanta tago kamarado Mladen Vrtunski akurate venis al mia hotelo kaj volis akompani min al Beogrado. Ni interbabilis en aŭtobuso kaj baldaŭ atingis tiun urbon. Ni adiaŭis unu la alian en nebulpluvo. Li demetis sian ĉapelon kaj ĝin donis al mi, kaj mi ne rifuzis ĝin, ĉar neniun memorajo estis pli intima ol ĝi. Post tio, ĉiufoje, kiam mi surmetis ĝin, mi ekpensis pri nia adiaŭo.

En Beogrado mi vizitis ankaŭ la preparan kurson de la fama Deko Universitato kaj kunsidis kun membroj de ĝia literatura grupo. Ili ĉiuj estis junaj literaturo-amantoj kaj petis, ke mi konigu al ili la ĉinan novan literaturon kaj prezentu mian sperton en verkado. Ankaŭ ili parolis pri sia sperto en verkado. Je adiaŭo ili donacis al mi "Elektitaj Modernaj Verkoj de Jugoslavio" kun iliaj subskriboj.

Estis neforgeseble, ke mi gastis ĉe jugoslavaj esperantistoj laŭ ilia invito. Moncilo Ocokliĉ havas nur la maljunan patrinon, ankaŭ kiu scias paroli Esperanton, tial mi povis libere

paroli kaj intime babili kun ili. Poste mi havis agrablan tagon en la hejmo de kamarado Radoslav Gajiĉ. Li estas fervora esperantisto. Antaŭ nelonge li eldonis sian verkon pri Esperanto "Internacia Lingvo". En ĝi li science pritraktis la rolon kaj perspektivon de Esperanto. Li konigis al mi la enhavon de la verko, ke mi ĉerpis el ĝi grandan inspiron. Mi tute konsentis kun lia opinio, ke Esperanto jam fariĝis internacia lingvo kun riĉa esprimivo post provado de preskaŭ unu jarcento.

La edzino de Gajiĉ tiam estis graveda, dume ŝia fratino Jana kaj ties fianĉo venis por gastigi min. Ili preparis por mi ordinaran serban manĝon. Tiuvespere, Gajiĉ kondukis min al la domo de siaj bogepatroj. Ili jam emeritiĝis, tamen estis tre sanaj. Iliaj afableco, gastamo kaj senĝenaj interparoloj tre ĝojigis min. Nia interparolo daŭris ĝis

profunda nokto. Kiam mi adiaŭis ilin, ili insiste veturigis min al mia hotelo. Ĉe adiaŭo antaŭ la hotelo, ili forte kisis min. Nun, kiam mi kvietiĝis, mi kvazaŭ aŭdis iliajn kisojn.

En Beogrado, kamarado Vuromanoviĉ ĉiam akompanis min. Ni kune babilis, promenis, prenis manĝon en malgranda restoracio aŭ aŭte veturis al pitoreskejo. Li, malnova loĝanto de la urbo, partoprenis en la batalo kontraŭ la faŝistoj kaj bone konas la disvolviĝon de la urbo. Krome, li vizitis multajn landojn kaj havas riĉan sperton de vivo. El liaj paroloj mi ĉerpis multajn inspirojn. Antaŭ nia adiaŭo, li kondukis min al la restoracio Skadareĵa, kie ni prenis vespermanĝon kune kun jurnalisti de la duonmonata gazeto "Duga" kaj alia esperantisto. La restoracio lokiĝas sur teraso de malgranda placo. Ĉar

la fama serba poeto kaj pentristo Djura Jakŝic de la 19-a jarcento iam loĝis tie, tial la restoracio nun fariĝis loko frekventata de poetoj kaj pentristoj. La restoracio dungis 6 kantistojn en kostumo de trobadoro por kanti kantojn aŭ reciti poemojn ĉe la pordo de la restoracio. Sur la placo promenis kaj babilis gejunuloj en paroj.

Kiam mi travivis gajan semajnon plenan de amikeco kaj estis forironta, kamarado Ocokliĉ alrapidis kaj invitis min viziti la plej altan magazenan domegon en Beogrado. Ni staris sur ĝia plej alta etaĝo kaj havis panoraman vidon de la urbo. Nur tiam mi ekkomprenis, kial li invitis min ascendi la domegon antaŭ mia foriro.

La tempo forpasis kiel akvo fluanta, sed la varmaj paroloj kaj afablaj vizaĝoj de la jugoslavaj geamikoj ankoraŭ restas en mia cerbo.

MLADEN VRTUNSKI* el Jugoslavio:

KARA GASTO EL ĈINIO

LA Internacia Lingvo Esperanto vere estas nekomparebla kun iu ajn alia lingvo en la mondo. Nia Esperanto — Societo "Marko Neŝiĉ" en Novi Sad, Jugoslavio, tion spertis la 22-an kaj la 23-an de majo ĉi-jara. Eminentata verkisto el Pekino, Ĉinio, s-ano Ye Junjian (Cicio Mar), estis nia gasto bedaŭrinde nur dum tiuj du tagoj. Veninte el la tre malproksima lando li tiel bele kaj bone parolis nian ŝatatan internacian lingvon, ke ni preskaŭ ne sentis ke ni ne estas samlandanoj; ĉio aspektis

ke ni interparolis nacilingve. Spite al tio, ke nia gasto parolas la anglan kaj francan lingvojn, por li kaj ni en nia medio Esperanto estis la plej kapabla interkomprenilo.

Samideano Ye Junjian, dum tiu tre mallonga restado en nia urbo Novi Sad, havis okazon viziti kelkajn el niaj historiaj lokoj kaj kulturaj institucioj. Krom nia modesta societejo, li vizitis nian malnovan fortikaĵon PETROVARADIN, kiun oni nomas ankaŭ "DANUBA GIBRALTARO", ĉar ĝi estas kons-

truita sur unu tre granda ŝtona monto, kiu elstaras super Danubo. Tie li vidis, kiamaniere la bona homintenco povas aranĝi belegan ripozobjekton, samloke kie dum jarcentoj la imperialistoj havis sian plej grandan hombuĉejon en tiu parto de Eŭropo.

Nia gasto ankaŭ vizitis en nia montareto FRUŠKA GORA kelkajn lokojn kie dum la dua mondmilito niaj partizanoj batalis kontraŭ la faŝismo.

La plej gravan renkontiĝon kun la ĉina verkisto ni organizis

en nia plej malnova kultura institucio "MATICA SRPSKA", kie li interkonatiĝis kun la ĝenerala sekretario de "Matica Srpska", s-ano Dušan Popov, kiu antaŭ du jaroj estis en lia belega kaj grandega lando akompanante nian Prezidanton Tito. Tiam s-ano Dušan Popov sendis al nia televido tre belajn raportojn pri Ĉinio, pri ĝia larĝanima popolo kaj la eminentaj gvidantoj de ĝia lando. En la solena salono de "Matica Srpska" estis renkontiĝo kun niaj pluraj konataj verkistoj kun kiuj s-ano Ye Junjian parolis siajn verkojn kiuj jam estas tradukitaj kaj eldonitaj ĉe ni. Nia eminenta esperantisto kaj verkisto Jivan Milisavac interparolis kun s-ano Ye Junjian esperantlingve, kaj verkisto Aleksandar Tišma anglalingve. Aliaj verkistoj kaj gastoj interkompreniĝis pere de Esperanto tradukata en nian nacian lingvon — serbkroatan. Tion precipe sperte faris la prezidantino de nia Vojvodina Esperanto-Ligo, s-ino Radmila Flora.

La renkontiĝo en "Matica Srpska" estis tre valora por nia Esperanto-movado, ĉar ĝi faris grandan propagandon inter niaj verkistoj, ĉar ili apartenas al preskaŭ dudek nacioj kaj etnoj en nia aŭtonoma provinco Vojvodina. Poste ili ĉiuj tre vigle interesiĝis pri Esperanto.

Al nia ŝatata amiko s-ano Ye Junjian, ni estas dankemaj, deziante ke li kaj aliaj ĉinaj esperantistoj vizitu nin, ĉar pere de Esperanto ni povas kompreni unuj la aliajn kvanzaŭ ni parolus nian gepatran lingvon, kaj sekve plifirmigi la amikecon inter niaj popoloj.


* La skribinto de tiu ĉi letero estas respondeculo de la Vojvodina Esperanto-Ligo en Jugoslavio.



NASKIGIS LA XI'AN-A E-ASOCIO

Xi'an (Hi'an) estas la plej granda antikva kultura urbo en la Nordokcidento de Ĉinio. Fondiĝis lastatempe la Xi'an-a Esperanto-Asocio

La konsilantoj de la Xi'an-a Esperanto-Asocio




La Somera Esperanta Konversacia Kurso de Hubei-provinco en 1980

SOMERA KUNLOĜADO DE HEA, 1980

La Somera Kunloĝado de la Hubei-a E-Asocio, 1980 okazis en la Tianjinlu-a Mezlernejo de la centro de la urbo Wuhan, ekde la 10-a ĝis la 21-a de aŭgusto. Ĝin partoprenis 77 esp-istoj el fabrikoj, lernejoj, institucioj, ĵurnalejoj k.a. Ĝi akcelis la amikecon inter esperantistoj kaj plialtigis ilian nivelon de Esperanta parolo.

ESP-TURISTA GRUPO DE NANJING

La Esp-kurso de la Xiaozhuang-a Normala Lernejo de la urbo Nanjing (Nankino) organizis turistan grupon el 20 homoj. Ili vizitis la urbojn Changzhou, Wuxi, Suzhou, Hangzhou, Shaoxing, Ningbo kaj Shanghai de la fino de julio ĝis la dua tagdeko de aŭgusto. Ili estis intime akceptitaj de esperantistoj de tiuj lokoj.



La Prepara Grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo en kunveno



Inaŭguro de Esp-kurso de Huangshi

DUA KUNVENO DE LA PREPARA GRUPO DE BEL

La 6-an de septembro, la prepara grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo okazigis la duan kunvenon. La ĉeestantoj kontrolis la laboron en la lastaj monatoj kaj diskutis pri la registro de membroj, projekto de la statuto kaj funkciigo de Esperanto-kurso. Kamarado Ge Baoquan, estro de la prepara grupo, faris paroladon. Li postulis, ke la ĉeestantoj bone faru ĉiujn preparajn laborojn antaŭ la fondiĝo de BEL.

RENKONTIĜO DE ĈINAJ KAJ JAPANAJ ESP-ISTOJ

Nokte de la 3-a de septembro, la estro de la prepara grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo Ge Baoquan kaj aliaj ok personoj intervidi-

ĝis en hotelo kun la japanaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis prof. N. Kawasaki de Nara-universitato, s-ro S. Matumoto kaj s-ino J. Ozawa, pliaĝa fratino de Verda Majo. Kiam la japanaj esperantistoj estis en Xi'an, ili havis agrablan horon dum la renkontiĝo kun tieaj ĉinaj esperantistoj.

IKU EN BRAZILO VENONTJARE

En la kadro de la 66-a UK en 1981 en Brazilo okazos la 34-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. Universitataj profesoroj kaj samrangaj kvalifikitaj personoj povas proponi sian prelegon al la komisiono pri IKU, ĉe prof. Bruce Sherwood, 252 Eng. Res. Lab., University of Illinois, Urbana, Illinois 61801, Usono. La proponoj kun titolo, resumo, biografieto kaj reprezenta persona bibliografio alvenu antaŭ la 10-a de januaro, 1981.

TRI ESP-KURSOJ DE HEA

De majo ĝis aŭgusto la prepara grupo de la Huangshi-a E-Asocio organizis tri Esp-kursojn, kiujn vizitis ĉ. 1,000 personoj. Por bone funkciigi la kursojn, oni kompilis instruajn materialojn, kiaj "Esperanta Aboco" kaj "Mezgrada Esperanto-Lernolibro".

53-A KONGRESO DE SAT EN RIJEKA

Inter la 19-a kaj la 25-a de julio ĉi-jare preskaŭ 400 kongresanoj el 18 landoj kolektiĝis en Rijeka, la plej granda jugoslava havenurbo, kie okazis la 53-a Kongreso de SAT. Krom kelkaj labor-kunsidoj, okazis ankaŭ kunvenoj de diversaj fakoj kaj sekcioj. Menciinda estas ankaŭ la ekspozicio "Laborista Movado kaj Esperanto". En la librostando apartan intereson vekis ĉinaj eldonadoj en Esperanto (ĉ. 100 diversaj titoloj).

La ĉinaj Esperantaj libroj eksponataj en la 53-a Kongreso de SAT

La 53-a Kongreso de SAT



Du agrablaj travivaĵoj dum mia agado por EPĈ

— Letero de s-ro Leopold Patek

Lastatempe ni ricevis leteron de nia aŭstria peranto s-ro Leopold Patek, en kiu li rakontis al ni du interesajn epizodojn. El tio ni supozis, ke multaj aliaj perantoj niaj, same kiel li, kaptas ĉiun eblan ŝancon por propagandi nian gazeton. Pro tio ni esprimas koran dankon al ili ĉiuj. Kaj samtempe ni esperas, ke ili letere prezentos al ni siajn travivaĵojn, sperton kaj proponojn en tiu rilato. Ĉi - sube estas letero de s-ro Leopold Patek.

La Red.

Anstataŭ skribi gratulan leteron — okaze de via 30-jara jubileo de EPĈ — mi rakontas al vi pri du agrablaj epizodoj, travivaĵoj dum mia agado por EPĈ.

Kiel jam konata por vi, mi ĉiam dum mia deĵoro — kiel trajnestro kun kondukatoraj taskoj — montras al miaj pasaĝeroj EPĈ-ekzemplerojn.

MALAVARA SINJORINO

Iam survoje mi donis en vagonaro al maljuna sinjorino kelkajn ekzemplerojn de EPĈ. Ŝi longe rigardis la fotojn kaj bildojn kaj ili ege plaĉis al ŝi. Kiam ŝi redonis al mi la ekzemplerojn, ŝi samtempe abrupte donis al mi ankaŭ monaĵon de ÖS 20, por ke mi donacu du ekzemplerojn de EPĈ al interesigontaj pasaĝeroj. Ŝi ege bedaŭris, ke ŝi jam estas tro maljuna por eklerni Esperanton, sed per EPĈ ŝi ekkonis la valoron de Esperanto kiel pontlingvo inter la popoloj.

ENTUZIASMIĜINTA MUZIKISTO

Alian fojon mi donis kelkajn ekzemplerojn de EPĈ al sinjoro bone vestita. Li trarigardis la ekzemplerojn kaj, kiam li trafolumis la 5-an numeron de EPĈ, li tuj haltis rigardante la paĝojn 42/43. Sur tiuj du paĝoj troviĝas la kanto "Tintsonoras Fonto (Soprana solo)". Li tuj entuziasmiĝis pri la kanto kaj kiel fakulo li diris ke ĝi estas tipa ĉina kanto kaj, ĉar li estas muzikisto, li volonte volu havi la kanton. Nature mi plenumis lian deziron kaj li dankinte kun granda ĝojo sur sia vizaĝo elvagoniĝis.

* * *

Estas nur du epizodoj, tamen ili bonege montras al vi, kiel ŝatata estas EPĈ ankaŭ ĉe la neesperantista publiko.

Ĉu tiu ĉi fakto ne ankaŭ estas gratulo al via 30-jara jubileo?



GLACIA TEO KAJ RAPIDE SOLVEBLA TEO

Glacia teo estas speciala produktaĵo de Usono. Unue plenigu 2/3 de la taso per glacio, poste enverŝu la teon kaj certan kvanton da mielo, kaj fine enmetu unu aŭ du pecojn da freŝaj citronoj. Jen pretiĝas la refreŝiga trinkaĵo dolĉa, acida kaj acerba. De junio ĉiujare, la glacia teo estas vendata en ĉiuj restoracioj, hoteloj kaj aliaj publikaj lokoj.

Usonanoj trinkas ĉefe rapide solveblan teon, ĉar ĝi estas simple kaj rapide pretigebla. La nomita teo estas pretigita el pulvorigita miksaĵo de teo, limono (aŭ kratagfrukto) kaj grajneca sukero, kiu povas esti rapide solvita en akvo.

TEO-SAKO KAJ POSTTAG- MEZA TEO

La Britaj Insuloj ne produktas teon, tamen tie la konsumkvanto de teo estas grandega. Laŭ statistiko, ĉiu brito fortrinkas pli ol 10 funtojn da teo ĉiujare. Antaŭe en Britio teo estis vendata en kafejo kaj apoteko. La unua novaĵ-anonco pri teo aperis en *Mercurius Politicus*, Londono, en 1658: "La bonega kaj de ĉiuj kuracistoj aprobita ĉina trinkaĵo, nomita de la ĉinoj *Ĉa*, dum de aliaj nacioj teo, estas vendata en la Kafejo Sultanina Kapo de la Reĝa Borso, en Sweetings Rents, Londono."

La britoj ŝatas trinki fortan brunan teon, faritan el teo senrekrementigita per filtrado, bovina lakto kaj sukero. Ili tre atentis la tetrinkadon en 4:30 p.m. Somere tre furoras la posttagmeza trinkado sub la libera ĉielo, kaj en ĉiuj parkoj troviĝas tetrinkejoj. Vintre, jam mallumiĝas en la kvara p.m. en la kamparo, oni bruligas lignokarbon por kuiri teon. Poste la tuta

Tetrinkado en Diversaj Loko

familio sidiĝas ĉirkaŭ tablo kaj kune trinkas la teon.

La pretigado de tia teo estas: komence oni kuiras ĝin en kruĉo, en kiu troviĝas filtrilo kiu povas disigi la tefoliojn dis de la akvo. Kaj poste oni simple infuzas ĝin per teosako. Oni metas tefoliojn en saketon el filtra papero ligitan kun karteto per fadeno. Dum infuzado, la trinkajo elfiltrigās tra la papero sen eliĝo de la rekremento. Post preparado oni tiras la karteton pendantan ekster la taso kaj forĵetas ĝin kune kun la sako. Tia teo estas kaj pura kaj oportuna por trinki.

MENTA TEO

Maroko, Tunizio kaj Alĝerio en la Norda Afriko estas grava merkato de verda teo en la mondo pro ilia geografia situo apud tropiko konvena por trinkado de tia teo. La loĝantoj de la supre diritaj landoj kutime enmetas 2-3 freŝajn mentajn foliojn en la teakvon kaj poste iom da kando. Verda teo, mento kaj kando ĉiuj estas refreŝigajoj. Trinkante teon, ili kutimas manĝi panon kaj olivon. En la festotagoj ili kutime prezentas al gastoj tri tasojn da teo, kiujn la lastaj devas fintrinki pro ĝentileco.


La nordafrikanoj ŝatas trinki teon kaj lertas taksu ĝian kvaliton. En la te-vendejo troviĝas tea trinkilaro por ke klientoj gustumu teon. Laŭ kutimo oni unue infuzas tason da teo kaj trinkas ĝin por konstati ĝian kvaliton, antaŭ ol aĉeti ĝin.

TECEREMONIO KAJ PULVORIGITA TEO

Teceremonio jam havas historion de 500 jaroj en Japanio, ĝi similas ankaŭ al la moderna kunveno. Partoprenantoj de teceremonio estas nomataj tetrinkantoj, kiuj ofte in-

vitas unu alian. Teceremonio okazas en speciala ĉambro. Ĉe la enirejo estas krad-pordo malpli alta ol unu metron, tra kiu ĉiuj vizitantoj devas klini sian korpon por eniri, se vizitanto estas militisto, li devas depreni la spadon antaŭ ol eniri. La ĉambro estas ornamita estetike, la ornamaj floroj devas konformi al la sezono. Ekz., en neĝa tago anstataŭ blanka umeo, oni uzas kameleon aŭ sakuron, kiu aŭspicias printempon. En somero oni enmetas en vazon freŝan lotusfloron. Se el la gastoj troviĝas iu, kiu bone konas teceremonion, li estas invitata al la honora loko de la tablo, kaj ties kapo devas esti razita, kio simbolas purecon. La teceremonio okazas matene (en la 7-a atm.), post matenmanĝo (en la 8-a atm.), tagmeze kaj vespere (en la 6-a atm.) respektive. En la te-salono oni parolas nenion alian krom novaĵoj pri teceremonio.

En la teceremonio oni uzas verdan teon, pulvorigitan per ŝtona pistilo. La pulvorigita verda teo originis el Ĉinio. Antaŭ la 13-a jarcento la ĉinoj trinkis pulvorigitan verdan teon. Tiam oni vaporumis freŝan teon kaj muelis la jam sekigitajn tefoliojn per ligna muelilo kaj konservis la pretigitan teon en argila vazo, pri kio detale priskribis "Libro pri Teo", la unua verko pri teo en Ĉinio verkita de Lu Yu en Tang-dinastio (618—907 p.K.). Dum la teceremonio la gastiganto enverŝas du lignajn kulerojn da pulvorigita verda teo en tason, infuzas ĝin per bolanta akvo kaj kirlas ĝin per bambua bastoneto. La te-trinkajo estas densa kvazaŭ sojolakto. La uzata taso estas raspa kaj porhava, dense glazurita aŭ oranĝkolora aŭ nigra. Oni ĉiam prezentas la unuan tason al tiu kiu okupas la honoran sidlokon, kaj la lasta devas levi la tason ĝis la frunto kaj poste trinki ĝin. Li devas trinki kun bruo, per tio li esprimas sian laŭdon al la bona teo. Fintrinkinte, la gastiganto kaj la gastoj interŝanĝas ĝentilajn vortojn kaj fine disiĝas kun granda plezuro.



Panorama de Esperanta Literatura

Jen estas nova libro pri literaturo Esperanta kaj traduka, kom-

pilita de bone konata verkisto kaj vortaristo Marinko Ĝivoje kaj eldonita de la Internacia Kultura Servo de Zagrebo, Jugoslavio. En sia libro la aŭtoro prezentas valoran trarigardon pri Esperanta literaturo ekde Zamenhof ĝis la nuna tempo, kun specimenoj poeziaj kaj prozaj de plej gravaj verkistoj. Nun mankas al la esperantistoj tia samspeca libro. Ĝi certe interesas niajn legantojn.

281 pĝ. 14 gld. (aŭ agalvaloro)

Havebla ĉe la eldonisto aŭ aŭtoro Marinko Ĝivoje, P.p. 5025, Yu-41040 Zagreb, Jugoslavio

En la hejmloko de orharaj simioj

de ZHANG JIAQI kaj
WANG GUANGYA

INTER la raraj animaloj en la mondo la orhara simio egale famas kiel la granda pando. Ili ambaŭ estas animaloj sub unuagrada protektado en Ĉinio. Pro sia speciala vivkutimo la orhara simio estas malfacile bredebla kaj malofte ekspoziciata en la zoo. Tamen en la Beijing-a Zoologia Ĝardeno oni povas pririgardi ĝian plaĉan vizaĝon.

La orhara simio havas du sagacajn okulojn en la blua vizaĝo, tufon da hirtaj nigre brunaj haroj sur la verto, cirklon da rufaj haroj ĉirkaŭ la kolo. Ĝia abdomeno estas griza. Ĝia malhele bruna vosto havas longecon de ĉ. 80 cm. same kiel la korpo. En la kaĝo ĝi iradas tien kaj reen kvazaŭ ne al kutimiĝanta al la vivo en tiu malgranda spaco.

La orharaj simioj vivas, kiel la grandaj pandoj, plejparte en la montaroj de nordokcidenta Sichuan, sudaj Gansu kaj Shaanxi. Ankaŭ en Shennongjia de Hubei troviĝas iliaj spuroj.

En profunda aŭtuno, survoje al Chengdu, ni informiĝis ke aro da orharaj simioj aktivadas apud la observejo de la natura rezervejo Wolong. Jen venis bona ŝanco por rigardi orharan simion, ni do ekveturis tien frumatene de la sekvanta tago.

Tiu natura rezervejo situas en Wenchuan-gubernio je 136 kilometroj for de Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco. En la areo de 200,000 hektaroj kreskas 4,000 spe-

cioj de vegetaĵoj kaj vivas pli ol 200 specioj de birdoj kaj 54 specioj de bestoj, el kiuj troviĝas, krom orhara simio, ankaŭ aliaj raraj animaloj protektataj de la ŝtato kiel granda pando, blanklipa cervo, bubala antilopo (*Budorcas tasicolor*). En 1975 la Ŝtata Konsilantaro sankciis tiun lokon kiel naturan rezervejon, kaj en januaro ĉijare ĝi fariĝis unu el la rezervejoj de internacia biosfero de UN. Ĉi tie estas altaj montoj kaj profundaj valoj, aŭdiĝas nur bird-kantado kaj akv-murmuro. Tiam la arbaroj de la valoj estis kovritaj de prujno, dum la montpintoj estis jam kovritaj de neĝo.

Gvidataj de Zhou Shoude el la esplora grupo de la rezervejo, ni surgrimpis montdeklivon, ĉ. 300 metrojn altan kaj atingis la montsupron sin trovantan kontraŭ Yusi-kaverno kie moviĝas orharaj simioj. Ni decidis tranokti tie en domo kampula. Montrante la silentajn arbarojn apud la kaverno, la gastigantoj unu post alia rakontis al ni kiel moviĝas la orharaj simioj, kiel ili trinkas frumatene ĉe la rojo de la profunda valo kaj kiel ili petolas en la arbaro sur la montdeklivo.



Frumatene de la sekvanta tago la dommastro volonte rekomendis sin por servi kiel nia gvidisto. Post unu-hora grimpado ni penetris en la arbaron de Yusi-kaverno. La gvidisto kaj Zhou mistere admonis ke ni ne parolu kaj ŝtele proksimiĝu al la simioj. La tieaj orharaj simioj ne dresitaj tuj forkuras rapide pro surprizo de io ajn eksterordinara.

Je nia proksimiĝo al la simiaro aŭdiĝis ĝia blekado "U—U—!" kvazaŭ en brua strato. La gvidisto admonis ke ni bone kaŝiĝu, kaj li mem preteriris al la kontraŭa flanko kaj ekpelis la simiaron al ni. Post momento ŝajne trupo ekmoviĝis antaŭen ĉe la monttallo. Proksime al la montpinto, nia vidkampo fariĝis vasta, ni trovis ke en la densaj arboj je 100 metroj fore saltas flavaj buloj. La simioj saltis dekstren de branĉo al branĉo. Iuj el ili estis helflavaj kaj malalt-kreskaj, aliaj brunflavaj kaj alt-kreskaj. Iuj simiinoj portis idon en la brakoj kaj saltadis malpli rapide kaj ĉiam haltis antaŭ larĝa interspaco por serĉi malpli larĝan facile transsalteblan. Ili jen moviĝis, jen haltis kaj petolis sur arboj.

Ĉe lokoj trapasitaj de orharaj simioj estis multaj ŝiritaj branĉoj kies ŝeloj estis tute aŭ parte demor-ditaj. Iu kunvojaĝanto diris, ke en la fino de printempo kaj la komenco de somero la orharaj simioj manĝas ŝosojn kaj azaleajn florojn sur montoj, kaj en la fino de somero kaj la komenco de aŭtuno, kiam maturiĝas fruktoj sur montoj, venas la plej bona tempo en la tuta jaro por ilia manĝado. Ni venis tien en tempo kiam proksimiĝis vintro kaj malabundis manĝaĵoj en la mont-regiono, do ili povis nutri sin nur per arboŝeloj.

Forlasinte Yusi-kavernon, ni venis en la kampadejon de la esplora grupo pri raraj animaloj de la rezervejo. Tie estas tre proksime al la loko kie ofte moviĝas grandaj pandoj kaj orharaj simioj. Ni urĝe demandis tiun grupon pri orhara simio kaj petis ke ĝi helpu nin fari planon por ree pririgardi la simiojn. Peng Jiagang, laboristo de tiu grupo, estas el tiea ĉasista familio kiu okupiĝis pri ĉasado de multaj generacioj, bone scias, kiel vivas kaj agadas la orharaj simioj. Li konstatis, ke grego da simioj translokiĝos tien en la antaŭtagmezo de la sekvanta tago.

Vespere, ni aŭskultis, sidante ĉirkaŭ fajro, multe da rakontoj pri orhara simio.


Antaŭ la Liberiĝo multe da ĉasistoj kaptis orharan simion nur por vendi ĝian felon malpezan, molan, varmkonservan kaj belkoloran. Ĝia prezo estas difinita laŭ longeco de la plej longa haro sur la dorso, nome tiom da arĝentaj dolaroj ĝi valoras kiom tiu longeco egalas al alta stako de arĝentaj dolaroj. La plej valora felo kostis 30 aŭ 40 dolarojn. Pro ĉasado, la orharaj simioj reduktiĝis grandnombre. Antaŭvespere de la fondiĝo de la rezervejo estis tre malfacile trovi gregon el pli ol 50 tiaj simioj. Depost la establo de la rezervejo la nombro de orharaj simioj rapide pliiĝis, kaj ofte vidiĝas gregoj el 200-400 kapoj. Oni diras ke la simiino naskas aprile aŭ maje, ĝia graveda periodo ĝenerale daŭras ses monatojn.

La sekvantan matenon la orharaj simioj efektive proksimiĝis al nia kampadejo, kiel Peng antaŭjuĝis. Ni rapide deiris de la vojstreko kaj enŝteliĝis en ĝangalon. Momenton poste, la simioj svarme venis renkonte al ni, saltante kaj kriante. Ni sidis kun pacienco inter la arbustoj de kie ni povis klare vidi ĉion antaŭ

ni, kaj silente rigardis ilian moviĝon.

La orharaj simioj bruis sur arboj je 50-60 metroj for de ni. Eble iuj jam rimarkis nin kaj rigardis nin kun manplato ĉe la brovoj. Aliaj jen forkuris jen proksimiĝis tute sen paniko. La simiinoj metis la portatajn idojn sur branĉojn eble por instrui al ili grimpadon kaj ilin kuraĝigis. Ni jam tute absorbiĝis en tiu sceno. Pum! subite desaltis bluvizaĝa orhara simiego de super nia kapo kaj haltis nur je 1-2 metroj for de ni, ĝi scivoleme rigardis Zhang kaj poste forkuris panike. Tio teruris Zhang ĝis ŝvito. Tamen fakte la simioj ne atakas homojn, se la lastaj ne ofendas ilin. Eble pro la forkuro de tiu simiego, la ludantaj simioj ĉiuj forkuris ĝin sek-vante.

Ĉe la adiaŭo la estro de la administracio sciigis nin ke la supera aŭtoritato jam decidis transformi tiun regionon en rezervejon por turistoj, kaj oni konstruos ankaŭ bredejojn de grandaj pandoj kaj orharaj simioj. Se oni ankoraŭfoje venos ĉi tien post kelke da jaroj, oni povos pli facile viziti la vivejon de orharaj simioj kaj reveni al Chengdu en la sama tago.



* K-dino S.A.M. Tillema-v.d. Hem, kun virinoj en Ĉinio kaj Afriko pri vivcirkonstancoj, virinaj aferoj, ktp., adr.: Helen Kellerlaan 2, 3818 LY Amersfoort, Nederlando.

* R. Kok, 20-jara studento, pri biologio, scienca esplorado, biografioj de usonaj politikistoj, adr.: Duinoordstraat 89, 2023 WC Haarlem, Nederlando.

* Gek-doj R. kaj J. Prins, 40-jaraj inspektoro pri purigado kaj

sekre-ino, adr.: pere de S-ro B. de Wit, Leidsevaart 52, NL 2114 AD vogelenzang, Nederlando.

* F-ino Elizabeta Tauzdvska, 17-jara lernantino de mezlernejo, kun ĉinaj aŭ aliaj Esp-istoj pri ĉiuj temoj, adr.: UL. ML. Robotnika 20/18, 83-262 Czarna Voda, Voj. Gdansko, Pollando.

* Ryszard Szczygiel, kun geĉinoj kaj esperantistoj el Orienta Azio interŝ. poŝtmarkojn, bildkartojn kaj E-librojn, Str. Szeroka 24, 67-115 Bytom Odrzanski, Pollando.

* S-ro Ignaco Doboš, Cas. post 70, R - 8700 Constanta 1, Rumanio, serĉas korespondamikojn por niaj gelernantoj (12-15-jara) tutmonde.

* Dana-Ligia Ilin, studentino, p/a kamarado Constantin Dominte, str. Armasul Marcu, nr. 11, bl. 24, ap36,73519 - Bucuresti - III, S.R. Rumanio, dez. kor. kun ĉinaj gestudentoj pri teatro, filmo, pentroarto, ĉinaj lingvo kaj literaturo.

* Japana Esperanto - Korespondo-Servo ĉiam volonte akceptas korespondo - petojn el Ĉinio. Japanaj samideanoj atendas vin. Skribu al Japana Esperanto-Korespondo-Servo, ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonakasi, 561 Japanio.

* S-ro JoCooke, torfa fakulo, Gt. Connell Rd. Newbridge, Co. Kildare, Irlanda Respubliko, dez. kor. kun ĉinaj torfaj spertuloj.

USONAJ AMIKOJ EN TIBETO

Ok-persona vizitgrupo de la Usona-Ĉina Popola Amikeca Asocio faris unusemajnan viziton al Tibeto en julio ĉijare. Gvidate de la prezidanto de tiu asocio s-ino Unita Blackwell, la grupo vizitis Potalapacon, templojn, lernejojn kaj komunumon.

La gastoj veturis al iu popola komunumo for de Lhasa je 50 kilometroj por ĉeesti antaŭrikoltan festivalon kaj tie rigardis la tibetan rajdkonkurson.

Dr. Marvin Dunn kaj dr. William Q. Wu vizitis hospitalon de tradicia tibeta medicino kaj estis profunde impresitaj de ĝia esplora laboro.

La gastoj havis interparolon kun Tubdain Danda, ekssekretario de Dalai-lamao, viva budho Raique Dandzim Jigme kaj Tubdain Tamba, la antaŭa sutra instruisto de Dalai-lamao. Ĉiuj ĉi tri tibetanoj diris ke la decido de la Centra Komitato de KPC pri promocio de tibetaj oficistoj por anstataŭi la grandnombrian han-nacian oficistaron havas

La Nov-Irlanda Ĉambra Orkestro en Beijing



gravan signifon kaj utilas al efektivigo de la politiko pri nacia regiona aŭtonomeco.

GERMANA KAJ NOV-IRLANDA ORKESTROJ EN ĈINIO

La Germana Ĉambra Orkestro kaj Nov-Irlanda Ĉambra Orkestro vizitis Ĉinion en la fino de julio.

La unua okazigis koncertojn en Shanghai, Shenyang, Changchun, Harbin kaj Beijing, ludante "Kordan Divertimenton" de Mozarto kaj "Kvarteton de Lignaj Blovinstrumentoj" de Stamiz kaj "Septeton en E Majora kun Bemolo" de Betoveno k. a. La lasta prezento en Beijing estis plenumita kune kun la Ĉina Brodkasta Simfonia Orkestro.

La dua estis la irlanda arta trupo, kiu la unua venis al Ĉinio por kultura interŝanĝo, post establo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Irlando. Dum la vizito ili faris koncertojn en Beijing, Chengdu kaj Xi'an, ludante la "Divertimenton en D Majora" de Mozarto kaj "Kantaton 'Geedziĝo'" de J. S. Bach k. a. Sopranulo Arene Sandford kantis klasikajn irlandajn popolkantojn kaj ĉinan kanton.

Iliaj rafinitaj ludoj estis varme aplaŭditaj de la ĉinaj spektantoj.

CINA - FRANCA GEOLOGIA ESPLORA GRUPO EN HIMALAYA

En la 29-a de julio la nomita grupo forlasis Lhasa kaj iris al Himalaya por fari geologian esploron kaj geofizikan prospektoradon. Ili restis tie pli ol unu monaton.

La ĉinaj kaj francaj geologoj ĉefe studis la geologian strukturon, la formiĝon kaj evoluon de la krusta mantelo de la tero. Tio estis la unuafoja kuna esploro pri Himalaya fare de ĉinaj kaj alilandaj sciencistoj.

Profesoro geologo F. Proust kaj aliaj sume 12 francaj geologoj partoprenis en tiu esploro. Ili estis la unua grupo de francaj sciencistoj en tiu laboro.

JAPANA "KNABINETO" MIHOKO EN ĈINIO

La japana "knabineto" Mihoko kaj ŝiaj familianoj invitate vizitis Ĉinion en julio. Ŝi estis savita de soldatoj de la ĉina Okavoja Armeo el la militfajro kaj redonita de Generalo Nie Rongzhen al Japana Stabo antaŭ 40 jaroj.

En la 7-a de julio, Mihoko, kune kun ŝiaj edzo kaj tri filinoj, estis akceptita de Nie Rongzhen, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio. Manpremane kun Nie, Mihoko diris kun larmoj, ke antaŭ 40 jaroj, la ĉina popolo, plena de humaneco, savis ŝin kaj nun ŝi povis veni al Ĉinio, ŝia naskolando, kaj plie vidis Generalon Nie mem, pro kio ŝia sento estas neesprimebla per vortoj. Ŝi diris ke ŝi certe faros kontribuon por amikeco de niaj du landoj. Nie diris, ke Ĉinio kaj Japanio estas najbaroj apartigitaj de nura akvoŝtiro kaj niaj du popoloj devas vivi en amikeco generacion post generacio.

Mihoko kaj ŝiaj familianoj vizitis Jingxing proksime de Shijiazhuang,

Hebei-provinco, kie ŝi vivis en la infaneco, kaj estis bonvenigitaj de la tieaj popoloj. Informiĝinte pri tio, multe da lokaj kampuloj veturis kelkajn kilometrojn por rigardi la tiaman japanan knabon.

HISPANAJ MUZIKISTOJ EN BEIJING

Sep hispanaj muzikistoj el Ibera Duoninsulo donis kvin specialajn koncertojn voĉajn kaj instrumentajn al la Beijing-aj urbanoj en julio ĉijare.

En la koncerto gitaristo Jose Luis Lopategui konigis la klasikan hispanan gitaron. Kantisto Carmen Bustamante kantis popolajn kantojn de Cataluna kaj verkon de Enrique Granados. Violonisto Pedro Leon ludis kun patoso "Kanton de Ciganoj" de Pablo De Sarasate, konatan kaj ŝatatan de la ĉinaj aŭskultantoj. Flutisto Josefina Sanmartin delectis la spektatorojn per sia

La franca ĉefministro Raymond Barre gratulas ĉinajn Beijing-operajn geaktorojn.



ĉarma ludado. Leonra Mila dufoje gajnis premion en la internacia ludado de piano, pro sukcesa prezentado de la komponaĵoj de Robert Schumann "Sceno de Infaneco" kaj "Sonato en G Minora".

BEIJING - OPERA TRUPO DE YUNNAN - PROVINCO EN LA OKCIDENTA EŬROPO

La Beijing-opera Trupo de Yunnan-provinco vizitis Francion, Ita-

lion, Aŭstrion, Liĥtenŝtejnon kaj Svislandon, de la 11-a de aprilo ĝis la 9-a de julio. La 68 prezentoj havigis al si 150 milojn da spektatoroj.

La prezentado de la ĉinaj artistoj profunde impresis la spektatorojn de la Okcidenta Eŭropo. Iu svisa filmisto diris, ke li spektis Beijing-operon en 1955, kaj post ĉi-foja rigardo li estas certa, ke Beijing-opero ne nur heredis sian tradicion, sed ankaŭ faris novan kreon.



(daŭrigo de la 21-a paĝo)

prenoj de tutpopola posedsistemo sed ankaŭ en la produktaj taĉmentoj de la popolaj komunumoj de kolektiva posedsistemo. Konkrete dirate, plenuminte la taskon de la vendo de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj al la ŝtato, la produktaj taĉmentoj povas, laŭ la loka kondiĉo, disvolvi agrikulturan produktadon kaj aliajn ekonomiajn branĉojn kaj vendi en la merkato parton de siaj produktaĵoj. Tio ludas gravan rolon por vigligi la kampanon ekonomion kaj mobilizi la aktivecon de la kampanoj.

Kvankam la memdecidaj rajtoj de entreprenado estas ankoraŭ nesufiĉe ampleksaj kaj reformado al la antaŭa ekonomia sistemo estas ankoraŭ neradikala, tamen tio jam rikoltis rimarkin-


dajn ekonomiajn rezultojn en iuj entreprenoj. Ni prenu kiel ekzemplon 300 entreprenojn en Sichuan-provinco, kiuj provis tiun metodon. Ilia totala profito en 1979 kreskis multe pli ol tiu en 1978 kaj estis ĝenerale pli alta ol tiu de la entreprenoj, kiuj ne faris tian provadon. Dank' al pliigo de memdecidaj rajtoj la 300 entreprenoj liveris al la ŝtato pli da profito kaj kreis por la socio pli da riĉaĵoj. Kaj plie, estas rompita la malnova ekonomia sistemo multjare katenanta la disvolviĝon de la produktaj fortoj kaj ekviglis la antaŭe stagna ekonomia vivo dank' al la interna impulsa forto. La ĝenerala direkto en la reformo de la ĉina ekonomia administrasistemo celas ŝanĝi la tro centralizitan ŝtatan administrasistemon (la centran kaj la lokan),

pliigi memdecidajn rajtojn de la entreprenado kaj rajtojn de ĝiaj oficistoj kaj laboristoj por partopreno en administrado, ŝanĝi unusolan laŭplanan reguligon en laŭplanan reguligon kaj merkatan reguligon en kombino kaj ŝanĝi la ekonomian administradon ĉefe per administraciaj organizoj kaj administracia metodo en tiun ĉefe per ekonomiaj organizoj kaj ekonomia metodo.

La reformado al la ĉina ekonomia sistemo celas plene disvolvi la superecon de la socialisma sistemo. Tia reformado servas por altigi la efikon de la ekonomia laboro, akceli nian modernigon kaj firmigi kaj perfektigi nian socialisman sistemon, unuvorte, por plibonigi la popolan vivon. Tial ĝi ricevis plenan subtenon de la tuta ĉina popolo.

Ŝanĝiĝo de Ĝino-regiono

de QIU DONG



Ĝino-monto, kie dense loĝas la ĝino-oj

KARA amiko, ĉu vi iam vizitis Ĝino-monton? Se ne, do mi volonte servos kiel via gvidisto por viziti la lokon.

Ĝino-monto situas en Jing-hong-gubernio de Xishuangbanna, Yunnan-provinco. Tie koncentre loĝas pli ol dek mil ĝino-oj. En junio de 1979 la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko proklamis, ke la ĝino-oj estas agnoskitaj kiel sendependa nacimalplimulto, sekve do nia granda multnacieca familio ekhavis novan membron.

BELA PEJZAĜO

La bela Ĝino-monto situas en la subtropika zono. Kiam vi atingas la montkreston laŭ pado en la primitiva arbaro, antaŭ vi sterniĝas vasta ondanta nuba maro. La ĉarmaj ĉielskrapantaj montoj, kvazaŭ izolitaj insuloj en la senlima ondanta maro, jen emerĝas, jen malaperas. Malsupren irante, vi vidas tute alian pejzaĝon: La milde leviĝanta montdeklivo estas punktita tie kaj tie de bambuaj domoj, apud kiuj prosperas verdaj bambuoj kaj bananujoj. La ŝtuparaj rizkampoj kvazaŭ flirtantaj rubandoj etendiĝas de la montpiedo ĝis la talio kaj trembrilas sub la suno.

DILIGENTAJ KAJ BRAVAJ ĜINO-OJ

La ĝino-oj havas siajn apartajn vestojn. Viroj kun turbano portas senkoluman blankan veston el ŝtofo kun koloraj horizontalaj strioj kaj pantalonon el blanka tolo. Virinoj surhavas pintorman kufon faritan el du kunkudritaj samgrandaj blanktolaj kaptukoj kun koloraj vertikalaj strioj, iliaj vestoj ĝenerale similas al tiuj de la viroj kaj nur la strioj estas pli larĝaj kaj koloroj pli multaj. Ili portas mallongan nigran jupon borderitan per ruĝa ŝtofstrio. Estas interese, ke sur la kvadrata ruĝa ŝtofpeco sur dorso de la vira vesto estas multkoloraj rondaj silkaj brodaĵoj de malsamaj desegnoj.

La plenkreska viro ĉiam portas kun si pafilon, bovkornan pulvujon kaj sakon da plumbaj kugloj. Ĉasado estas ne nur ilia grava rimedo por akiri manĝaĵojn sed ankaŭ simbolo por demonstri la bravecon. Laŭ tiea kutimo, la ĉasisto devas alglui tufeton da haroj ŝiritaj de la predita besto sur sian pafiltubon. Tie oni taksas la bravecon de la ĉasistoj ĉiam laŭ la kvanto de la haroj algluitaj sur la pafiltubo.

La ĝino-aj virinoj estas diligentaj. Ili kunportas dorskorbon kaj ŝpinilon ĉiam, kiam ili iras al laboro, aŭ por propraj aferoj. Ili uzas dorskorbon por porti semojn, kemisterkon, rikoltitan grenon k. a. Kvankam ŝoseoj jam atingis nemalmultajn produktajn brigadojn kaj traktorojn oni povas veturigi ĝis montsupro, tamen dorskorbo kiel tradicia transportilo restas ankoraŭ uzata de la tieaj virinoj. La ŝpinilon ili uzas por ŝpini fadenon dum irado. Per tiuj linaj fadenoj ili teksas ŝtofojn kaj per tiuj ŝtofoj ili faras vestojn de la nacia stilo.

UZO DE BAMBUO

Ĉu ĉe la montpiedo, aŭ apud la murmurantaj torentoj, ofte videblas prosperaj verdaj bambuoj. Eble vi ne povas imagi kiel intimajn rilatojn havas la bambuoj kun la produkto kaj vivo de la ĝino-oj.

Dum jarcentoj la ĝino-oj uzis ŝpateton kaj ŝovelileton kun bambuaj teniloj. La de ili vaste uzataj korboj estas plektitaj el bambuoj, kaj ankaŭ iliaj domoj estas konstruitaj per bambuoj. Koncerne iliajn ĉiutagajn vivbezonaĵojn instrumentojn kiel sitelo,

pelvo kaj eĉ “kaldrono”, ili ĉiuj estas faritaj el bambuoj. Oni diras, ke estas aparte bongusta la rizaĵo pretigita en freŝa bambua tubo, kiu povas elteni fajron en kelkaj tagoj sen ia ajn difektiĝo. Tamen kun plialtiĝo de la produkto kaj vivnivelo nun ili jam uzas ferajn aŭ aluminiajn kaserolojn por kuirado.

En la pasinteco la ĝino-oj ne havis skriban lingvon, tial ili notis aferojn sur bambupecoj per gravurado.

LA SUFERPLENA PASINTECO

Antaŭ 30 jaroj la ĝino-oj ankoraŭ vivis en la periodo de klana komunumo, t.e. inter la lasta periodo de primitiva socio kaj komenco de klasa socio. Pro la primitiva terkulturado la produktokvanto de maizo, rizo kaj kotono estis tre malgranda kaj ĉiujare 7-8 monatojn ili vivtenis sin per kolekto de sovaĝaj legomoj kaj fruktoj kaj ĉasado.

Eĉ en tiaj mizeraj kondiĉoj la kuomintanga registaro kaj feŭdaj sklavmastroj de taj-a nacieco neniom malstreĉis siajn

ekspluaton kaj subpremado al la ĝino-oj. En 1941 la ĝino-oj faris insurekcion skuantan la tutan Xishuangbanna. Ĝi daŭris tri jarojn kaj fiaskis nur pro supereco de la malamika forto. Rezulte de tio pli ol 20 el la 36 ĝino-aj vilaĝoj estis forbruligitaj kaj multaj popolanoj masakritaj kaj post tio ilin atakis epidemio kaj malsato. Tial en 1949, t. e. antaŭvespere de la Liberiĝo, la nombro de la ĝino-oj reduktiĝis de pli ol 9,000 al nur ĉ. 4,000.

SALTEGO TRANS JARCENTOJ

La fondiĝo de nia popola respubliko alportis novan vivon al la ĝino-oj. Por liberigi ilin el mizereco, la ŝtato donis al ili grandan monsumon kaj multajn materialojn, sendis instruistojn kaj kuracistojn kaj samtempe aktive kulturis iliajn proprajn funkciulojn.

Hodiaŭ, granda ŝanĝiĝo okazis al galiguoqing-vilaĝo, la sidejo de la gvida organo de la Ĝinomonta popola komunumo, kie loĝas plejparto de la ĝino-oj.




Laboristino Dao Huanzhen de ĝino-nacieco


En tiu pitoreska regiono troviĝas multaj rizkampoj, kaj staras vicoj da tegolitaj domoj kaj etaĝdomoj. Krome estas vendejo, lernejo, hospitalo, poŝtoŝtanco kaj hotelo. Eble neniu povas imagi, ke ĝi estis loko tute senhoma antaŭ 1958.

“Noti aferojn per gravuro sur bambuo” jam fariĝis historio. Nun ĉiu el la 41 produktaj brigadoj de la komunumo havas sian elementan lernejon, preskaŭ ĉiuj lernaĝaj infanoj vizitas lernejon. Krom elementaj kaj mezgradaj lernejoj, kiuj troviĝas en ĉiu vilaĝo, la ĝino-oj havas pli ol 10 studentojn de superaj lernejoj.

Por eterne forpasis la tagoj, kiam oni terkulturis per fajro kaj glavo. Nun tiea agrikulturo akiris grandan disvolviĝon. La meznombra produktokvanto de greno por ĉiu homo jam superis 500 kilogramojn. Ĉie en tiu komunumo oni povas vidi trakto-rojn laborantajn surkampe. Ili estas atesto de progreso de tiu nacieco en agrikulturo.



Bu Lupiao, teknikisto de la traktora riparejo de Jinghong - gubernio, estis studento de la unua generacio de la ĝino-oj.



La Nanchang-a Leviĝo (Olepen-traĵo)

ZHANG BAOGUI:


La Nanchang-a Leviĝo

HISTORIA FONDO

Malsukcesis la Unua Granda Revolucio de la ĉina popolo, okazinta en la periodo de 1924-1927. Por starigi sian regadon, Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek) praktikis teroron kaj kruele subpremis revoluciajn fortojn, tial la tutlanda revolucio sin turnis en malaltan tajdon.

Tamen la ĉinaj komunistoj ne estis timigitaj sed decidis lanĉi armitan leviĝon en Nanchang por savi la revolucion.

Tiutempe la Komunista Partio jam gvidis parton da armeo en la Nacia Revolucia Armeo. Tiam la fortoj disponeblaj por ĝi estis jenaj: en Jiujiang, la 24-a kaj 25-a divizioj de la 11-a armeo, komandataj de Ye Ting, kiuj konsistis el 10,000 personoj kaj ĝuis honoran titolon "Fera Armeo" en la Norden-Ekspedicia Milito; la 20-a armeo el ĉ. 20,000 personoj, komandata de fama generalo He Long, kiu multfoje faris brilant meriton en la Norden-Ekspedicia Milito kaj estis forte influita de la Kompartio; en Nanchang, la Tria Oficirotrejna Regimento gvidata de Zhu De; kaj en Wuhan, la



EL ĈINA MODERNA HISTORIO

Gvardio de la Wuchang-a Nacia Registaro kaj kursanoj de la Wuhan-a Filio de la Centra Milita kaj Politika Lernejo. La supre menciitaj fortoj, kiuj povis koncentriĝi en Nanchang, konsistis sume el pli ol 30,000 personoj. Sed en Nanchang tiam la malamiko havis nur kvar regimentojn kun 6,000 personoj. Ĉio ĉi tio estis favoraj kondiĉoj por la Nanchang-a Leviĝo.

La ĉambro n-ro 25 de la dua etaĝo de la domo de la ĉefkomandejo de la Nanchang-a Leviĝo, kie kunvenis Zhou Enlai kaj aliaj gvidantoj.

PREPARO POR LA LEVIĜO

En la lasta tagdeko de julio la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio decidis rapide koncentri tiujn trupojn al Nanchang por fari la leviĝon. Tiam kuomintangaj militaristoj Zhang Fakui, Zhu Peide k.a. kunvenis en Lushan de Jiangxi (Gianghi)-provinco kaj ordonis, ke He Long kaj Ye Ting venu al kunveno sur Lushan, intencante eksigi ilin je komandanteco. Por ne fali en la kaptilon de la malamiko, Ye Jianying, He Long kaj Ye Ting decidis ne iri al Lushan sed tuj movi siajn trupojn al Nanchang. En la 27-a kaj la 28-a de julio, Ye Ting kaj He Long, unu



post alia, venis al Nanchang kun siaj trupoj.

Tiam Zhou Enlai estis komisiita de la Centra Komitato de KPC kiel sekretario de la Fronta Partia Komitato kaj gvidis la leviĝon. Li atingis Nanchang je la 27-a de julio kaj okazigis kunvenon en la Granda Hotelo de Jiangxi. En la kunveno starigis la ĝenerala komandejo de la armita leviĝo kun He Long kiel ĉefkomandanto.

En la mateno de la 30-a, kiam la prepara laboro por la leviĝo estis fundamente plenumita, dekstra oportunisto Zhang Guotao kiel reprezentanto de la Centra Komitato de KPC haste venis al Nanchang kaj oponis kontraŭ la leviĝo per diversaj pretekstoj. Zhou Enlai k. a. faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ Zhang kaj montris ke la leviĝo ne povas esti prokrastita. La erara opinio de Zhang estis neita. Sed pro lia ĝenado la difinita dato de la leviĝo je la 30-a estis prokrastita. Fine la Fronta Partia Komitato decidis, ke la leviĝo estos farita je la 4-a horo matene de la 1-a de aŭgusto. Pro perfido de iu oficiro, la plano refoje ŝanĝigis kaj la leviĝo okazis pli frue je du horoj.

PROCEDO DE LA LEVIĜO

Posttagmeze de la 31-a de julio, la ĝenerala komandejo rapide disdonis la planon kaj ordonon pri la leviĝo al ĉiuj siaj trupoj. Ricevinte la ordonon, la soldatoj tuj entuzias-

miĝis kaj estis pretaj al batalo. Vespere la tuta urbo Nanchang estis milite regata. Je la 2-a horo matene de la 1-a de aŭgusto, pafoj rompis la noktan kvieton kaj tiel komenciĝis la leviĝo sub la gvido de Zhou Enlai, Zhu De, He Long, Ye Ting kaj Liu Bocheng. Tuj poste la leviĝintaj trupoj ekfaris pafadon kaj kanonadon al ĉiuj garnizonejoj de la malamiko en la urbo.

Antaŭ la leviĝo la ĝenerala komandejo de la malamiko jam ricevis informon pri la leviĝo kaj faris sufiĉan preparon por blokadi ĉefajn trapasejojn al la 20-a armeo gvidata de He Long, kiu suferis obstinan rezistadon de la malamiko. Gvidate de He Long, Liu Bocheng k. a. la leviĝintaj trupoj faris bravan sturmadon. Post tri-hora intensa batalado la malamiko fiaskis kaj kapitulacis.

Je la tagiĝo de la 1-a de aŭgusto, la pafado ĉesis kaj la leviĝo sukcesis. La leviĝintaj trupoj kun 30.000 personoj estis reorganizitaj en tri armeojn, He Long fariĝis ĉefkomandanto kaj armeestro de la 20-a armeo, Ye Ting ĉefkomandanto de la fronto kaj armeestro de la 11-a armeo kaj Zhu De vicarmeestro de la 9-a armeo.

KONTRAŬATAKO DE LA MALAMIKO

La venko de la Nanchang-a Leviĝo kolerigis la malamikon, kaj Jiang Jieshi kolektis de diversaj lo-


koj grandan nombron da trupoj por ataki Nanchang. Vizaĝe al la sieĝado de la forta malamiko, la Fronta Partia Komitato decidis, ke la leviĝintaj trupoj sin retiru el Nanchang kaj marŝu suden al Guangdong-provinco. Je la 5-a de aŭgusto la trupoj forlasis, unu post alia, la urbon Nanchang kaj sin direktis suden. Ĉe la urbo Rentian norde de Ruijin ili havis intensan batalon kontraŭ la malamiko, kiu baris al ili marŝadon. Konkerinte Ruijin kaj Huichang, ili turniĝis al Changting kaj Shanghang de Fujian-provinco kaj poste marŝis al Chaozhou kaj Shantou de Guangdong-provinco.

Je la 24-a de septembro, la leviĝintaj trupoj eniris en Chaoshan. Pro la longa militirado la trupoj tre laciĝis kaj ne ricevis necesan aldonon de soldatoj. Kaj la malamiko koncentris siajn fortojn ĉirkaŭ Chaoshan, kaj sieĝis ilin helpate de militŝipoj de Britio, Japanio, Usono kaj aliaj landoj. La leviĝintaj trupoj perdis la batalon ĉe Tangkeng kaj multaj soldatoj oferis sian vivon.

Por konservi revoluciajn fortojn, Zhu De kaj Chen Yi kolektis la sieĝrompintajn trupojn kaj gvidis ilin al la Limregiono de Hunan, Guangdong kaj Jiangxi por fari tie gerilan militon. En aprilo de 1928, la trupoj gvidataj de Zhu De kaj Chen Yi venis al Jinggang-montaro kaj kuniĝis kun la trupoj gvidataj de Mao Zedong, kaj ili fondis la 4-an Armeon de la Laborist-Kamparana Ruĝa Armeo. Zhu De laboris kiel armeestro, Mao Zedong partia komisaro, Chen Yi estro de politika departemento. Ekde tiam ili komencis gerilan militon en montregionoj kaj kamparo.

LA KAŬZOJ DE LA MALSUKCESO

La kaŭzoj de la malsukceso de la Nanchang-a Leviĝo kuŝas en tio, ke la fortoj de la malamiko multe superis tiujn de la leviĝintaj trupoj kaj al la revolucia gvidantaro man-



Gongyuan, kie arde batalis la armeanoj de la Nanchang-a Leviĝo, nun estas la parko "Unua de Aŭgusto".

kis ĝusta agad-direkto post la leviĝo. Strategie ili erare opiniis, ke por daŭrigi la revolucion oni devas okupi ekskluzive grandajn urbojn post la leviĝo. Tial la trupoj marŝis suden por kapti la urbon Guangzhou (Kantono) kaj refoje fari norden-ekspedicion. Pro longtempa marŝado en varmega kaj humida vetero, ili suferis seriozan perdon.

Kiam la trupoj atingis la urbojn Chaozhou kaj Shantou post longa marŝado, imperiismaj kaj kuomintangaj militŝipoj jam blokadis la marbuŝon de Chaoshan kaj malebligis al ili la alvenon de helpaj trupoj. Pro ĉio supredirita la leviĝo malsukcesis.

HISTORIA SIGNIFO

La unua pafo farita de la Nanchang-a Leviĝo je la 1-a de aŭgusto al la kuomintangaj reaktiuloj plene montris revolucionan spiriton de la ĉina popolo en sentima kaj senlaca batalo kontraŭ potencaj malamikoj, levis la batalan volon de la revolucia popolo kaj puŝis la popolan revolucion senĉese antaŭen. Post la Nanchang-a Leviĝo, eksplodis la Aŭtunrikolta Leviĝo kaj Kantona Leviĝo. Sekve stariĝis la kamparaj revoluciaj bazlokoj Jinggong-montaro, Okcidenta Limregiono de Hunan-Hubei kaj Hubei-Henan-Anhui-Limregiono. En la bazlokoj oni faris agraran revolucion kontraŭfeŭdisman kaj starigis popolajn armitajn fortojn. De tiam la ĉina revolucio eniris en sian novan historian periodon de batalo kontraŭ armita kontraŭrevolucio per armita revolucio.

Por memori la Nanchang-an Leviĝon, la Centra Registaro de la Ĉina Laborist-kamparana Demokratia Respubliko difinis en 1933: La 1-a de aŭgusto estas naskotago de popolaj armitaj fortoj—la Laborist-Kamparana Ruĝa Armeo. Post la Liberiĝo la 1-a de aŭgusto estas difinita kiel naskotago de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

“Tri-specaj krizantemoj” de Yangzhou

LA menciitaj krizantemoj estas artaĵoj propraj al la antikva urbo Yangzhou, nome krizantemoj papertondita de Zhang Yongshou, per papirifero* envaze aranĝita de Qian Hongcai kaj ĉinstile pentrita de Wu Yangeng.

Zhang Yongshou, kiu naskiĝis en papertondista familio, estas elstara reprezentanto de papertonda arto en la urbo. En 1959, eldoniĝis la poemaro de k-do Guo Moruo “Kunflorado de Cent Floroj” garnita per diversaj paperfloroj eltonditaj de Zhang. Liaj papertondaĵoj ne nur aspektas versimilaj, sed ankaŭ estas riĉaj je esprimivo. Liaj verkoj sin karakterizas per modesteco, firmeco de strekoj, flirtanta malpezeco kaj plenececo de vivforto en la strukturo multe imite al la tradicia ĉinstila pentrarto. La krizantemoj antaŭe eltonditaj de li havis inklinon al soleco kaj skeleteco, dum la nunaj abundas je flujaj strekoj kaj pompas je branĉoj, folioj kaj floroj en malsamaj vicoj, densoj kaj pozoj. Ili impresas profunde per versimileco kaj beleco.

La alia metiartaĵo estas la envaza krizantemo el papirifero farita de Qian Hongcai, kiu sin okupas pri tiu arto de 1953. Liaj artaĵoj havas karakterizaĵojn de versimileco, deli-

kateco kaj kolorkonservo. En ekspozicioj la vizitantoj eĉ ne povis diferencigi liajn artefaritajn florojn de la naturaj, admirante, ke ili estas “pli vivecaj ol la naturaj”. Oni nomas liajn krizantemojn “Senvelkaj Floroj”.

Ankaŭ la ĉinstila pentraĵo “Krizantemo” estas fama artaĵo. Ĝin pentris Wu Yangeng, filino de Qing-dinastia pentristo Wu Lixian, kiu famiĝis pro sia lerta pentrado de “Bildo de Cent Krizantemoj”. Ŝi heredis la pentrarton de sia patro kaj lerte kombinas delikatajn strekojn kun la liberaj en pentrado. Ŝiaj buntaj krizantemoj estas brile pompaj, variaj en inka tuŝado kaj riĉaj je ĉarmeco kaj forteco en tuta konsisto. Ili servas kiel pensigaj poemoj pri aŭtuna pejzaĝo.

La tri artistoj havas sian apartan artan superecon, ĉar ili longtempe persistas en observado kaj kolektado de krizantemoj de ilia burĝonado ĝis ilia velkado. Tio estas reala bazo por ilia arta kreado.

Nun, ili dediĉas sian sperton por kulturi junajn artistojn. La “tri-specaj krizantemoj de Yangzhou” daŭre pompos en la arta ĝardeno.

* *Tetrapanax papyrifera*



Wu Yangeng,
Zhang Yongshou
kaj Qian Hongcai
(de maldekstre)

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Tulipoj

de **ROBERT LEFE-
BVRE** (Francio)



Pejzaĝo de suda Kalifornio, Usono

de **ARLAN WAREHAM** (Usono)



“Tri-specaj Krizantemoj” de Yangzhou

(Vd. la samtitolan artikolon en tiu ĉi numero)


Fotoj de YAN JIN




Pentristo Wu Yangeng




Krizantemoj de Wu Yangeng (ĉin-stila pentraĵo)



Papertranĉisto Zhang Yongshou (meze)



Krizantemoj de Zhang Yongshou (papertranĉaĵo)



Metiartisto Qian Hongcai



Krizantemoj el papirifero (*Tetrapanax papyrifera*) faritaj de Qian Hongcai

815W



一九八〇年 五月
 北京 劉苗 畫

